

eLIBRO

Karel Čapek

Libro
de
apokrifoj

I N K O

Karel Čapek

LIBRO DE APOKRIFOJ

El la ĉeĥa tradukis

Josef Vondroušek

kun lingva konsultiĝo de

Rudolf Hromada, Tomáš Pumpr

kaj Reto Rossetti.

eLIBRO

Aranĝis: Franko Luin

ISBN 91-7303-164-X

inko@omnibus.se

http://www.omnibus.se/inko

JULIO 2002

La puno de Prometeo

Tuskraĉante kaj ĝemegante post longa pruv-proceduro la eksterordinara senato foriris al konsiliĝo, kiu okazis en ombro de sankta olivo.

”Do, sinjoroj,” oscedis Hipometeo, la senatestro. ”Jen, kiel damne ĝi treniĝis. Mi opinias, ke mi eĉ ne bezonus prezenti resumon, nu, sed por ke ne estu formalaj ekscelpcioj — Do, la akuzita Prometeo, ĉi tiea civitano, venigite antaŭ la tribunalon tial, ke li inventis fajron kaj per tio iel — hm, hm — atencis la validan ordon, konfesis, ke: unue, li inventis efektive la fajron; plue, ke li kapblas kiam ajn plaĉas al li, kaŭzi la samon per agado nomata fajroŝtonado; trie, ke li ĉi tiun sekreton, respektive skandalan inventon neniel laŭorde retenis, eĉ ne anoncis al kompetenta loko, sed ĝin malice konigis, respektive donis por fruktuzo al nekompetentaj homoj, kiel estas atestite per depozicioj de la koncernaj personoj, kiujn ni ĵus enketis. Mi opinias, ke tio sufiĉas kaj ke ni povus tuj komenci voĉdoni pri la kulpo kaj verdikto.”

”Pardonu, sinjoro prezidanto,” kontraŭis asesoro Apometeo, ”sed mi opinias, ke rilate la gravecon de ĉiu tiu eksterordinara tribunalo eble tamen estus pli konve-

ne, ke al la proklamo de la verdikto ni alpaŝu nur post funda interkonsiliĝo kaj — por tiel diri — ĉiuflanka diskuto.”

”Kiel vi volas, sinjoroj,” konsentis la tolerama Hipometeo. ”La afero estas ja klara, sed se iu el vi ankoraŭ volas ion rimarkigi, mi petas.”

”Mi permesus al mi rimarkigi nur,” aŭdiĝis senatano Ameteo kaj ege ektusis, ”ke laŭ mia opinio oni ĉe la tuta afero emfazu speciale unu flankon. Sinjoroj, mi pensas pri la religia flanko. Bonvolu permesi, kio estas tiu fajro? Kio estas tiu eligita fajrero? Kiel konfesis Prometeo mem, ĝi estas nenio alia ol fulmo, kaj fulmo, kiel ĝenerale estas konate, estas manifestiĝo de speciala potenco de Zeŭso la Tondroreganto. Bonvolu klarigi al mi, sinjoroj, kiel venas ia tia Prometeo al dia fajro? Kiarajte li ĝin ekposedis? Kie entute li ĝin prenis? Prometeo volas kredi al ni, ke simple li ĝin inventis; sed kiaj stultaj elturniĝoj, — se ĝi estus tiel sendanĝera, kial ne estus inventinta la fajron iu el ni? Laŭ mia konvinko, sinjoroj, Prometeo la fajron simple ŝtelis de niaj dioj. Liaj neado kaj elturniĝoj ne erarigos nin. Mi kvalifikus lian punagon kiel ordinaran ŝtelon, due kiel krimon de blasfemado kaj sakrilegio. Ni estas ĉi tie por puni plej severe la sendian arogon kaj por gardi la sanktan posedaĵon de niaj naciaj dioj. Nur tion mi volis diri,” finis Ameteo kaj energie mungis en pinton de sia mantelo.

”Bone dirite,” konsentis Hipometeo. ”Ĉu ankoraŭ iu havas ion por diri?”

”Mi petas pardonon,” diris Apometeo, ”sed mi ne povas konsenti kun la konkludoj de la estimata sinjoro kolego. Mi mem rigardis, kiam la nomita Prometeo ekflamigis la fajron; kaj mi diros al vi sincere, sinjoroj, ja — inter ni — ĝi estas tute nenio. Inveni fajron, tion scius ĉiu pigrulo, nenifarulo kaj kapropaŝtisto; ni ne inventis ĝin nur tial, ĉar serioza homo, memkomprene, havas nek tempon, nek person ludadi per ia fajroŝtonado. Mi certigas sinjoron kolegon Ameteon, ke tio estas tute ordinaraĵoj naturfortoj, pri kiuj okupiĝi ne indas al pensanta homo, por ne diri, al dioj. Laŭ mia opinio la fajro estas fenomeno tro bagatela, por tuŝi aferojn al ni ĉiuj sanktajn. Sed la afero havas alian flankon, al kiu mi devas turni la atenton de sinjoroj kolegoj. Nome ŝajnas, ke la fajro estas elemento tre danĝera, ja eĉ malutila. Vi aŭdis aron da atestantoj, kiuj depoziciis, ke provante la buban inventon de Prometeo suferis gravajn brulvundojn, eĉ en kelkaj kazoj damaĝojn je havaĵo. Sinjoroj, se disvastiĝos kulpe de Prometeo la uzado de fajro, kion bedaŭrinde oni jam ne povas malhelpi, neniu el ni estos sekura pri sia vivo kaj ankaŭ ne pri sia posedaĵo, sed tio, sinjoroj, povas signifi finon de la tuta civilizo. Sufiĉas minimuma malsingardo — kaj antaŭ kio haltos tiu malkvieta elemento? Prometeo, sinjoroj, kulpiĝis pro puninda fa-

cilanimeco per tio, ke li enmondigis ion tiel malutilan. Mi formulus lian kulpon kiel krimon de grava korpo-difekto kaj endanĝerigado de la publika sekureco. Rilate tion mi estas por dumviva puno per mallibero kun malmola lito kaj katenoj. Mi finparolis, sinjoro prezidanto.”

”Vi, kolego, tute pravas,” snufis Hipometeo. ”Nur ankoraŭ mi aldonus, sinjoroj, por kio entute necesis al ni ia fajro? Ĉu uzis fajron niaj antaŭuloj? Veni kun io simila, tio estas — hm hm, ja subfosa agado. Fajroludado, tio ankoraŭ mankis al ni! Kaj konsideru, sinjoroj, kien ĝi kondukos: la homoj ĉe fajro nenecese malhardiĝos, kuŝaĉos en varmo kaj komforto, anstataŭ — nu, anstataŭ batali kaj simile. Rezultos el tio nur sibiritiĝo, dekadenco kaj — hm, entute malordo kaj simile. Mallonge, ion oni jam devas entrepreni kontraŭ tiaj malutilaj simptomoj, sinjoroj. La tempo estas malfacila kaj entute. Nur tion mi volis rimarkigi.”

”Tre ĝuste,” aŭdiĝis Antimeteo. ”Ni ĉiuj certe konsentas kun nia sinjoro prezidanto, ke la fajro de Prometeo povas havi neantaŭvideblajn sekvojn. Sinjoroj, ni ne sekretigu al ni, ĝi estas grandioza afero. Havi fajron en sia povo — kiaj novaj ebloj ĉi tie aperas. Mi citas nur sen-elekte: forbruligi la rikolton de malamikoj, bruligi iliajn olivboskojn kaj tiel plu. Per fajro, sinjoroj, estas donita al ni homoj nova forto kaj nova armilo; per fajro ni iĝas

preskaŭ egalaj al la dioj,” flustris Antimeteo kaj subite li akre ektondris. ”Mi akuzas Prometeon, ke ĉi tiun diecan kaj nesupereblan elementon fajron li konfidis al paŝtistoj kaj sklavoj, al kiu ajn, kiu venis; ke li ne transdonis ĝin en kompetentajn manojn, kiuj gardus ĝin kiel ŝtatan trezoron kaj per ĝi regus. Mi akuzas Prometeon, ke tiamaniere li fraŭdis la inventon de la fajro, kiu devis esti sekreto de princoj. Mi akuzas Prometeon,” kriis ekscitite Antimeteo, ”ke li instruis fari la fajron ankaŭ al fremduloj. Ke li eĉ ne sekretigis ĝin antaŭ niaj malamikoj. Prometeo ŝtelis la fajron de ni tiel, ke li donis ĝin al ĉiuj. Mi akuzas Prometeon pro landoperfido. Mi akuzas lin pro insidoj kontraŭ la komunumo.” Antimeteo pro krio eĉ komencis tusi. ”Mi proponas mortpunon,” li eligis el si.

”Do, sinjoroj,” ekparolis Hipometeo, ”ĉu ankoraŭ iu postulas la vorton? Do, laŭ la opinio de la tribunalo la akuzita Prometeo estas trovita kulpa kaj pro krimo de blasfemo kaj sakrilegio, kaj pro krimo de grava korpolezo, respektive damaĝo al fremda posedaĵo kaj endanĝerigado de la publika sekureco, kaj pro krimo de perfido. Sinjoroj, mi proponas ŝarĝi lin per dumviva puno per mallibero, pliseverigita per malmola lito kaj katenoj, aŭ mortpunon. Hm.”

”Eble ambaŭ,” enpense subitis Ameteo. ”Por kontentigi ambaŭ proponojn.”

”Kiel do, ambaŭ punojn?” demandis la prezidanto.

”Ĵus mi pripensas tion,” murmuris Ameteo. ”Estus eble tiel ... kondamni Prometeon al tio, ke li estu dumvive alĉenita al roko ... eble vulturoj elbekus lian malpian hepaton, ĉu vi bonvolas kompreni?”

”Tio estus ebla,” diris kontentigite Hipometeo. ”Sinjoroj, tio estus foje ekzempla puno je tiaj — hm, krimaj ekstravagancoj, ĉu? Ĉu iu havas ian kontraŭdiron? Do ni estus pretaj.”

*

”Kaj kial, paĉjo, vi kondamnis tiun Prometeon al morto?” demandis Hipometeon ĉe vespermanĝo lia filo Epimeteo.

”Tion vi ne komprenas,” murmuris Hipometeo, dume ĉirkaŭmordante ŝafan femureton. ”Hometo, tia rostita femuro pli bongustas ol la kruda; do, vidu, por io tamen la fajro estas bona. — Tio estis pro kaŭzoj de publika intereso, ĉu vi scias? Kien kondukus, se iu ajn povus senpune veni kun io nova kaj granda, ĉu? Sed io ankoraŭ mankas al tiu viando — Jen ideo!” ĝoje li ekkriis. ”Rostitan femuron oni devus sali kaj ajli! Jen la ĝusta! Knaĉo, tio estas ja invento! Vidu, tion tia Prometeo ne malkovrus!”

[1932]

Pri dekadenco de la tempo

Antaŭ la groto estis silente. La viroj foriris tuj matene, svingante la ĵetlancojn, direkte al Blansko aŭ Rájec, kie laŭ la spuroj estis trovita grego da boacoj; la virinoj dume kolektis en la arbaro oksikokojn kaj nur de temp' al tempo estis aŭdebla ilia akresona kriadado kaj babilado; la infanoj plej verŝajne padelis malsupre en rivereto — cetere kiu kapablus kontroli tiujn gebubojn, ularon friponan kaj lupmoran. Kaj do la maljuna prahomo Janeček dormetis en tiu malofta silento sub la modera oktobra suno; verdire li ronkis kaj el lia nazo sonis fajfado, sed li ŝajnis kvazaŭ li ne dormas, sed gardas la groton de la gento kaj regas super ĝi, kiel decas al maljuna gentestro.

La maljuna Janečekino dismetis freŝan ursofelon kaj komencis ĝin priskrapi per akra siliko. Tion oni devas solide fari, spanon post spano — kaj ne, kiel faras tion la juna, ekpensis la maljuna Janečekino; tiu ventkapulino tion nur tiel neglekte duonskrapas kaj jam denove kuras karesi kaj dorloti la infanojn — tia felo, pensas la maljuna Janečekino, neniom rezistas, nepre ne, ĝi aŭ sekputriĝas aŭ ŝimiĝas; sed mi ne miksos min en ŝiajn aferojn,

pensas sinjorino Janeček, se la filo mem tion ne diros al ŝi. — Nur laŭvere, ŝpari la juna ne scias. Kaj jen la felo estas trapikita, ĝuste meze de la dorso: Karaj homoj, timtremas la maljuna sinjorino, kiu mallertulo pikis tiun urson en la dorson? Ja per tio senvaloriĝas la tuta felo: Tion la mia neniam farus, diras al si ĉagrene la maljunulino, tiu ĉiam trafis la kolon.

”Aĥ ja,” ekaĥis tiumomente la maljuna Janeček kaj elfrotis al si la okulojn. ”Ĉu ili ankoraŭ ne revenis?”

”Ba ne,” grumblis la maljuna sinjorino. ”Ankoraŭ vi atendos.”

”Tja,” ekĝemis la maljunuleto kaj dormeme okulumis. ”Ba, ili. Jes ja. Kaj kie estas la hominoj?”

”Ĉu mi gardas ilin?” murmuris la maljunulino. ”Vi scias ja, ie ili vagaĉas —”

”Aĥ ja, ja,” oscedis la avo Janeček. ”Ili vagaĉas ie. Anstataŭ — anstataŭ, ni diru, tio aŭ alia — Do tiel. Tiel ĝi statas!”

Estis silento; nur la maljuna Janečekino rapide kaj kun kolera fervoro daŭre skrapis la krudan felon.

”Mi diras,” aŭdiĝis Janeček, gratante enpense sian dorson. ”Vi vidos, ke denove nenion ili alportos. Estas ja memkomprene: kun tiuj iliaj sentaŭgaj ostlancoj. — Kaj mi senĉese diras al la filo: rigardu, neniu osto estas ja sufiĉe dura kaj firma por ke oni povu fari el ĝi ĵetlancojn! — Tion devas ja rekoni ankaŭ vi kiel virino, ke nek osto

nek kornaro havas tiun nu — tian trabativon, ĉu vi sci-
as? Oni trafas per tio oston, kaj oston oni ja ne povas
trabati per osto, nu ne? Tio estas memkomprena. Jes, tia
ŝtona ĵetlanco, homido — memkromprene ĝi estas pli
peniga, sed kompanse ĝi estas, hominjo, instrumento. —
Sed ĉu la filo lasas, ke oni konsilu al li?”

”Nu jes,” diris amare sinjorino Janeček. ”Hodiaŭ ne-
niu plu toleras ordonadon.”

”Mi ja ne ordonas al iu,” ekscitiĝis la maljunulo. ”Sed
eĉ konsilon ili ne akceptas! Hieraŭ mi trovis tie sub la
roko tian belan, platan silikan rompopecon. Sufiĉus pri-
ĉizi ĝin iomete ĉe la randoj, por ke ĝi estu pli akra, kaj
ĝi estus lancpinto, nu ĝojinde. Do mi ĝin prenas hejmen
kaj montras al la filo: Vidu, jen kia ŝtono, nu? — Nu jes,
li rediras, sed kion kun ĝi, paĉjo? — Nu, mi diras, oni
povus prihaki ĝin por ĵetlanco. — Ba, paĉjo, diras li, kiu
emus ĝin ĉizi kaj filigrani? Da tia malnova fatraso ni
havas ja en la groto tutajn amasojn kaj cetere por nenio
ĝi taŭgas; eĉ sur la lanco ĝi ne teniĝas, oni ligu ĝin kiel
ajn, do kion kun ĝi? — Inertuloj ili estas,” ekkriis impete
la maljunulo. ”Hodiaŭ neniuj plu volas solide prilabori
pecon da siliko, jen la afero. Komfortamaj ili estas.
Memkomprene, tia ostpinto estas farita tuj, sed ĝi ankaŭ
rompiĝas al vi ĉiumomente. Nu ne gravas, diras la filo,
do oni donas novan kaj prete. Nu jes, sed kien tio kon-
dukas? Ĉiumomente novan ĵetlancon! Diru mem, kiu

tion iam vidis? Hominjo, tia bone farita silika pinto devis elteni longegajn jarojn! Sed mi diras, miaj vortoj praviĝos: ja foje ili ankoraŭ ŝate revenos al niaj solidaj ŝtonarmiloj! Tial mi kolektas kie ajn mi ion trovas: malnovajn sagojn kaj batilojn kaj silikajn tranĉilojn — Kaj tion ili nomas fatraso!”

La maljuna sinjoro preskaŭ sufokiĝis pro aflikto kaj indigno. ”Nu vidu,” aŭdiĝis sinjorino Janeĉek por alkonduki lin al aliaj pensoj. ”Jen la sama afero kun la feloj. Panjo, diras al mi la bofilino, kial ĝin tiom priskrapadi, domaĝe pri la laboro; provu foje tani la felon per cindro, tio almenaŭ ne fetoras.” — ”Min vi volas instrui,” abruptis la maljunulino la forestantan bofilinon, ”mi scias, kion mi scias! De ĉiam la feloj estis nur priskrapataj kaj kiaj ili estis! Memkomprene, se estas domaĝe al vi labori — Nur se ili povas iel eviti la laboron! Tial ili senĉese ion elpensas kaj aliigas — Tani felon per cindro! Kiu iam aŭdis tion!”

”Jam estas tiel,” ocedis Janeĉek. ”Jes ja, ne estas por ili plu sufiĉe bona, kiel ni tion faris. Kaj ili diras, ke niaj ŝtonarmiloj estas maloportunaj por la mano. Do tio estas vero, la komforton ni ne tro atentis; sed hodiaŭ — nununu, por ke vi ne kontuzu viajn manetojn! Diru mem, kien tio kondukos? Rigardu la nunajn infanojn. Nur, avo, lasu ilin, diradas la bofilino, ili ludu. Jes, sed kio estos iam el ili?”

”Se ili almenaŭ ne farus tian rumoron,” plendis la maljuna sinjorino. ”Misedukitaj ili estas, jen la vera vero!”

”Jen la nuntempa edukado,” predikis la maljuna Janeček. ”Kaj kiam mi iam-tiam diras ion al la filo, li diras: Paĉjo, tion vi ne komprenas plu, hodiaŭ estas alia tempo, alia epoko — Ja, li diras, onidire eĉ la ostarmiloj ne estas ankoraŭ la lasta vorto; foje, li diras, venos homoj al pli kvalita materialo — Nu sci, tio estas jam tro: kvazaŭ iu vidus iam alian firman materialon krom ŝtono, ligno aŭ ostoj! Tion vi mem devas rekoni, kiel malsaĝa virino, ke, — ke — ke tio superas ĉiun limon!”

La manoj de sinjorino Janeček sinkis en la sinon. ”Vi,” ŝi diris, ”kaj de kie ili prenas ĉi tiujn sensencaĵojn?”

”Nu, laŭdire tio estas nun moderna,” maĉetis sendente la maljunulo. ”Mi petas vin, tie en tiu direkto, kvar tagojn da marŝo de ĉi tie, almiĝis iu nova gento, tia fremda kanajlaro, kaj ili tion onidire tiel faras. — Vi devas scii, ĉiujn ĉi malsaĝaĵojn la niaj havas de ili. La ostarmilojn kaj ĉion. Eĉ — eĉ ili aĉetas tion de ili,” li ekkriis ekscitite. ”Por niaj bonaj feloj! Kvazaŭ iam io bona venus de fremduloj! Nur nenion komenci kun iu fremda aĉularo! Kaj entute, ĝi estas malnova sperto de la antaŭuloj: ĉiu fremdulo estas senhezite atakenda kaj likvidenda. Tiel estis de ĉiam: neniajn ceremoniojn kaj mortigi. — Ba ne, paĉjo, diras la filo, nun estas alia situacio, nun oni en-

kondukas var-interŝanĝon. — Var-interŝanĝo! Se mi iun mortigas kaj prenas de li, kion li havas, do mi ricevas lian varon kaj nenion mi donas al li por tio — do kial ia interŝanĝo? Tute ne, paĉjo, diras la filo, tiel vi pagas per homaj vivoj, kaj domaĝe pri ili! — Do jen vi havas: estas onidire domaĝe pri homaj vivoj! Jen la nunaj opinioj,” grumblis la maljuna sinjoro malplaĉe. ”Malkuraĝuloj ili estas, jen ĉio! Domaĝe pri la vivoj! Kaj diru, kiel iam vivtenos sin tiom da homoj, kiam ili ne buĉados unu la alian? Jam nun estas diable malmulte da tiuj boacoj! Vidu, homvivojn ili bedaŭras; sed la tradicion ili ne respektas, siajn antaŭulojn kaj gepatrojn ili ne estimas. — Ja, ĝi estas dekadenco,” elpuŝis impete avo Janeĉek. ”Antaŭ nelonge mi rigardas, iu tia nazgutulo desegnaĉas per kolora kreto sur muro de la groto figuron de bizono. Mi donis al li kapfrapon, sed mia filo diras: Nur lasu lin, tiu bizono estas ja kvazaŭ vivanta! — Nu, tio vere jam troas! Ĉu oni iam faris tiajn senbezonaĵojn? Se vi havas nenion por labori, bubo, do priĉizu iun silikon, sed ne por bizonojn surmure! Ĉu estas al ni bezonataj tiaj stultajoj?”

Sinjorino Janeĉek kunpremis severe la lipojn. ”Se nur bizonojn,” ŝi avarvortis post momento.

”Kion do?” demandis la avo.

”Nu nenio,” defendis sin sinjorino Janeĉek, ”estas al mi honte tion diri — Do, por ke vi sciu,” ŝi decidiĝis su-

bite, "hodiaŭ matene mi trovis ... en la groto ... pecon da mamuta dentego. Ĝi estis skulptita ... kiel nuda virino. Mamojn kaj ĉion, ĉu vi scias?"

"Aj, aj," miregis la maljunulo. "Kaj kiu skulptis tion?"

Sinjinino Janeček skuis indigne la ŝultrojn. "Kiu scias. Verŝajne iu el la junaj. Mi jetis tion en la fajron, sed — Tiajn mamojn ĝi havis! Fi!"

"— Nu, jam vere tro," elpuŝiĝis el avo Janeček. Kia senmoralo! Vidu, jen sekvo, ke ili ĉizas ĉion eblan el ostoj! En nian menson neniam venis tia malĉastaĵo, ĉar el la siliko ĝi eĉ ne estus farebla — Kien tio kondukas! Jen iliaj inventoj! Senĉese ili ion inventados, senĉese ion novan ili enkondukados, ĝis ili ĉion ruinigos kaj detruos. — Kaj mi diras," vokis la prahomo Janeček en profeta ekstazo, "ke ĝi ne plu longe daŭros!"

[1931]

Kiel dum la malnovaj tempoj

Al Eŭpatoro, civitano el Tebo kaj korbisto, kiu sidante sur korteto plektis siajn korbojn, alkuris lia najbaro Filagoro kaj vokis jam de malproksime: "Eŭpatoro, Eŭpatoro, lasu viajn korbojn kaj aŭskultu! Okazas teruraj aferoj!"

"Kie brulas?" demandis Eŭpatoro kaj ŝajnis, ke li volas leviĝi. "Tio estas pli malbona ol fajro," diris Filagoro. "Ĉu vi scias, kio okazis? Oni volas akuzi nian armeestron Nikomaĥon! Iuj diras, ke li estas akuzata pri intrigoj kun la Tesalanoj, kaj aliaj asertas, ke oni riproĉas al li iajn rilatojn kun la Partio de Malkontentuloj. Venu tuj, ni amasiĝas sur la placo!"

"Kaj kion mi tie faru?" demandis Eŭpatoro hezite. "Estas ekstreme grave," parolis Filagoro. "Jam estas tie multaj oratoroj; unuj asertas, ke li estas senkulpa, kaj aliaj diras, ke li estas kulpa. Venu aŭskulti ilin!"

"Atendu," diris Eŭpatoro, "nur kiam mi finfaros la korbeton. Kaj diru al mi, pri kio propre tiu Nikomaĥo estas kulpigata?"

"Ĝuste tion oni ne scias," diris la najbaro. "Oni diras tion kaj alion, sed la oficialaj lokoj silentas, ĉar la enke-

tado ne estas ankoraŭ finita. Sed sur la placo estas tumulto, io vidinda por vi! Kelkaj krias, ke Nikomaĥio estas senkulpa — ”

”Atendu iom; kiel ili povas krei, ke li estas senkulpa, kiam ili ne scias tute certe, pri kio li estas akuzata?”

”Estas egale; ĉiu ion aŭdis kaj parolas nur pri tio, kion li aŭdis. Ĉiu rajtas paroli pri la aŭditaĵo, ĉu? Mi kredus, ke Nikomaĥo volis nin perfidi al la Tesalanoj; iu tion tie diris kaj rakontis, ke iu lia konato vidis ian leteron. Sed iu homo diris, ke ĝi estas komploto kontraŭ Nikomaĥo kaj ke li scias pri tio parolindaĵojn. — Onidire ankaŭ en tion estas implikita la registaro de la komunumo. Ĉu vi aŭdas, Eŭpatoro? Nun estas demando — ”

”Atendu,” diris la korbisto. ”Nun estas demando: ĉu la leĝoj, kiujn ni donis al ni, estas bonaj aŭ malbonaj? Ĉu pri tio parolis iu sur la placo?”

”Ne, sed ne pri tio temas; temas pri Nikomaĥo.”

”Kaj ĉu diras iu sur la placo, ke la oficistoj, kiuj enketas Nikomaĥon, estas malbonaj kaj maljustaj?”

”Ne, pri tio oni tute ne parolis.”

”Do, pri kio oni parolis?”

”Mi diras ja tion al vi: pri tio, ĉu Nikomaĥo estas kulpa aŭ senkulpa.”

”Aŭdu, Filagoro, se via edzino disputus kun la viandisto, ke li ne donis al ŝi ĝustan funton da viando, kion vi farus?”

”Mi helpus al mia edzino.”

”Ba ne; vi rigardus, ĉu la viandisto havas bonan pesilon.”

”Tion mi scias ankaŭ sen vi, homo.”

”Do vi vidas. Kaj poste vi rigardus, ĉu la pesilo estas en ordo.”

”Ankaŭ tion vi ne bezonas diri al mi, Eŭpatoro.”

”Mi ĝojas. Kaj kiam la pezilo kaj pesilo estas en ordo, vi rigardus, kiom pezas tiu peco da viando, kaj vi tuj vidus, ĉu pravas la viandisto aŭ via edzino. Estas strange, Filagoro, ke la homoj estas pli sagacaj, se temas pri ilia peco da viando, ol se temas pri la publikaj aferoj. Ĉu Nikomaĥo estas kulpa aŭ senkulpa? Tion montros pesilo, se la pesilo estas en ordo. Sed por bone pesi oni ne rajtas blovi al la pesil-teleroj, por ke ili kliniĝu al tiu aŭ alia flanko. Kial vi asertas, ke la oficistoj esplorontaj la aferon de Nikomaĥo estas trompuloj aŭ kio?”

”Tion neniu diris, Eŭpatoro.”

”Mi pensis, ke vi ne kredas al ili; sed se vi ne havas kaŭzon ne kredi al ili, kial vi, ĉe ĉiuj dioj, blovas en iliajn pesiltelerojn? Aŭ estas tial, ĉar ne gravas por vi, ke aperu la vero, aŭ tial, ĉar ĝi konvenas al vi nur por tio, ke vi povu dividi vin en du partiojn kaj disputi. Tondro batu vin ĉiujn, Filagoro; mi ne scias, ĉu Nikomaĥo estas kulpa, sed vi ĉiuj estas diable kulpaj pri tio, ke vi volonte atencus la justecon. Estas strange kiel la vergoj estas

nunjare malbonaj; ili fleksiĝas kiel ŝnuretoj, sed havas neniun solidecon. Povus esti pli varme, Filagoro; sed tio estas en la manoj de dioj kaj ne de ni homoj.”

[1926]

Tersito

Estis nokto kaj la viroj aĥajaj alsidiĝis pli proksimen al la fajro.

”La ŝafaĵo denove ne estis manĝebla,” aŭdiĝis Tersito, fosetante en la dentoj. ”Mi miras pri vi, Aĥiajoj, ke vi tion toleras. Mi vetus, ke *ili* havis por vespermanĝo minimume virŝafetojn unujarajn; sed memkomprene, por ni, la maljunaj soldatoj, fetora virkapro estas sufiĉe bona. Homidoj, kiam mi rememoras la ŝafaĵon ĉe ni en Greklando —”

”Lasu tion, Tersito,” murmuris paĉjo Eŭpatoro. ”Milito estas milito.”

”Milito,” rediris Tersito. ”Mi petas vin, kion vi nomas milito? Tion, ke ni ĉi tie preskaŭ la dekan jaron gapas pro nenio kaj por nenio? Mi diros al vi, junuloj, kio ĝi estas: ĝi estas neniu milito, nur la sinjoroj armeestroj kaj ranguloj faris al si je ŝtataj kostoj ekskurson; kaj ni malnovaj soldatoj, ni buŝmalfermu je tio, kiel iu dando, nazviŝulo kaj panjo-fileto kuradas tra la tendaro kaj fanfaronas pri sia ŝildo. Tiela ĝi estas, homido.”

”Vi opinias Aĥilon Peleidon,” diris juna Laomedonto.

”Tiun aŭ iun alian,” deklaris Tersito. ”Kiu havas okulojn en la kapo, scias, kiun ĝi celas. Sinjoroj, tion ja ne-

niu kredigos al ni: se temus vere pri tio, ke ni konkeru tiun idiotan Trojon, do ni ĝin jam delonge havus. Nur ege terni kaj ĝi estus jam ŝutiĝinta. Kial oni ne entreprenas atakon kontraŭ la ĉefa pordego? Vi scias, tian solidan imponan sturmon kun krio, minacoj kaj kantado de militkantoj kaj tuj estus fino de la milito.”

”Hm,” murmuris la rezonema Eŭpatoro, ”per kriadado Trojo ne falos.”

”Jen, kiel vi eraras,” bruis Tersito. ”Ĉiu infano scias, ke Trojanoj estas timeguloj, malbravuloj, skabiuloj kaj kanajlaro. Nur unufoje energie montri al ili, kiuj ni estas, Grekoj! Vi okulus, kiel ili retiriĝus kaj ĝemaĉus pri kompatado! Sufiĉus iam-tiam ekatiki la trojajn virinojn irantajn vespere por akvo —”

”Ataki virinojn,” ŝultrolevis Hipodamo el Megaro, ”tion, Tersito, oni ne faras.”

”Milito estas milito,” ekkriis Tersito kuraĝege. ”Vi, Hipodamo, estas bela patrioto! Ĉu vi pensas, ke ni venkos en la milito per tio, se la moŝta Aĥilo unufoje en kvaronjaro aranĝas publikan interbatiĝon kun tiu blufulo Hektoro? Homo, tiuj du estas glate interkonsentintaj kaj lud-ekzercitaj, vere ĝojinde; iliaj dueloj, tio estas solo-numeroj, por ke la flavbekuloj pensu, ke tiuj du batalas por ili! Hej, Trojo, hej, Helaso, venu gapi, sinjorojn heroojn! Kaj ni ceteraj, ni estas nenio, nia suferado valoras unu tuson, pri ni eĉ ne hundo ekbojos. Mi diros ion al vi, Aĥajoj:

Aĥilo ŝajngigas heroon, nur por preni ĉiun kremon kaj por senigi nin de la militmeritoj; li volas, ke oni parolu nur pri li, kvazaŭ li estus ĉio kaj la aliaj kvazaŭ ne ekzistus. Jen la afero, junuloj. Kaj la milito treniĝas sin nur tial, por ke sinjoro Aĥilo povu pufigi sin kiel, dio scias, kia heroo. Mi miras pri vi, ke vi tion ne vidas.”

”Mi petas vin, Tersito,” aŭdiĝis la juna Laomedonto, ”kion ja faris al vi Aĥilo?”

”Al mi? Eĉ ne minimumon,” diris indigne Tersito. ”Kian intereson mi havas je li? Volu scii, kun li mi tute ne parolas; sed la tuta popolo estas sata de tio, kiel tiu ulo ŝajngigas sin grava. Ekzemple tiu lia spitado en la tendo. Ni vivas en tia historia tempo, kiam temas pri la honoro de nia Helaso; la tuta mondo observas nin — kaj kion faras sinjoro heroo? Li kuŝiĝas en la tendo kaj deklaras, ke li ne batalos. Ĉu eble ni ellaboregu anstataŭ li la historian tempon kaj la honoron de tuta Helaso? Sed tiel estas; kiam estas alvenonta penego, Aĥilo rampas en la tendon kaj ŝajngigas ofenditon. Fi, komedio! Jen la naciaj herooj! Malbravuloj ili estas.”

”Mi ne scias, Tersito,” diris la rezonulo Eŭpatoro. ”Aĥilo estas laŭdire terure ofendita, ĉar Agamemnono resendis al la gepatroj tiun lian sklavinon, kiel ŝi nur estas nomata, Brisidino aŭ Ĥriseidino, aŭ iel simile. Peleido faras el tio aferon prestiĝan, sed mi pensas, ke la knabinon li vere amis. Homido, tio ne estos ia komedio.”

”Al *mi* vi volas ion rakonti,” diris Tersito. ”*Mi* scias bone, kiel estis. Agamemnono simple forlogis de li tiun inon, ĉu vi ne scias? Memkomprene, da rabitaj juveloj li havas abundege kaj virinan karnon li avidas kiel virkato. — Jam ĝuste sufiĉe, da tiuj virinoj: pro tiu vagaĉa Helena la milito komenciĝis kaj nun denove ĉi tio — ĉu vi aŭdis, ke Helena en la lasta tempo amrilatas al Hektoro? Homoj, ŝin havis en Trojo ĉiu ajn, ankaŭ tiu avo super la tombo, la ŝima Priamo. Kaj pro tia ĉiesulino ni ĉi tie suferu kaj batalu? Dankon, mi ne volas!”

”Oni diras,” rimarkigis singene la juna Laomedonto, ”ke Helena estas tre bela.”

”Oni rakontis,” diris Tersito malrespekte. ”Ŝi forburĝonis eĉ troe kaj krome ŝi estas inaĉo, kiun neniu povas egali. Mi donus por ŝi eĉ ne saketon da faboj. Junuloj, mi dezirus al tiu malsaĝa Menelao, ke ni gajnu la militon kaj ke li rricevu Helenan. La tuta beleco de Helena estas legenda trompo kaj iom da ŝminko.”

”Kaj ni,” diris Hipodamo, ”ni Danaoj, Tersito, ni batalas pro nura legendo?”

”Kara Hipodamo,” diris Tersito, ”ŝajnas, ke vi ne komprenas tion. Ni, Helenoj, ni militas unue, por ke la maljuna vulpulo Agamemnono amasigu plenajn sakojn da rabaĵo; due tial, por ke la dando Aĥilo kontentigu sian senbridan ambicion; trie tial, por ke la trompulo Odiseo priŝteladu nin ĉe la militliveroj; kaj fine tial, por ke iu

koruptita foirkantisto, iu Homero aŭ kian nomon havas tiu vagulo, por kelkaj malpuraj moneroj glorigu la plej grandajn perfidulojn de la greka nacio kaj ĉe tio senhonorigu aŭ almenaŭ silentigu la verajn, modestajn ofere-majn heroojn aĥajajn, kiaj vi estas. Tiel statas la afero, Hipodamo.”

”La plej grandaj perfiduloj,” diris Eŭpatoro, ”tiu vorto estas, Tersito, tro forta.”

”Do, por ke vi sciu,” elpuŝis Tersito kaj dampis la voĉon, ”mi havas pruvojn pri ilia perfido. Sinjoroj, ĝi estas terura: mi ne diros al vi ĉion, kion mi scias, sed nur unu aferon enskribu post viajn orelojn: ke ni estas venditaj. Tion ja vi mem devas vidi: ĉu estas penseble, ke ni, Grekoj, la plej kuraĝa kaj plej kultura nacio en la mondo, jam delonge ne estus konkerintaj tiun Trojan sterkejon kaj ne finus kun tiuj mizeruloj kaj stratbuboj en Iliono, se ni ne estus dum jaroj kaj jaroj perfidataj? Ĉu, Eŭpatoro, vi opinias nin, Aĥajojn, tiaj malkuraĝuloj kaj hundoj, ke ni jam delonge ne estus pretaj kun tiu malpura Trojo? Ĉu eble Trojanoj estas pli bonaj soldatoj ol ni? Aŭdu, Eŭpatoro, se vi tion pensas, tiam vi eĉ ne povas esti Greko, sed iu Epirano aŭ Traco. Vera greka antikva homo devas kun doloro senti, en kia malhonoro kaj kanajlo-reĝimo ni vivas.”

”La vero estas,” opiniis enpense Hipodamo, ”ke la milito malbene sin trenas.”

”Do vi vidas,” ekkriis Tersito. ”Kaj mi diros al vi kial: ĉar la Trojanoj havas siajn aliancantojn kaj helpantojn inter ni. Eble vi scias, kiun mi aludas.”

”Kiun?” diris serioze Eŭpatoro. ”Nun, Tersito, vi devas jam tion finfari se vi jam komencis.”

”Maleme mi tion diras,” defendis sin Tersito. ”Vi, Danaoj, min konas, ke mi ne klaĉas; sed se vi pensas, ke estas en la publika intereso, mi diros al vi teruran aferon. Antaŭ nelonge mi parolis kun kelkaj bonaj, bravaj Grekoj; kiel patrioto mi parolas pri la milito, pri la malamiko, kaj kia jam estas mia greka malkaŝema karaktero, mi diras, ke la Trojanoj, niaj mortinsidaj kaj kruelegaj malamikoj, estas hordo da malkuraĝuloj, ŝtelistoj, nenifaruuloj, ĉifonuloj kaj ratoj kaj ke ilia Priamo estas senila maljunulo kaj ilia Hektoro malbravulo. Vi agnoskos ja, Aĥajoj, ke tio estas vera greka opinio. Kaj jen subite elpaŝas el la ombro Agamemnono mem — li eĉ ne plu hontas spioni! — kaj diras: Malrapide, Tersito; la Trojanoj estas bonaj soldatoj, Priamo estas brava maljuna viro kaj Hektoro estas heroo. Post tio li turniĝis je la kalkano kaj malaperis pli frue, ol mi povis lin laŭmerite rebati. Sinjoroj, mi restis kiel brogita. Aj, aj, mi diris al mi, jen de kie la vento blovas. Nun ni jam scias, kiu enportas en nian tendaron maldisciplinon, etanimecon, kaj malamikan propagandon! Kiel do ni povas gajni la militon, se tiuj malnoblaj Trojanoj havas siajn helpantojn, siajn parti-

anojn en nia mezo, ja eĉ pli malbone, rekte en nia ĉefa stabo? Kaj vi pensas, Aĥaĵoj, ke tia perfidulo faras sian subfosan laboron por nenio? Ba ne, homido, tiu ne laŭdegos senpage niajn naciajn malamikojn; tiu devis por tio, hometo, ricevi de la Trojanoj egan rekompencan. Nur tion, junuloj, iom komparu: la milito estas intence plilongigata, Aĥilo estis intence ofendita, en nia armeo estas aŭdeblaj nur plendoj kaj grumblado, ĉie kreskas maldisciplino — mallonge, ĉio estas nura kanajlado kaj ŝtelado. Kiun ajn vi rigardas, estas perfidulo, koruptito, fremdulo kaj ŝakrulo. Kaj kiam iu malkovras iliajn artifikojn, ili diras, ke li estas kritikaĉulo, kaj skismiga elemento. Tion havas niulo por tio, ke li volas, konsiderante nek dekstron nek maldekstron, servi nur al sia nacio kaj al ĝia honoro kaj gloro; Jen, kien ni, la antikvaj Grekoj, finvenis! Mire, ke ni ne sufokiĝas pro ĉiu ĉi ŝlimo! Iam oni skribos pri nia tempo kiel pri periodo de la plej profunda nacia malhonorigo kaj sklavigo, honto, malgrandeco kaj perfido, mallibero kaj maldisciplino, malkuraĝo, korupto kaj morala putrado —”

”Iel estis, iel estos,” oscedis Eŭpatoro. ”Kaj mi jam iras dormi. Bonan nokton, homidoj!”

”Bonan nokton,” diris Tersito, kore kaj plezure streĉiĝis. ”Nu, vidu, kiel bele hodiaŭ ni interbabilis, ĉu?”

[1931]

Agatono aŭ pri la saĝo

La Boiotiaj akademianoj invitis el Ateno la filozofon Agatonon, por ke li prelegu al ili pri filozofio. Kvan-kam Agatono ne estis eminenta oratoro, tamen la inviton li akceptis, por kontribui laŭ siaj fortoj al propagando de filozofio, kiu laŭ la vortoj de historiisto "ŝajnis dekadenci". En la difinita tago li alveturis en Boiotion, sed estis ankoraŭ frutempe; Agatono promenis do dum la tagiĝo ĉirkaŭ la urbo kaj ĝojis pro la flugo de la hirundoj super ĝiaj tegmentoj.

Kiam batis la oka, li foriris en aŭditorion, sed trovis ĝin preskaŭ malplena; nur kvin aŭ ses viroj sidis en la benkoj. Agatono eksidis ĉe la katedro kaj decidiĝis iom atendi, ĝis kunvenos pli granda nombro da aŭskultantoj; intertempe li malfermis volvaĵon, el kiu li volis legi, kaj absorbiĝis de ĝi.

La volvaĵo enhavis ĉiujn fundamentajn problemojn de la filozofio; ĝi komenciĝis per la teorio de ekkono, difinis la veron, refutis per frakasa kritiko la herezajn opiniojn, tio estas ĉiujn filozofiojn de la mondo krom tiu de Agatono, kaj prezentis skizojn de la plej altaj ideoj. Kiam Agatono venis ĝis ĉi tie, li levis la okulojn; li vidis, ke la

aŭskultantoj estas sume naŭ, kaj ekregis lin kolero kaj bedaŭro, kaj li, frapinte per la volvaĵo je la tablo, komencis jene:

”Sinjorinoj kaj sinjoroj, aŭ pli ĝuste *andres Boiótikoi*, ne ŝajnas, ke via urbo havus grandan intereson pri la majestaj problemoj, kiujn ni havas en la programo. Mi scias, viroj de Boiotio, ke vin ĵus okupas elektoj por la loka *bule* kaj ke en tia tempo ne estas loko por la saĝo, ja eĉ ne por la prudento; balotado estas ŝanco por sagaculoj.”

Tiam Agatono iom paŭzis kaj pripensis iom. ”Ni atendu,” li komencis denove, ”ĵus elglitis el mia buŝo io, pri kio mi ĝis nun ne meditis. Mi diris tri vortojn: sagaco — prudento — saĝo. Mi diris ilin en kolero. Ĉiuj tri signifas ian intelektan kapablon; mi sentas, ke ili havas tute diversan sencon, sed apenaŭ mi scius diri, en kio ili diferencas. Pardonu, tuj mi revenos al la programo; nur la tri vortetojn mi devas iomete komprenigi al mi.”

”Tio estas klara,” li daŭrigis post momento; ”la malo de sagaco estas malsprito, kontraŭe la malo de prudento estas stulteco. Sed kio estas malo de la saĝo? Estas pensoj, sinjoroj, kiuj estas nek sagacaj, ĉar tro simplaj, nek prudentaj, ĉar tro ili similas frenezaĵon, kaj tamen estas saĝaj. Saĝo similas nek al sagaco nek al prudento.”

”Boiotiaj viroj, en la ordinara vivo vi tiel same atentigas grajnon de papavo, laŭ nia greka dirmaniero, kiel difi-

non de nocioj, kaj tamen vi ilin precize distingas. Vi diras pri iu, ke li estas sagaca ŝtelisto; sed neniam oni diras 'prudenta ŝtelisto' aŭ eĉ: 'saĝa ŝtelisto'. Vi laŭdas vian tajloron, ke li havas prudentajn prezojn, sed vi ne diros, ke li havas prezojn saĝajn. Estas ĉi tie evidente ia diferenco, kiu malhelpas al vi miksi la vortojn."

"Se vi diras pri iu, ke li estas sagaca kampisto, vi pensas per tio evidente, ke li scias bone vendi en foiro; se vi diras, ke li estas prudenta kampisto, vi volas per tio verŝimile diri, ke li scias entute bone mastrumi; sed se vi lin nomas saĝa kampisto, jen eble ĝi signifas, ke li bone vivas, ke li multon scias kaj scias al vi konsili serioze kaj kun intereso."

"Aŭ, ni supozu, sagaca politikisto povas esti tute bone fripono kaj malutilanto de la respubliko; sed prudenta politikisto vi nomas nur tiun, kiu scias direkti la aferojn al ĝenerala utilo kaj laŭdinde; sed saĝa politikisto, sinjoroj, tion vi ĉiuj certe sentas, unuvorte, tia estas nomata 'patro de la patrio' aŭ simile; el tio oni povas vidi, ke la saĝo havas ion speciale korfavoran."

"Kiam mi pri iu diras, ke li estas sagaca, sub tio mi opinias rimarkindan specialaĵon; ĝi estas, kvazaŭ mi dirus, ke la abelo havas pikilon aŭ la elefanto rostron. Tute alie mi diras, ke abelo estas laborema, aŭ ke elefanto estas ege forta; en tio estas ia agnosko, mi respektas la forton, sed mi ne respektas la rostron. Same serioze mi

diras pri iu, ke li estas prudenta. Sed, se mi diras, ke li estas saĝa, tio, homido, estas alia afero; tio estas, kvazaŭ mi dirus, ke mi lin ŝatas. Unuvorte, la sagaco estas donaco aŭ talento; la prudento estas eminenta kvalito aŭ forto, sed la saĝo estas virto.”

”Kaj nun mi jam scias, kia diferenco estas inter la tri vortoj. La sagaco estas ordinare kruela, malica kaj egoisma; ĝi elserĉas ĉe proksimulo lian malfortan flankon kaj scias ĝin eluzi por sia profito; ĝi kondukas al sukceso.”

”La prudento estas ofte kruela al la homo, sed estas justa por la celoj; ĝi serĉas profiton komunan; se ĝi trovas ĉe proksimulo malfortan flankon aŭ stultecon, ĝi penas ĝin forigi per instruo aŭ disciplino; ĝi kondukas al rebonigo.”

”La saĝo ne povas esti kruela, ĉar ĝi mem estas bonvolo kaj simpatio; ĝi eĉ ne serĉas jam ĝeneralan profiton, ĉar ĝi tro amas la homojn, por povi ami iun pluan celon; se ĝi trovas malfortecon aŭ kompatindon ĉe proksimulo, ĝi pardonas ĝin kaj amas ĝin; ĝi kondukas al harmonio.”

”Viroj el Boiotio, ĉu vi aŭdis iam, ke oni donadus nomon 'saĝa' al homo malfeliĉa? aŭ al farsulo? aŭ al homo galhumora kaj senrevigita? Diru, kial ekzistas la kutimo, almenaŭ en la vivo nefilozofia, nomi homo saĝa viron tian, kiu havas malplej da malamo kaj kiu kun la mondo bone harmonias? Diru al vi multfoje kaj multfoje la

vorton 'saĝo'; diru al vi tiun vorton, kiam vi ĝojas aŭ malĝojas, estas lacaj, indignaj kaj malpaciencaj; vi aŭdos en ĝi triston, sed jam pacigitan, ĝojon, sed konstante kaj delikate ripetatan, lacon, sed plenan de instigoj, paciencon kaj pardonon sen fino; kaj ĉio ĉi, amikoj, estas sono ĉarma kaj melankolia, voĉo tra kiu sonas la saĝo.”

”Jes, la saĝo estas ia melankolio. Sian prudenton povas homo plene meti en sian verkon, povas ĝin realigi per sia laboro. Sed la saĝo ĉiam restos super ĉiu verko. Saĝa homo estas kiel ĝardenisto, kiu sterkas bedon aŭ alligas rozojn al stangoj, kaj dume pensas eble pri dio. Lia verko neniam ampleksos kaj enkorpiĝos lian saĝon. La prudento estas en ago, sed la saĝo estas en travivaĵo.”

”Sed saĝaj poetoj kaj artistoj scias ankaŭ tiun travivaĵon meti en sian verkon; ili ne prezentas sian saĝon en agoj, sed rekte en la travivo. Ĉi tio estas eksterordinara valoro de la arto kaj nenio en la mondo ĝin egalas.”

”Rigardu, mi jam tute deflankiĝis de mia programo. Sed kion mi povas ankoraŭ diri? Se la saĝo estas en la travivo kaj ne en pensoj, estas superflue, ke mi legu mian volvaĵon.”

[1920]

Aleksandro la Granda

AL ARISTOTELO EL STAGIRO,
DIREKTORO DE LA LICEO EN ATENO.

Mia granda kaj amata instruisto, kara Aristotelo!

Longe, tre longe mi ne skribis al vi; sed kiel vi scias, mi estis tro okupita pri aferoj militaj kaj kiam ni marŝis tra Hirkanio, Drangiano kaj Gadrosio, kiam ni estis konkerantaj Baktrion kaj avancis trans Hinduson, estis nek tempo nek emo preni la plumon. Nun mi estas jam kelkajn monatojn ree en Suzo; sed denove estis zorgoj pri administrado superkape, kun nomuno de oficistoj kaj kun likvido de ĉiaj intrigoj kaj ribeloj, ke ĝis hodiaŭ mi ne venis al tio skribi al vi ion pri mi. Vere, proksimume vi scias el la oficialaj raportoj, kio okazis; sed kiel mia sindono al vi, tiel mia konfido al via influo je kleraj rondoj helenaj min stimulas, ke mi denove remalfermu mian koron al vi kiel al mia respektata instruisto kaj spirita gvidanto.

Mi rememoras kiel antaŭ jaroj (kiel longe tio jam ŝajnas al mi!) mi skribis al vi stultan kaj entuziasman leteron super la tombo de Aĥilo; tio estis sur la sojlo de mia persa ekspedicio, kaj tiam mi ĵuris, ke mia modelo por

la vivo estos la brava Peleido. Mi revis nur pri heroeco kaj grandeco; mi jam havis post mi la venkon en Tracio kaj pensis, ke mi marŝas frunte de miaj Makedonoj kaj Helenoj kontraŭ Darion nur, por ke ni ornamu nin per laŭro, inda de niaj antaŭuloj, kiujn prikantis la dieca Homero. Mi povas diri, ke al mia idealo mi restis neniom ŝulda nek apud Ĥaironeja nek apud Granikos; sed hodiaŭ mi juĝas multe alie la politikan signifon de miaj tiaj agoj. Sobra vero estas, ke nia Makedonio, iel-tiel ligita kun Greklando, estis tiam de norde konstante minacata de tiuj barbaraj Tracoj; ili povus nin ataki en malkonvena momento, kion poste la Grekoj eluzus por nuligi siajn kontraktojn kaj apartiĝi de Makedonio. Simple estis necese humiligi Tracion, por ke Makedonio havu ŝirmitan flankon en kazo de greka perfido. Ĝi estis nura politika neceso, kara Aristotelo; sed tion via lernanto tiam ankoraŭ sufiĉe ne komprenis kaj fordonadis sin al revoj pri Aĥilecaj agoj.

Per la konkero de Tracio nia situacio ŝanĝigis; ni regis la tutan okcidentan bordregionon de la Egea Maro ĝis Bosforo; sed nian regadon super la Egea Maro minacis la surmara potenco persa; ekstarinte super Helesponto kaj Bosforo, ni troviĝis en konsiderinda proksimo de la suverena sfero persa. Pli-malpli frue devis inter ni kaj Persio okazi batalo pri la Egea Maro kaj libera navigado tra la Pontiaj Markoloj. Feliĉe mi ekatakis pli frue, ol Da-

rio povis sin prepari. Mi pensis, ke mi iras en la postsignoj de Aĥilo kaj por la greka gloro estos konkeranta novan Ilionon; sed fakte, kiel mi nun vidas, temis pri nepra neceso rebati Persion for de la Egea Maro; kaj mi ĝin forpuŝis, kara instruisto, tiel funde, ke mi okupis tutan Bitinion, Frigion kaj Kapadokion, elrabis Cilicion kaj ne haltis ĝis Tarso. Malgranda Azio estis nia. Ne nur la malnova Egea marĉo, sed la tuta norda bordo de Mediteraneo, aŭ, kiel ni diras, la Egipta Maro estis en nia posedo.

Vi dirus, mia kara Aristotelo, ke nun estis plene atingita la ĉefa politika kaj strategia celo, nome la fina forigo de Persio el la helenaj akvoj. Sed post la konkero de Malgranda Azio ekestis nova situacio; niaj novaj bordoj povus esti minacataj de sude, tio estas de Fenicio aŭ Egiptio; de tie Persio povus ricevi helptrupojn kaj materialon por plua militado kontraŭ ni. Estis do neeviteble okupi la bordojn Tirajn kaj ekregi Egiption; per tio ni iĝis mastroj de la tuta marregiono, sed samtempe kun tio elkreskis nova danĝero: ke Dario povus, apogita de sia riĉa Mezopotamio, invadi Sirion kaj tiel apartigi nian egiptan posedaĵon for de nia Malgrandazia bazo. Mi do devis frakasi Darion, estu kiel ajn; mi sukcesis tion apud Gaŭgamela; kiel vi mem scias, falis en niajn manojn Babilono kaj Suzo, Persepolo kaj Pasargadai. Per tio ni ekregis la Persan Golfon; sed por ke ni ĉi tiun novan pose-

daĵon protektu kontraŭ eblaj invadoj denorde, estis necese ekspedicii supren, kontraŭ la Medojn kaj Hirkanojn. Nun nia teritorio vastiĝis de la Kaspia Maro ĝis la Persa Golfo, sed ĝi restis senŝirma kontraŭ oriento; do mi marŝis kun miaj Makedonoj en la regionojn de Areia kaj Drangiane, mi dezertigis Gadrosion kaj senhomigis Araĥosion, post kio mi venke okupis Baktrion; kaj por ke mi sigelu la militan venkon per konstanta ligo, mi edzinigis al mi la Baktrian princidinon Roksana. Tio estis simpla politika neceso; mi konkeris por miaj Makedonoj kaj Grekoj tiom da orientaj landoj, ke vole-nevole mi devis akiri miajn barbarajn orientajn regatojn ankaŭ per mia reprezentado kaj pompo, sen kiuj la kompatindaj paŝtistoj ne scias prezenti al si potencon regnestron. Estas vero, ke mia malnova makedona taĉmento tion peze toleris; al ĝi ŝajnis, ke ĝia komandanto fremdiĝas al siaj militaj kamaradoj. Bedaŭrinde mi devis tiam ekzekutigi mian maljunan Filoton kaj Kalistenon; ankaŭ mia Parmeniono perdis la vivon. Mi tion ege bedaŭris; sed tio estis neevitebla, por ke ribelo de miaj Makedonoj ne endanĝerigu mian pluan paŝon. Mi estis ja preparanta en tiu tempo militan ekspedicion en Hindion. Sciu, Gadrosio kaj Araĥosio estas fermitaj en altmontaro same kiel en bastionoj; sed por ke ili estu nekonkerebla bastiono, ili bezonas antaŭteritorion, el kiu oni povas aŭ ekataki aŭ cedi en la bastionojn. Tiu strategia antaŭkam-

po estas Hindio ĝis la rivero Hinduso. Estis strategie necese okupi ĉi tiun teritorion kaj kun ĝi la transriveran terenon sur la alia bordo de Hinduso; neniu respondeca soldato aŭ politikisto agus alie; sed kiam ni estis apud la rivero Hyfasis, miaj Makedonoj komencis rezisti, ke ili ne plu iros pro laco, malsanoj kaj sopiro pri la patrio. Mi devis reveni; estis terura vojo por miaj veteranoj, sed ankoraŭ pli malbona por mi; mi intencis ĝisiri la Golfon Bengalan, por akiri en oriento naturan limon por mia Makedonio kaj nun mi estis devigita provizore cedi de mia tasko.

Mi revenis al Suzo. Mi povis esti kontenta, konkerinte por miaj Makedonoj kaj Helenoj tian regnon. Sed por ke mi ne bezonu fidi nur je miaj elĉerpitaj homoj, mi envicigis en mian armeon tridek mil Persojn; ili estas bonaj soldatoj kaj nepre mi ilin bezonas por la defendo de la orientaj limoj. Kaj vidu, miaj malnovaj soldatoj estas per tio ekstreme indignigitaj. Ili eĉ ne scias kompreni tion, ke akirinte por mia nacio orientan teritorion, centoble pli grandan ol nia patrio, mi iĝis granda reĝo de oriento; ke mi devas nomi miajn oficistojn kaj konsilistojn el la Orientanoj kaj ĉirkaŭigi min per orienta kortego; ĉio ĉi estas evidentaj politikaj necesoj, kiujn mi plenumas en la intereso de Granda Makedonio. La cirkonstancoj postulas de mi pluajn kaj pluajn personajn oferojn; mi portas ilin sen kontraŭdiroj, ĉar mi pensas pri la grandeco

kaj forto de mia amata patrio. Mi devas toleri la barbaran lukson de mia potenco kaj brilo; mi edzinigis al mi tri reĝidinojn de la orientaj regnoj; kaj nun, kara Aristotelo, mi iĝis eĉ dio.

Jes, mia kara instruisto: mi igis min proklami dio; miaj bonaj orientaj regatoj adoras min kaj alportas al mi oferdonacojn. Tio estas politika neceso, por ke mi havu konvenan aŭtoritaton super la montaraj paŝtistoj kaj kamelpelistoj. Kiel malproksimaj estas la tempoj, kiam vi instruis min uzi racion kaj logikon! Sed la racio mem ordonas akomodi siajn rimedojn al la homa malsaĝo. Unuavide mia kariero povas ŝajni al iu ajn fantazia; sed dum mi ĝin nun pririgardas en nokta trankvilo de mia dia laborejo, mi vidas, ke neniam mi ion entreprenis, kio ne estus nepre kondiĉita de mia antaŭa paŝo.

Rigardu, mia kara Aristotelo, estus en la intereso de trankvilo kaj ordo, en racia intereso politika, ke ankaŭ en mia okcidenta patrio mi estu agnoskita kiel dio. Libe-rigus miajn manojn ĉi tie en la oriento, se mi havus la certecon, ke mia Makedonio kaj Helaso akceptis la politikan principon de mia absoluta aŭtoritato; mi povus trankvile ekmarŝi por havigi al mia greka patrio naturan limon ĝis la bordo de Ĉinio. Per tio mi por eterne sekurigus la potencon kaj sendanĝerecon de mia Makedonio. Kiel vi vidas, ĝi estas modera kaj prudenta plano; jam delonge mi ne estas tiu fantaziulo, kiu ĵuris super la

tombo de Aĥilo. Se mi nun postulas de vi, ke vi, kiel mia saĝa amiko kaj gvidanto, filozofie preparu kaj akcepteblaj por miaj Grekoj motivigu mian proklamon je dio, mi tion faras kiel respondeca politikisto kaj ŝtatulo; al via konsidero estu lasite, ĉu vi la taskon volas plenumi kiel aferon prudentan, patriotan kaj politike necesan.

Salutas vin, mia kara Aristotelo, via

Aleksandro.

[1937]

La morto de Arĥimedo

Fakte la historio pri Arĥimedo ne estis precize tia, kiel oni ĝin priskribas; estas ja vere, ke li estis mortigita, kiam la Romianoj konkeris Sirakuzon, sed ne estas ĝuste, ke en lian domon penetris romia soldato por rabi, kaj ke Arĥimedo, absorbita per desegno de ia geometria problemo, al li ĉagrene ekmurmuris: "Ne difektu miajn cirklojn!" Unue Arĥimedo ne estis distra profesoro, ne scianta, kio okazas ĉirkaŭ li; male, li estis laŭ karaktero vera soldato, kiu inventadis por Sirakuzo militmaŝinojn por la defendo de la urbo; due, tiu romia soldato ne estis ebria rabanto, sed la klera kaj ambicia staba centestro Lucio, kiu sciis, kun kiu li havas la honoron, kaj ne venis rabi, sed salutinte soldate sur la sojlo, diris: "Estu sana, Arĥimedo."

Arĥimedo levis la okulojn de la vaksa tabuleto, sur kiu li vere ion geometrie desegnis, kaj diris: "Nu, kio?"

"Arĥimedo," diris Lucio, "ni scias, ke sen viaj militmaŝinoj ĉi tiu Sirakuzo estus defendinta sin eĉ ne monaton; tiamaniere ni devis okupi nin pri ĝi dum du jaroj. Ne pensu, ni soldatoj scias tion apreci. Brilegaj maŝinoj. Gratulon."

Arĥimedo mansvingis. "Mi petas vin, ĝi estas ja tutsimpla. Ordinaraĵ jĕtmekanismoj — nu, tia ludilo. Science ĝi ne havas konsiderindan valoron."

"Sed milite jes," opiniis Lucio. "Aŭdu, Arĥimedo, mi venis diri al vi, ke vi laboru kun ni."

"Kun kiu?"

"Kun ni Romianoj. Vi devas tamen vidi, ke Kartago dekadencas. Kial do helpi al ili! Nun ni abrupte finos kun Kartago, vi vidos. Vi devus prefere iri kun ni, vi ĉiuj."

"Kial?" murmuris Arĥimedo. "Ni Sirakuzanoj estas hazarde Grekoj. Kial ni devus iri kun vi?"

"Ĉar vi vivas en Sicilio kaj ni Sicilion bezonas."

"Kaj kial vi ĝin bezonas?"

"Ĉar ni volas regi super la Mediteraneo."

"Ha," diris Arĥimedo kaj observis enpense sian tabuleton. "Kaj por kio vi tion volas?"

"Kiu estas mastro de la Mediteraneo," diris Lucio, "estas mastro de la mondo. Tio estas ja klara."

"Ĉu vi devas esti mastroj de la mondo?"

"Jes. La misio de Romio estas iĝi mastro de la mondo. Kaj mi diras al vi, ke ĝi estos."

"Eble," diris Arĥimedo forviŝante ion sur la vakstabuleto. "Sed mi ne konsilus tion al vi, Lucio. Aŭdu, esti mastro de la mondo — iam ĝi kaŭzos al vi teruregan defendadon. Domaĝe pri la laboro, kiun vi havos kun ĝi."

"Estas egale; sed ni estos granda regno."

”Granda regno,” murmuris Arĥimedo. ”Se mi desegnas malgrandan cirklon aŭ grandan cirklon, ĝi estas tamen nur cirklo. Jen, denove limoj, neniam vi estos sen limoj, Lucio. Ĉu vi pensas, ke granda cirklo estas pli perfekta ol malgranda cirklo? Vi pensas, ke vi estas pli granda geometro, se vi desegnas pli grandan cirklon?”

”Vi grekoj konstante ludas per argumentoj,” oponis centestro Lucio. ”Jen ni, ni pruvas nian veron alie.”

”Per kio?”

”Per ago. Ekzemple ni konkeris vian Sirakuzon. Sekve Sirakuzo apartenas al ni. Ĉu ĝi estas klara pruvo?”

”Estas,” diris Arĥimedo kaj gratis sin per la grifelo en la haroj. ”Jes, vi konkeris Sirakuzon; sed ĝi jam ne estas kaj neniam plu estos tiu Sirakuzo, kia ĝis nun. Ĝi estis granda kaj glora urbo, homo; de nun neniam ĝi estos granda. Domaĝe pri Sirakuzo!”

”Sed Romio estos granda. Romio devas esti la plej forta en la tuta tera sfero.”

”Kial?”

”Por kapabli rezisti. Ju pli fortaj ni estas, des pli da malamikoj ni havas. Tial ni devas esti la plej fortaj.”

”Kio koncernas la forton,” murmuris Arĥimedo. ”Mi estas iome fizikisto, Lucio, kaj ion mi diros al vi. Forto blokas forton.”

”Kion ĝi signifas?”

”Estas tia leĝo, Lucio. Forto, kiu efikas al io, per tio

estas blokata. Ju pli fortaj vi estos, des pli da viaj fortoj por tio vi konsumos; kaj iam venos tempo —”

”Kion vi volis diri?”

”Ba nenion. Mi ne estas profeto, homido; mi estas nur fizikisto. La forto blokas forton. Nenion plu mi scias.”

”Aŭdu, Arĥimedo, ĉu vi volus labori por ni? Eĉ imagon vi ne havas, kiaj grandegaj ebloj apertiĝus al vi en Romio. Vi konstruus la plej fortajn militmaŝinojn en la mondo.”

”Vi devas pardoni, Lucio; mi estas maljuna homo kaj ankoraŭ mi volus ellabori unu aŭ du el miaj pensoj. Kiel vi vidas, ĵus mi ion ĉi tie geometrie desegnas.”

”Arĥimedo, ĉu ne logas vin konkuri kun ni la regadon super la mondo? — Kial vi silentas?”

”Pardonu,” murmuris Arĥimedo super sia tabuleto. ”Kion vi diris?”

”Ke homo, kiel vi, povus konkuri la mondregadon.”

”Hm, la mondregado,” diris Arĥimedo enpense. ”Vi ne rajtas koleri, sed mi havas ĉi tie ion pli gravan. Sciu, ion daŭran. Ion, kio vere ĉi tie restos.”

”Kio ĝi estas?”

”Atenton, ne forviŝu miajn cirklojn! Jen maniero, kiel elkalkuli areon de cirkla sektoro.”

Pli poste estis eldonita raporto, ke la dokta Arĥimedo perdis la vivon hazarde.

[1938]

La romiaj legioj

Kvar el la veteranoj de Cezaro, kiuj, trapasinte gaŭlan kaj britan militirojn, revenis kovritaj de gloro kaj kun plej granda triumfo, kiun iam la mondo vidis, do la kvar herooj, nome Bullio, eksdekestro, Lucio nomata pro sia malgraseco Macer, Sartor nomata Hilla, veterinaro de la dua legio, kaj fine Strobo el Gaeto, kunvenis en vinejo de sicilia Greko kaj granda fripono Onokrato, por komune rememori la grandajn kaj memorindajn milit-eventojn, kies atestantoj ili estis. Ĉar estis iom varmege, Onokrato metis por ili tablon surstraten, kaj tie la kvar soldatoj trinkis, laŭte parolante. Kiu mirus, ke baldaŭ amasiĝis ĉirkaŭ ili homoj el tiu strato, metiistoj, azenpelistoj, infanoj kaj virinoj kun beboj surbrake, por aŭskulti iliajn vortojn? Sciu, ke la gloraj agoj de la granda Cezaro tiam ankoraŭ estis vekantaj intereson de ĉiuj romiaj civitanoj.

”Do aŭskultu,” diris Strobo el Gaeto, ”kio okazis, kiam tie apud tiu rivero staris kontraŭ ni tridek mil Senonoj.”

”Atendu,” korektis lin Bullio, ”unue da tiuj Senonoj ne estis tie tridek mil, sed apenaŭ dek ok mil, kaj due, vi estis en la naŭa legio, kiu neniam staris kontraŭ la Senonoj. Tiam vi bivakis en tendaro en Akvitanio kaj ripara-

dis niajn botojn, ĉar ĉe vi soldatis nuraj botistaĉoj kaj botflikistoj. Do, kaj nun rakontu plu.”

”En tio vi eraras,” oponis Strobo. ”Sciu, tiam ni biva-kis en Lutecio. Kaj botojn ni riparigis al vi tiam, kiam vi ilin tratruis, fuĝante for de Gergovio. Tiam vi ricevis egan batadon, vi kaj la kvina legio, kaj vi ĝin meritis.”

”Tiel ne okazis,” diris Lucio, nomata Macer. ”La kvina legio neniam estis apud Gergovio. La kvina legio ricevis sur pantalonon jam apud Bibrakto, kaj de tiu tempo oni plu ne povis ĝin ien sendi, krom al manĝegado. Tio estis bela legio,” diris Macer, malproksimen forkraĉante.

”Sed kiu kulpis pri tio,” diris Bullio, ”ke la kvina legio venis apud Bibrakto en kaĉon. Estis avanconta la sesa, por ĝin alterni, sed la sesanoj ne emis, tiuj eskapuloj. Ĵus ili venis el Masilio, de la inoj —”

”Kia ideo,” oponis Sartor, nomata Hilla, ”la sesa legio eĉ ne estis apud Bibrakto; tiu venis en fronton nur apud Aksono, kiam komandis Galbo.”

”Vi tion komprenas, vi kastristo,” diras Bullio; ”apud Aksono estis la dua, tria kaj sepa legioj. La sesan jam de-longe la Eburonoj sendis al la panjoj.”

”Ĉio ĉi estas nura mensogo,” diris Lucio Macer. ”La vero nur estas, ke la dua legio, en kiu mi soldatis, batalis apud Aksono; la ceteron vi elpensis.”

”Ne babilu,” diris Strobo el Gaeto. ”Apud Aksono vi

ronkis en rezervo, kaj kiam vi vekigis, estis post la batalo. Forbruligi Cenabunon, tion vi sciis, kaj dishaki kelkcent civilulojn tial, ĉar ili pendumis tri akaparistojn, tion vi ankaŭ kapablis.”

”Cezaro ordonis tion al ni,” diris Macer ŝultrolevan-
te.

”Malvero,” ekkriis Hilla; ”tion ne ordonis Cezaro, sed Labieno. Nepre ne Cezaro, por tio li estis tro politikisto; sed Labieno estis soldato.”

”Galbo estis soldato,” diris Bullio, ”ĉar li ne timis; sed Labieno estis ĉiam duonmejlon post la fronto, por ke nenio okazu al li. Kie estis Labieno, kiam nin sieĝis la Nerveoj, he? Tiam falis nia centestro kaj mi kiel plej aĝa dekestro transprenis la komandon. Junuloj, mi diris, kiu retiriĝos je unu paŝo —”

”Kun la Nerveoj,” interrompis lin Strobo, ”estis nenio; ili pafis kontraŭ vin per stobiloj kaj glanoj. Sed pli malbona tio estis kun la Arvernoj.”

”Al diablo,” oponis Macer. ”La Arvernojn ni tute ne povis kuratingi. Homidoj, tio estis kvazaŭ kaptadi leprojn.”

”En Akvitanio,” diris Hilla, ”mi iam pafis cervon; sed ĝi estis tia ulo, kornaron ĝi havis kiel arbon, — du ĉevaloj ja devis ĝin treni en bivakon.”

”Bagatelo,” deklaris Strobo, ”sed en Britio, tie estis cervoj!”

”Tenu min,” ekkriis Bullio, ”jen Strobo volus kredigi al ni, ke li estis en Britio.”

”Sed ankaŭ vi tie ne estis,” rediris Macer. ”Hej, Onokrato, vinon! Mi diros al vi, ke mi ekkonis sufiĉe da mensoguloj, kiuj diradis, ke ili estis en Britio, sed mi kredis neniun.”

”Mi estis tie,” diris Hilla. ”Mi veturigis tien porkojn. Tie estis la sepa, oka kaj deka legioj.”

”Ne amuzu nin, homido,” oponis Strobo. ”La deka neniam estis pli malproksime ol en la Sekvana tendaro. Vi devis ĝin vidi, kiel ĝi venis brilciritita al Alesio. Sed tie ili ricevis batregalon, tiuj suĉemuloj.”

”Tie ni ĉiuj ricevis batregalon,” diris Bullio. ”Ni estis draŝitaj kiel sekalo, kaj tamen ni venkis.”

”Ne tiel estis,” oponis Macer. ”Entute ĝi ne estis tia granda batalo. Kiam mi matene eliris el la tendo —”

”Tiel ne estis,” diris Hilla. ”Apud Alesio komenciĝis jam nokte.”

”Ne parolu,” diris Bullio; ”komenciĝis, kiam ni finis la tagmanĝon; ni havis ŝafaĵon tiam —”

”Tio ne estas vero,” diris Hilla frapante la tablon.

”Apud Alesio ni havis bovaĵon, ĉar malsanetis niaj bovinoj. Neniu plu volis tion manĝi.”

”Mi diras, ke estis ŝafaĵo,” persistis je la sia Bullio.

”Tiam al ni venis de la kvina legio kapitano Longus —”

”Homido,” diris Macer.

”Longus estis ja ĉe ni, ĉe la dua, kaj apud Alesio li jam estis delonge mortinta. Ĉe la kvina estis Hirto.”

”Tio ne estas vero,” diris Hilla. ”Ĉe la kvina estis tiu — kiel li nomiĝis? — ha, Korda.”

”Ba ne,” asertis Bullio. ”Korda estis en Masilio. Longus li estis kaj punkto; li venis kaj diris, malbeninda pluvo —”

”Pru,” ekkriis Strobo. ”Ne tiel okazis. Apud Alesio tiam tute ne pluvis. Estis terura varmego, mi scias, kiel fetoris la porkaĵo.”

”Ŝafaĵo ĝi estis,” kriis Bullio, ”kaj pluvis! Do kaj venis al ni tiu Hirto kaj diris: Knaboj, ŝajnas al mi, ke venos akvo en niajn botojn. Kaj li pravis. Dudek horojn daŭris la batalo —”

”Ne tiel,” diris Macer. ”Post tri horoj ĉio estis finita.”

”Vi tre eraras,” diris Strobo. ”Ĝi daŭris tri tagojn, sed kun paŭzoj. La duan tagon ni malvenkis —”

”Ne estas ja vero,” deklaris Hilla. ”Ni malvenkis en la unua tago, sed la duan tagon ni denove venkis.”

”Sensencaĵo,” diris Bullio, ”ni tute ne venkis kaj volis jam kapitulaci, sed ili kapitulacis pli frue.”

”Tute ne estis tiel,” post tio Macer, ”ja neniu batalo okazis apud Alesio. Onokrato, vinon! Atendu, ion mi diros al vi: kiam ni sieĝis Avarikon —”

”Ja tiel ne okazis,” grumblis Bullio kaj ekdormis.

[1928]

Pri dek virtuloj

Kaj diris la Eternulo: Ĉar la kriadado de Sodom kaj Gomora estas granda kaj ilia pekado tre peza, tial Mi malsupreniros kaj rigardos, ĉu ili plene agas tiel, kiel estas la kriadado, kiu venis al Mi, aŭ ne; Mi sciiĝos.

Kaj Abraham alproksimiĝis kaj diris: Ĉu Vi ankaŭ pereigos virtulon kune kun malvirtulo? Eble ekzistas kvindek virtuloj en la urbo: ĉu Vi tiam pereigos kaj ne indulgos la lokon pro la kvindek virtuloj, kiuj estas en ĝi?

Kaj la Eternulo diris: Se Mi trovos en Sodom kvindek virtulojn en la urbo, Mi indulgos la tutan lokon pro ili.

Kaj Abraham respondis, dirante: Eble al la kvindek da virtuloj mankos kvin, ĉu Vi pereigos pro la kvin la tutan urbon? Kaj Li diris: Mi ne pereigos, se Mi trovos tie kvardek kvin. Kaj li plue parolis al Li kaj diris: Eble troviĝos tie kvardek? Kaj Li diris: Mi ne faros tion pro la kvardek. Kaj Abraham diris: Ne koleru, mia Sinjoro, ke mi parolos plue: Eble troviĝos tie tridek? Kaj Li diris: Mi ne faros, se Mi trovos tie tridek.

Kaj li denove diris: Jen mi ekkuraĝis paroli al mia Sinjoro: eble troviĝos dudek? Kaj Li diris: Mi ne pereigos pro la dudek.

Li diris ankoraŭ: Ne koleru, mia Sinjoro, ke mi parolos ankoraŭ nur unu fojon: Eble troviĝos tie dek? Kaj Li diris: Mi ne pereigos pro la dek. Kaj la Eternulo foriris, kiam Li ĉesis paroli kun Abraham; kaj Abraham reiris al sia loko. (Gen. 18, 20-23.)

Kaj reveninte al sia loko, Abraham vokis sian edzinon Sara kaj diris al ŝi: "Aŭdu, el la plej bona fonto mi tion havas, sed neniu rajtas tion ekscii. La Eternulo decidiĝis pereigi la Sodomanojn kaj Gomoranojn pro iliaj pekoj. Li mem diris tion al mi."

Kaj diris Sara: "Vidu, ĉu mi ne diradis tion jam delonge? Kaj kiam mi rakontis al vi, kio tie okazas, vi ankoraŭ pledis por ili kaj min alkriadis: 'Silentu, ne miksu vin en tion, ĉu tio rilatas vin?' Nun vi vidas tion, tion jam delonge mi diradis, tion oni povis atendi. Kiam mi antaŭ nelonge parolis pri tio kun la edzino de Lot, mi diris al ŝi: Sinjorino, kien tio kondukos? Kion vi pensas, ĉu la Eternulo pereigos ankaŭ la edzinon de Lot?"

Kaj respondante Abraham diris: "Ĝuste pri tio temas. Por tiel diri, je mia insistado la Eternulo konsentis indulgi Sodomon kaj Gomoran, se Li tie trovos kvindek virtulojn. Sed mi primarĉandis tion ĝis dek. Tial mi vokis vin, por ke ni kune elektu por la Eternulo dek virtulojn."

Kaj diris Sara: "Bone vi faris. La edzino de Lot estas mia amikino kaj Lot estas filo de via frato Haran. Mi ne diras, ke Lot estas virta, tion vi scias, kiel li incitis sian

servistaron kontraŭ vi, tion jam ne diru, Abraham, tio ne estis en ordo, li ne traktas vin sincere, sed li estas via nevo, kvankam Haran ne kondukis al vi tiel, kiel devus konduki denaska frato, sed tio jam apartenas al la familio.”

Kaj plue ŝi parolis dirante: ”Diru al la Eternulo, ke Li indulgu Sodomon. Mi jam estas tia, mi deziras nenion malbonan al iu. Miaj piedoj tremas ĉe ekpenso, ke tiom da homoj pereus. Iru kaj porpetu ĉe la Eternulo, ke Li kompatu ilin.”

Kaj respondis Abraham: ”La Eternulo kompatos, se Li trovos dek virtulojn. Mi pensas, ke ni povus al Li konsili, kiuj ili estas. Ni konas ja ĉiujn homojn, kiuj loĝas en Sodom kaj Gomora. Kial ni ne helpus al la Eternulo elserĉi dek virtulojn?”

Kaj diris Sara: ”Nenio pli facila ol tio. Eĉ dek, eĉ kvindek, eĉ cent virtulojn mi indikos al Li. La Eternulo scias, ke mi faros al neniu maljustaĵon. Do ni havas la Lot-edzinon kaj Loton, nevon vian, kvankam li estas falsa kaj enviema, sed li apartenas al la familio. Do jam du.”

Post tio diris Abraham: ”Kaj iliaj du filinoj.”

Sara post tio diris: ”Ne pensu, la pli aĝa, Jesĥa, estas malĉasta. Ĉu vi ne rimarkis, kiel ŝi antaŭ vi kokete fleksis la postajon? La edzino de Lot mem diris al mi: Jesĥa faras al mi zorgojn, mi ĝojos, kiam ŝi edziniĝos. La pli

juna ŝajnas esti pli modesta. Sed se vi pensas, do kalkulu kun ambaŭ.”

Kaj diris Abraham: ”Do ni jam havas kvar virtulojn. Kiun ni plue elektu?”

Kaj Sara respondis: ”Se vi kalkulas la du knabinojn, tiam vi devas alpreni ankaŭ iliajn fianĉojn, Jobabon kaj Seboimon.”

Sed Abraham diris: ”Kion vi opinias, Seboim estas ja filo de maljuna Dodanim. Ĉu filo de uzurulo povas esti virta?”

Kaj diris Sara: ”Abraham, faru tion, mi petas vin, por la familio. Kial Melĥa ne havu egale bravan fianĉon kiel tiu vantulino, Jesĥa? Ŝi estas honesta knabino kaj almenaŭ ne movas loge la koksojn antaŭ maljunaj parencoj, kiujn ŝi devas estimi.”

Kaj respondis Abraham: ”Estu, kiel vi diras. Do kun Jobab kaj Seboim ni havas jam ses virtulojn. Nun restas al ni trovi nur kvar.”

Kaj Sara diris: ”Tio jam estos facila. Atendu, kiu en Sodom ankoraŭ estas virta?”

Abraham post tio respondis: ”Mi dirus, ke la maljuna Naĥor.”

Kaj diris Sara: ”Mi miras, ke vi povas entute pri li paroli. Ĉu li ne dormas kun paganaj amorantinoj, kvankam li estas maljunulo? Vere pli virta ol Naĥor estas ja Sabataĥ.”

Tiam ekflamiĝis Abraham pro kolero kaj diris: "Sabataĥ estas falsĵurinto kaj idolservanto. Ne postulu de mi, ke mi proponu lin al la Eternulo inter la virtaj. Multe pli konsiderinda estus Elmodad aŭ Eliab."

Post tio diris Sara: "Aŭdu, por scii, Eliab adultis kun la edzino de Elmodad. Se Elmodad valorus ion, li forpelus sian edzinon, tiun ĉiesulinon, kien ŝi apartenas. Sed eble vi povus proponi Namanon, kiu pri nenio kulpas, ĉar li estas frenezulo."

Kaj respondis Abraham: "Namanon mi ne proponos, sed mi proponos Melĥielon."

Kaj diris Sara: "Se vi proponos Melĥielon, ne parolu kun mi. Ĉu ne mokis Melĥiel pri vi, ke vi havas filon ne kun mi, sed jes kun la malĉastulino Agar?"

Abraham post tio diris: "Mi ne proponos Melĥielon. Kion vi pensas, ĉu mi alprenu inter la virtajn Ezronon aŭ Jafelelon?"

Sara post tio respondis dirante: "Jafelel estas diboĉulo kaj Ezron rilatas kun prostituitinoj el Aĥad."

Kaj diris Abraham: "Mi proponos Efraimon."

Kaj Sara diris: "Efraim diras, ke lia estas la ebenaĵo Mamre, sur kiu sin paŝtas niaj gregoj."

Abraham post tio diris: "Maljusta estas Efraim. Mi proponos Ahiramon, filon de Jasiel."

Kaj diris Sara: "Ahiram estas amiko de Melĥiel. Se vi volas iun proponi, proponu Nadabon."

Respondis Abraham: "Nadab estas avarulo. Mi proponos Amramon."

Kaj Sara diris: "Amram volis dormi kun via publikulino Agar. Mi ne scias, kion tiel eksterordinaran li vidis je ŝi. Pli bona estas Asriel."

Kaj diris Abraham: "Asriel estas dando. Mi ne povas proponi al la Eternulo arlekenon. Nu, ĉu mi nomu al li Namuelon? Ne, ankaŭ Namuel ne indas tion. Mi ne scias, kial devus esti tiu ĝuste Namuel."

Sara poste diris: "Mi ne scias, kion vi havas kontraŭ Namuel? Li estas ja malsaĝa, sed pia."

Kaj diris Abraham: "Estu. Namuel estas la sepa."

Post tio Sara diris: "Atendu, Namuelon ellasu, ĉar li praktikas la pekon sodomon. Kiu ankoraŭ estas en Sodom? Permesu, ke mi rememoru: Kahat, Salfad, Itamar..."

Abraham post tio respondis: "Foriru ĉi tiu ideo de vi. Itamar estas mensogulo, kaj kio koncernas Kahaton kaj Salfadon, ĉu ili ambaŭ ne estas adeptoj de la malbenita Peleg? Sed eble vi konas iun virinon justan en Sodom. Mi petas, rememorigu al vi."

Kaj diris Sara: "Neniu estas."

Kaj afliktiĝis Abraham dirante: "Ĉu ne estas dek virtuloj en Sodom kaj Gomora, por ke la Eternulo pro ili indulgu tiujn belajn urbojn?"

Sara post tio diris: "Iru, Abraham, iru ankoraŭ unufoje

al la Eternulo, falu genuen antaŭ Lia vizaĝo, disŝiru vian veston kaj diru: Sinjoro, Sinjoro, mi kaj Sara, edzino mia, plorante petas Vin, ke Vi ne pereigu Sodomon kaj Gomoran pro iliaj pekoj.”

”Kaj diru al Li: Kompatu la pekan popolon kaj indulgu ilin ankoraŭ. Havu mizerikordon, Sinjoro, kaj lasu ilin vivi. Sed de ni, Eternulo, de ni homoj ne postulu, ke ni proponu al Vi dek virtulojn el tuta Via popolo.”

[1931]

Pseŭdo-Lot aŭ pri patriotismo

Kaj venis du anĝeloj en Sodomon vespere, kaj Lot sidis ĉe la pordego de la urbo. Kiam Lot ilin ekvidis, li leviĝis renkonte al ili kaj kliniĝis vizaĝaltere, kaj diris: "Mi petas vin, sinjoroj, envenu en la domon de via sklavo kaj pasigu la nokton kaj lavu viajn piedojn, kaj vi leviĝos matene kaj iros vian vojon." Kaj ili diris:

"Ne, ni pasigos la nokton sur la strato."

Kaj li tre petegis ilin, ke ili envenu al li: kaj kiam ili envenis, li faris al ili festenon, kaj bakis macojn: kaj ili manĝis.

Kaj ili diris al Lot: "Kiun vi havas ĉi tie? bofilon, aŭ viajn filojn, aŭ viajn filinojn, aŭ ĉiun ajn, kiun vi havas en la urbo, elirigu ilin el ĉi tiu loko: ĉar ni ekstermos ĉi tiun lokon, ĉar granda fariĝis ilia kriadado antaŭ la Eternulo, kaj la Eternulo sendis nin, por ĝin pereigi."

Lot embarasiĝis, aŭdinte tion kaj diris: "Kaj kial mi devus foriri de ĉi tie?" Post tio ili respondis al li: "Ĉar la Eternulo ne volas pereigi la virtulon."

Lot longe silentis, sed poste li diris: "Mi petas, sinjoroj, permesu, ke mi foriru kaj diru al miaj bofiloj kaj filinoj, ke ili preparu sin por vojaĝo." Ili respondis al li: "Faru tiel."

Kaj Lot eliris, kuris tra stratoj de la urbo kaj vokis al ĉiuj homoj: "Leviĝu, eliru el ĉi tiu loko: ĉar la Eternulo pereigos la urbon." Sed ili rigardis lin kiel ŝercanton.

Lot revenis hejmen, sed ne ekkuŝis, kaj meditis la tutan nokton.

Kaj kiam leviĝis la matenruĝo, la anĝeloj rapidigis lin, dirante: "Leviĝu, prenu vian edzinon kaj ambaŭ viajn filinojn, kiuj ĉi tie troviĝas: por ke ankaŭ vi ne pereu pro la krimeco de la urbo."

"Mi ne iros," diris Lot. "Pardonu al mi, sed mi ne iros. Mi pripensis tion dum la tuta nokto. Mi ne povas foriri, ĉar ankaŭ mi mem estas unu el la Sodomanoj."

"Vi estas virtulo," kontraŭdiris la anĝeloj, "sed ili estas malvirtuloj, kaj la kriadado de illaj agoj kolerigis la Eternulon. Kion vi havas kun ili?"

"Mi ne scias," diris Lot. "Ankaŭ pri tio mi meditis, kion mi havas kun ili; dum la tuta vivo mi akuzadis miajn samurbanojn kaj juĝis ilin tiel severe, ke nun estas al mi terure rememori tion: ĉar ili pereos. Kaj kiam mi venis en la urbon Segor, ŝajnis al mi, ke ĝiaj homoj estas pli bonaj ol la Sodomaj."

"Leviĝu," diris la anĝeloj, "vi iros en la urbon Segor, ĉar ĝi estos konservita."

"Kio estas por mi Segor?" respondis Lot. "Estas unu viro virta en Segor: kiam ajn mi parolis kun li, li estis akuzanta siajn samurbanojn, kaj mi malbenis la Sodo-

manojn pro iliaj kulpoj, sed nun mi ne povas foriri. Mi petas, lasu min.”

Kaj ekparolis anĝelo kaj diris: ”La Eternulo ordonis pereigi la Sodomanojn.”

”Estu Lia volo,” diris Lot mallaŭte. ”Mi pripensis dum la tuta nokto; kaj mi rememoris tiom da aferoj, ke mi ploris. Ĉu vi aŭdis iam kanti la Sodomanojn? Ne, vi ilin tute ne konas, ĉar alie vi ne venus tiel. Kiam la knabinoj iras tra la strato, ili balanciĝas en la koksoj kaj inter la lipoj zumas kanton; kaj ili ridas, kiam ili ĉerpas akvon per siteloj. Neniu akvo estas pli pura ol tiu el la putoj de Sodom; kaj neniu lingvo el la lingvoj sonas pli bele. Kiam ekparolas infano, mi komprenas lin; kvazaŭ li estus mia; kaj kiam li ludas, estas la sama ludo, kiun mi mem ludis, estante ankoraŭ malgranda. Kaj kiam mi ekploris, panjo konsolis min per la sodoma lingvo. Eternulo,” ekkriis Lot, ”kvazaŭ ĝi hieraŭ estus!”

”Pekis la Sodomanoj,” diris la alia anĝelo severe, ”kaj tial —”

”Ili pekis, mi scias,” interrompis lin Lot malpacience. ”Kaj ĉu vi almenaŭ vidis niajn metiistojn? Ili aspektas, kvazaŭ ili ludas; kaj kiam ili faris kruĉon aŭ tolon, tiam la koro eksaltas pro ĝojo, kiel bele ĝi estas farita. Estas homoj tiel lertaj, ke vi rigardus ilin dum la tuta tago; kaj kiam vi vidas ilin fari la plej malbonajn aferojn, doloras vin pli, ol se tion farus homo el Segor. Ĝi turmentas vin,

kvazaŭ vi mem partoprenus en ilia kulpo. Kiom helpas al mi mia virteco, se mi estas Sodomano? Juĝante Sodomon, vi juĝas min. Mi ne estas virta. Mi estas kiel ili. Mi ne foriros de ĉi tie.”

”Vi estos pereigita kun ili,” diris la anĝelo nubmiene.

”Eble; sed antaŭe mi provos, ke ili ne estu pereigitaj. Mi ne scias, kion mi faros; sed ĝis la lasta momento mi pensos, ke mi devas helpi al ili. Ĉu mi povas nur tiel foriri? Mi kontraŭas la Eternulon kaj tial Li ne plenumos mian peton. Se Li lasus al mi tri jarojn da tempo, aŭ tri tagojn, aŭ almenaŭ tri horojn! Kion signifus por Li tri horoj? Se Li hieraŭ estus sendinta al mi la sciigon: Foriru el ilia mezo, ĉar ili estas malvirtaj, — mi dirus al Li: Iomete indulgu, mi parolos ankoraŭ kun tiu kaj kun alia; mi juĝis ilin, anstataŭ iri inter ilin. Sed kiel mi povas foriri nun, kiam ili estas pereigotaj? Ĉu ankaŭ mi ne estas kulpa pri tio, ke ili troviĝas en tia situacio? Mi ne volas morti; sed estas por mi necese, ke ankaŭ ili ne mortu. Mi restos.”

”Vi ne savos Sodomon.”

”Mi scias, ke ne: ĉu ion mi kapablas? Sed mi provos ion, mi ankoraŭ ne scias kion; mi scias nur, ke mi devas resti. Ĉar mi juĝis ilin dum la tuta vivo tiel severe kiel neniun alian; ĉar mi portis kun ili la plej grandan pezon: iliajn erarojn. Eternulo, mi eĉ ne scias diri, kio ili estas

por mi; mi povas tion montri nur per tio, ke mi restos kun ili.”

”Viaj samlandanoj,” diris la anĝelo, ”estas tiuj, kiuj estas virtaj kaj kredas la saman Eternulon kiel vi; kaj la pekaj, la malpiaj kaj idolservantoj ne estas viaj samlandanoj.”

”Kial ili ne estus, se ili estas Sodomanoj? Vi tion ne komprenas, ĉar vi ne konas la voĉon de karno kaj argilo. Kio estas Sodom? Vi diras, ke ĝi estas urbo de malvirto. Sed kiam la Sodomanoj batalas, ili ne batalas por siaj malvirtoj, sed por io pli bona, kio estis aŭ estos; kaj ankaŭ la plej malbona povas morti por ĉiuj. Sodom, tio estas ni ĉiuj; kaj se mi havas ian valoron antaŭ la Eternulo, Li atribuu ĝin al Sodom kaj ne al mi. Kial mi ankoraŭ parolas? Diru al la Eternulo: Lot, Via servisto, starigos antaŭ la sodomajn virojn kaj defendos ilin kontraŭ Vi, kvazaŭ Vi estus lia malamiko.”

”Haltu,” ekkriis la anĝelo, ”terura estas via peko; sed la Eternulo vin ne aŭdis. Preparu vin kaj eliru el ĉi tiu urbo: savu almenaŭ la edzinon kaj la filinojn, kiujn vi havas.”

Kaj Lot ekploris: ”Jes, mi devas ilin savi, vi pravas. Mi petas, konduku min.”

Sed ĉar li malrapidis, tial ili kaptis lian manon kaj la manon de lia edzino kaj de liaj du filinoj, pro kompato de la Eternulo al li.

(Kiam li estis elkondukata, Lot preĝis, dirante:)

”Ĉio, kion la vivo donis al mi, donis al mi per viaj manoj; faris mian karnon el via argilo kaj metis en mian buŝon vortojn, kiuj estas en la buŝo de viaj viroj kaj virinoj; kaj jen, tial mi kisis ilin per ĉiu mia vorto, eĉ se mi ilin malbenis.”

”Mi vidas vin eĉ kiam mi fermas la okulojn, ĉar pli profunde vi estas ol miaj okuloj; vi estas en mi tiel, kiel mi estis en vi.”

”Miaj manoj faras viajn kutimojn, ne sciante pri tio; kaj se mi estus en la dezerto, miaj piedoj iros en la direkton de viaj stratoj.”

”Sodom, Sodom, ĉu vi ne estas la plej bela el la urboj? Kaj se mi nur fenestreton vidus, vualitan per tolo striita, mi ekkonos ĝin: ĉi tiu estas fenestreto de Sodom.”

”Mi estas kiel hundo, kiun oni kondukas el la domo de ĝia mastro; eĉ se ĝi mallevas la muzelon en polvon, por ne plu vidi, ĝi ekkonas la odoron de la objektoj, kiujn ĝi konas.”

”Mi kredis la Eternulon kaj Lian leĝon; vin mi ne kredis, sed vi estas; kaj aliaj landoj estas kvazaŭ ombro, kiun mi trapenetras, ne povante apogi min je muro aŭ je arbo; ili estas kvazaŭ ombro.”

”Sed vi estas, kiel nenio alia estas: kaj ĉio, kio ekzistas, ekzistas nur en komparo kun vi. Se mi vidas vin, mi vi-

das nur vin, kaj se mi vidas ion alian, mi vidas tion nur en komparado kun vi.”

”Mi kredis la Eternulon, ĉar ŝajnis al mi, ke li estis la dio de Sodom; se ne estas Sodom, ne estas la Eternulo.”

”Pordegoj, pordegoj de Sodom, kien ili min kondukas kaj en kian malplenen? Kien mi metu la piedon? Ĉar ne ekzistas sub mi la tero: kaj mi staras, kvazaŭ mi ne starus. Iru, miaj filinoj, kaj lasu min; mi ne povas plu.”

Kaj ili irigis lin kaj metis lin ekster la urbon: kaj tie ili parolis al li, dirante: ”Savu vin pro via animo, ne rigardu malantaŭen kaj haltu nenie en la tuta ĉirkaŭaĵo: por ke vi ne pereu.”

La suno leviĝis super la teron, kiam ili diris ĉi tion. Tiam la Eternulo pluvigis sur Sodomon kaj Gomoran sulfuron kaj fajron de la Eternulo el la ĉielo.

Tiam Lot rerigardis kaj ekkriis kaj kuris returne al la urbo.

”Kion vi faras, malbenita?” vokis post li la anĝeloj.

”Mi iras helpi al la Sodomanoj,” respondis Lot, kaj eniris la urbon.

[1923]

La sankta nokto

Mi miras pri vi,” kriis sinjorino Dinah. ”Se ili estus ordemaj homoj, ili irus al la urbestro kaj ne kva-zaŭ almozpetante! Kial ne akceptis ilin en la domon la Geŝimonoj? Kial ilin akceptu *ausgerechnet* ni? Ĉu ni estas io malpli bona ol la Geŝimonoj? Mi scias, la edzino de Ŝimon ne enlasus en sian domon tiajn nenihavulojn! Mi miras pri vi, homo, ke vi tiel kompromitas vin ne scias kun kiu!”

”Ne krii,” grumblis la maljuna Isaĥar, ”ja ili aŭdos tion!”

”Ili aŭdu tion,” diris sinjorino Dinah, altigante la voĉon ankoraŭ pli. ”Ne grave! Nu, estus bela ordo, se mi rajtus eĉ ne pepi pro iuj vaguloj! Ĉu vi konas ilin? Ĉu iu konas ilin? Li diras, ŝi estas mia edzino. Onidire, lia edzino! Mi scias, kiel ĝi estas praktikata ĉe tiaj vaguloj! Ĉu vi ne hontas enlasi ion similan en la domon!”

Isaĥar volis kontraŭdiri, ke li enlasis ilin nur en la stalon, sed li silentis; li ŝatis ja sian trankvilon.

”Kaj ŝi,” daŭrigis sinjorino Dinah indigne, ”ŝi estas graveda, volu scii. Pro Sinjoro Kristo, ankoraŭ tio mankis al ni! Jesuo Maria, se ni fariĝus temo por homaj kla-

ĉoj! Mi petas vin, kie vi perdis la kapon?” Sinjorino Dinah spirkaptis aeron. ”Memkomprene, al iu junulino vi ne scias diri ne. Kiam ŝi vin tiel dolĉe alokulis, do vi povis ŝiriĝi pro nura komplezo. *Al mi* vi tion ne farus, Isaĥar! Nur sternu al vi, hometoj, tie en la stalo estas abunde da pajlo — Kvazaŭ en la tuta Betlehemo estus sole ni, kiuj havas stalon! Kial la Geŝimonoj ne donis al ili faskon da pajlo? Ĉar la Ŝimonino ne tolerus tion de sia edzo, ĉu vi komprenas? Nur mi estas tia piedpremato, ĉar mi al ĉio silentas —”

La maljuna Isaĥar turniĝis al la muro. Eble ŝi ĉesos, li opiniis; parte ŝi pravas, sed tiom da paroloj pro unu fojo —

”Akcepti fremdajn homojn en la domon,” meditis sinjorino Dinah en justa kolero. ”Kiu scias, kio ili estas? Dum la tuta nokto mi nun pro timo ne fermas la okulojn! Sed vi estas indiferenta pri tio, ĉu? Por homoj vi ĉion, sed por mi nenion! Se almenaŭ unufoje vi respektus vian laborkonsumitan kaj malsanetan edzinon! Kaj matene, ankoraŭ fari ordon post ili! Se tiu homo estas ĉarpentisto, kial li ie ne laboras? Kaj kial ĝuste mi havu tiom da ĉagreno? Ĉu vi aŭdas, Isaĥar?”

Sed Isaĥar vizaĝe al la muro mienis, kvazaŭ li dormus.

”Virginjo Maria,” ekĝemis sinjorino Dinah, ”kian vivon mi havas! La tutan nokton mi ne povos dormi pro zorgoj — Kaj li dormas kiel ŝtupo! Ili povus forporti nian

tutan domon, kaj li dormaĉas ... Dio, kiajn malfacilaĵojn mi havas!”

Kaj estis silente, nur la maljuna Isaĥar atente artikigis la mallumon per sia ronkado.

Ĉirkaŭ la noktomezo vekis lin el la dormetado retenata virina ekĝemo. Hu, sakre, li ektimis, jen io apude en la stalo! Ĝi nur ne veku Dinah ... Kiom da paroloj estus denove!

Kaj li kuŝis senmove, kvazaŭ li dormus.

Post momento estis aŭdebla nova ĝemo. Dio, kompatu! Dio, donu, ke Dinah ne vekiĝu, preĝis en angoro la maljuna Isaĥar, sed jen li jam sentis, ke Dinah apud li moviĝas, leviĝas kaj streĉe aŭskultas. Estos malbone, diris al si konsternite Isaĥar, sed restis bele silenta.

Sinjorino Dinah senbrue leviĝis, metis sur sin lanŝalono kaj eliris en la korton. Versimile ŝi elĵetos ilin, diris al si senpove Isaĥar. Mi ne enmiksiĝos, ŝi jam faru kion ajn ŝi volas ...

Post strange longa kaj senbrua tempo revenis sinjorino Dinah, atenteme piedpinte paŝante. Al Isaĥar en la dormemo ŝajnis, ke kraketas kaj krakas ligno, sed li decidiĝis, ke li eĉ ne moviĝos. Eble estas malvarme al Dinah, li opiniis, kaj ŝi faras por si fajron.

Poste Dinah denove silente ŝteleliris. Isaĥar malfermetis la okulojn kaj vidis super la flagranta fajro kaldroneton kun akvo. Por kio ja, li diris al si mire, sed tuj de-

nove li ekdormis. Li vekigis nur, kiam sinjorino Dinah per strangaj, fervoraj kaj gravaj paŝetoj kuris kun la fumanta kaldroneto en la korton.

Kaj ekmiris Isaĥar, leviĝis kaj iomete sin vestis. Mi devas rigardi, kio okazas, li diris energie al si, sed en la pordo li karambolis kun Dinah.

Mi petas vin, kial tia kurado, li volis ekparoli, sed eĉ ne al tio li venis. "Nenio por via gapado ĉi tie," abruptis lin sinjorino Dinah kaj denove kuris en la korton kun iaj ĉifonetoj kaj tolpecoj surbrake. Sur la sojlo ŝi turniĝis. "Iru litten," ŝi ekkriis severe, "kaj ... ne ĝenu nin ĉi tie, ĉu vi aŭdas?"

La maljuna Isaĥar elŝoviĝis en la korton. Antaŭ la stalo li vidis senhelpe altiĝi larĝoŝultran viran staturon, kaj li ekiris al ĝi. "Jes ja," li murmuris kvietige. "Ŝi eligis vin, ĉu? Sciu, Jozefo, tiuj virinoj ..." Kaj por deturni la parolon for de ilia vira senpovo, li rapidis montri: "Rigardu, stelo! Ĉu vi jam vidis iam tian stelon?"

[1930]

Marta kaj Maria

Kaj dum ili vojaĝis, li eniris en unu vilaĝon; kaj virino, nomata Marta, akceptis lin en sian domon.

Kaj ŝi havis fratinon, nomatan Maria, kaj ĉi tiu sidis apud la piedoj de la Sinjoro, kaj aŭskultis lian parolon.

Sed Marta estis distrata pro multo da servado; kaj ŝi alproksimiĝis kaj diris: Sinjoro, ĉu vi ne zorgas pri tio, ke mia fratino lasis al mi servi sola? Diru do al ŝi, ke ŝi min helpu.

Sed la Sinjoro respondis kaj diris al ŝi: Marta, Marta, vi zorgis kaj klopodas pri multaj aferoj; sed unu afero estas necesa; kaj Maria elektis la bonan parton, kiu ne estos prenita for de ŝi.”

(Ev. de sankta Luko, 10, 38-42.)

Kaj tiun vesperon eniris Marta al sia najbarino Tamar, edzino de Jakobo Grünfeld, kiu kuŝis en postakuŝa tempo; kaj vidante, ke la fajro en la kameno estingiĝas, ŝi almetis ŝtipojn kaj eksidis ĉe la fajrujo, por ekflamigi la fajron. Kaj kiam ekflagris viglaj flamoj, tiu Marta rigardis en la fajron kaj silentis.

Kaj diris sinjorino Tamar: ”Vi estas bona, Marteta. Vi tiom zorgas, — mi tute ne scias, kiel rekompenci tion al vi.”

Sed Marta nek ion diris, nek deturnis siajn okulojn for de la fajro.

Tiam sinjorino Tamar demandis dirante: "Ĉu vere, Marteta, ke hodiaŭ estis ĉe vi Rabbi el Nazaret?"

Kaj Marta respondis: "Estis."

Kaj sinjorino Tamar interplektis la manojn kaj diris: "Certe vi ĝojis, fraŭlino Marta; mi scias, al ni Li ne irus, sed vi meritas tion, vi estas tiel bona mastrino —"

Tiam Marta kliniĝis al la fajro, impete ordigis la ŝtipojn kaj diris: "Mi diros al vi, sinjorino Tamar, prefere mi ne vidus min mem. Eĉ ideeto ne venis al mi, ke nun antaŭ la festoj — Bone, mi pensas, mi lavos la tolaĵon unue — Vi scias, nia Maria, kiom da lavotaĵo ŝi faras. Do la nelavitan tolaĵon mi ĵetas sur la amason, kaj subite "Bonan tagon, knabinoj", kaj Li staras sur la sojlo! Mi komencas voki "Maria, Maria, venu ĉi tien", sciu, por ke ŝi helpu al mi rapide forigi tiun amason da ĉemizoj. — Maria alflugas, taŭzita, kaj kiam ŝi Lin vidas, komencas krei kiel senigita de la prudento: "Majstro, Majstro, vi venis al ni?" kaj bum, jam ŝi estas antaŭ Li surgenu, plorsingultas, la manojn al Li kisas, — sinjorino Tamar, mi tiel hontis pro ŝi, kion nur la Majstro devis pensi, tia frenezeta histeriulino, kaj nun la malpuraj ĉifonoj ĉie, mi apenaŭ elvortis: "Majstro, sidiĝu," kaj kolektas la lavotaĵon; kaj Maria Lin tiras je la mano kaj singultas: "Majstro, parolu, diru al ni ion, Rabboni —" Konsideru, sinjo-

rino Tamar, ŝi diras al Li Rabboni! Kaj ĉie nura malordo, vi scias, kiel se oni lavas, eĉ balaite ne estis. Kion Li nur devis pensi pri ni!”

”Nu, sciu, Marteta,” konsolis ŝin sinjorino Grünfeld, ”iom da tiu malordo viroj preskaŭ ne atentis. Mi konas ilin.”

”Eĉ se jes,” deklaris Marta kun malmole fulmantaj okuloj. ”Ordo devas esti. Rigardu, sinjorino Grünfeld, kiam la Majstro tagmanĝis ĉe tiu doganisto, do Maria sciis lavi Liajn piedojn per larmoj kaj viŝi ilin per siaj haroj. Mi diros al vi, sinjorino Tamar, ion similan mi eĉ ne kuraĝus, sed almenaŭ puran plankon mi volus doni sub Liajn piedojn. Jes, tion jes. Kaj meti antaŭ Lin tiun belan tapiŝeton, ĉu vi scias, tiun el Damasko. Kaj ne malpuran lavotaĵon. Viŝi Liajn piedojn per larmoj kaj haroj, tion Maria scias; sed almenaŭ kombi sin, kiam Li venas, tion ne; kaj viŝi antaŭ Li la plankon, tion ankaŭ ne. Nur sidaĉi antaŭ Li kaj fari tielajn okulojn, kaj nun rakontu, Rabboni!”

”Kaj ĉu Li rakontis?” demandis avide sinjorino Tamar. ”Rakontis,” diris Marta malrapide. ”Li ridetis kaj parolis al Maria. Vi scias, mi unue zorgis forigi la lavotaĵon, kaj poste doni al Li iom da kaprina lakto kaj pecon da pano. — Li aspektis irlaca kaj elĉerpita; mi jam havis sur la lango, Majstro, mi alportos al Vi kusenojn, ripozu momenton, dormetu iom, ni estos silentaj kiel animetoj, ni

eĉ ne spiros, — sed vi scias, sinjorino Grünfeld, mi ne volis interrompi Lian parolon. Kaj tiel mi nur piedpinte iradis, por ke Maria komprenu, ke ni devas silenti, sed vane! ”Rakontu ankoraŭ, Majstro, mi petas, ankoraŭ ion,” kaj Li, bonulo, ridetis kaj parolis —”

”Aĥ, mi volus aŭdi, kion Li diris,” ekĝemis sinjorino Tamar.

”Ankaŭ mi, sinjorino Tamar,” Marta lakonis. ”Sed iu devis por Li malvarmigi la lakton, por ke ĝi estu freŝa. Kaj iu ankaŭ devis havigi iom da mielo por la pano. Kaj poste por momento iri al la Efraimoj — al Efraimino mi promesis, ke iam-tiam mi rigardos ŝiajn infanojn, se ŝi devas iri en foiron, — vi scias, sinjorino Grünfeld, tia maljuna fraŭlino, kiel mi, ankaŭ iam fariĝas por io bona. Se nia frato Lazaro almenaŭ estus hejme! Sed kiam Lazaro matene vidis, ke ni estas lavontaj, li diras: ”Knabinoj, nenio por mi, mi malaperos; sed vi, Marta, atentu, se pretere irus tiu spicisto el Libano, aĉetu por mi Brust-teon,” sciu, nia Lazaro estas iel malsana je brusto, sinjorino Tamar, tro li malgrasiĝas. Kaj tial mi senĉese pensis, ke Lazaro revenu, dum la Majstro estas ĉi tie, — mi kredas, sinjorino Grünfeld, ke Li resanigus nian Lazaron; kiam mi aŭdis ies paŝojn, jam mi kuregis antaŭ la domon kaj al ĉiu vokis: ”Sinjoro Aŝer, sinjoro Levi, sinjoro Iŝaĥar, se vi renkontus la fraton Lazaron, li tuj, sed tuj

venu hejmen!” Kaj ĉe tio mi devis elrigardi la spiciston — mi ne sciis, kion pli frue.”

”Tion mi konas,” diris sinjorino Grünfeld. ”La familio igas multe zorgi.”

”Ba, zorgoj,” parolis Marta. ”Sed jen, sinjorino Grünfeld, mi ankaŭ volus aŭskulti la vorton de Dio. Mi estas nur malsaĝa virino, tia servistino mi estas, mi diras al mi, iu devas tion fari, iu devas kuiri kaj lavi kaj ripari vestojn kaj balai, kaj se nia Maria ne emas tion — Ŝi ne plu estas tiel bela, kiel ŝi estis iam, sinjorino Tamar; sed ŝi estis tia belulino, ke — ke mi simple d e v i s al ŝi servi, ĉu vi scias? Kaj dume ĉiu pensas, ke mi estas malbona, sinjorino Grünfeld, vi tion scias, malbona kaj malfeliĉa virino povas nenion bone kuiri, kaj mi ne estas malbona kuiristino. Se Maria estas bela, Marta bone kuiru, nu ĉu mi ne pravas? Sed sinjorino Tamar, tion eble vi ankaŭ scias: iam oni por momento, nur por momenteto metas la manojn en la sinon, kaj poste venas al oni tiaj strangaj pensoj: ke eble iu al vi ion diros aŭ vin iele rigardos... kvazaŭ li estus al vi diranta: Filineto, vian amon vi preparas al ni; vin mem tutan vi donas al ni, per via korpo vi balaas kaj konservas ĉiun puron per la pureco de via animo: ni eniras vian domon, kvazaŭ tio vi mem estus. Marta, ankaŭ vi per via maniero multe amis —”

”Ba, estas tiel,” diris sinjorino Grünfeld. ”Kaj se vi

havas ses infanojn, Marteta, kiel mi, tiam vi tion des pli bone vidus.”

Tiam diris Marta: ”Sinjorino Grünfeld, kiam tiel subite venis Li, la Majstro Nazareta, mi preskaŭ konsterniĝis: eble — eble Li venas por diri tion belan, kion mi tiom da jaroj kvazaŭ atendis — kaj ĝuste en tian malordon! Mi havis la koron ĝis en mia gorĝo, paroli mi ne povis — Mi diris al mi: tio pasos, mi estas malsaĝa virino, dume mi trempos la lavotaĵon kaj por momento venos al la Efraimanoj kaj venigos nian Lazaron kaj forpelos el la korto la kokinojn, por ke ili ne ĝenu Lin — Kaj poste, kiam ĉio estis en ordo, venis al mi tia bela certeco: ke nun mi estas preparita por aŭdi la vortojn de Dio. Do mi silente, silentege eniris la ĉambron, kie Li sidis kaj parolis. Maria sidis ĉe Liaj piedoj, la okulojn ŝi ne mallevis de li —” Marta seke ekridis. ”Mi nur ekhavis ideon, kiel mi aspektus, se mi Lin tiel okulegus! Kaj jen Li, sinjorino Grünfeld, tiel milde kaj serene min alrigardis, kvazaŭ Li volus ion diri. Kaj subite mi vidas — Dio, kiel malgrasa Li estas! vi scias, nenie Li ion kvalitan manĝas, Li preskaŭ eĉ ne tuŝis la panon kaj mielon — Kaj jen mi ekpensis: kolombidojn! Mi faros al Li kolombidojn! Mi irigos Marian, ke ŝi alportu ilin el la foiro, kaj dume Li momenton ripozos — ’Manjo,’ mi diras, ’iru por momento en kuirejon.’ Sed Maria nenion, kvazaŭ ŝi estus blinda kaj surda.”

”Ŝi nur ne volis lasi la gaston en soleco,” diris kvietige sinjorino Tamar.

”Se ŝi prefere atentus,” diris senkompate Marta, ”ke Li havu ion por manĝi; por tio estas ni virinoj, nu ne? Kaj kiam mi vidis, ke Maria nenion faras, nur rigardas kva-zaŭ en ekstazo, — do — sinjorino Tamar, mi eĉ ne scias, kiel ĝi okazis, sed mi devis tion diri. ”Sinjoro,” mi diras, ”al vi estas indiferente, ke mia fratino lasas min servi sola! Diru al ŝi, ke ŝi helpu al mi en la kuirejo!” Do iel ĝi elglitis el mi —”

”Nu, kaj ĉu Li diris al ŝi?” demandis sinjorino Grünfeld.

Tiam ekfluis larmoj el bluaj okuloj de Marta. ”Marta, Marta, zorgema vi estas kaj zorgas pri multaj aferoj: sed unu estas necesa, Maria elektis la pli bonan parton, kaj tiun neniu prenos for de ŝi. — Iel simile, sinjorino Tamar, Li tion diris.”

Momenton estis silente. ”Kaj jam ĉio, kion Li diris?” demandis sinjorino Tamar.

”Ĉio, laŭ mia scio,” diris Marta, forviŝante malmilde la larmojn.

”Poste mi iris aĉeti la kolombidojn — ŝtelistoj estas en la foiro, sinjorino Grünfeld — kaj mi rostis ilin, kaj por vi mi pretigis la supon el la kolombaj tripoj —”

”Mi scias,” diris sinjorino Grünfeld. ”Vi estas tre bona, Marteta.”

”Mi ne estas,” krudis Marta. ”Vi devas scii, estis unuafoje, ke mi rostis la kolombidojn ne sufiĉe. Ili estis malmolaj: sed mi — ĉio faladis el miaj manoj. Kaj mi tiel ege kredas Lin, sinjorino Tamar!”

”Ankaŭ mi,” diris pie sinjorino Tamar. ”Kaj kion alian Li diris, Marteta? Kion Li diris al Maria? Kion Li instruis?”

”Mi ne scias,” diris Marta. ”Mi demandis Marian, sed vi scias, kiel fola ŝi estas — ”Mi ne plu scias,” ŝi diris, ”je mia animo, jam mi ne povas honeste diri al vi eĉ unu vorton, sed estis tiel mirige bele, Marta, kaj mi estas tiel treege feliĉa.”

”Tio ankaŭ havas sian valoron,” agnoskis sinjorino Tamar.

Kaj Marta brue mungis la larmojn kaj diris: ”Do montru, sinjorino Grünfeld, mi revindos al vi tiun bebaĉon.”

[1932]

Lazaro

Ankaŭ en Betanion venis la famo pri tio, ke la Galileo estis kaptita kaj forkondukita en malliberejon.

Kiam Marta aŭdis tion, ŝi interplektis la manojn kaj el ŝiaj okuloj ekfluis larmoj. "Vidu," ŝi diris, "mi tion diradis. Kial Li iris Jerusalemon, kial Li ne restis ĉi tie? Ĉi tie neniu sciis pri Li — Li povus ĉi tie trankvile ĉarpentisti — Li establu laborojn ĉe ni en la korto —"

Lazaro estis pala kaj liaj okuloj ekscite flamis. "Kiaj malsaĝaj paroloj, Marta," li diris. "Li devis iri en Jerusalemon. Li devis kontraŭstari tiujn ... tiujn farizeojn kaj leĝistojn, li devis diri rekte en la okulojn, kion kaj kiel. — Tion vi, virinoj, ne komprenas."

"Mi tion komprenas," diris Maria mallaŭte kaj ravite.

"Kaj mi diras al vi, mi scias, kio okazos. Okazos miraklo. Li movos fingron kaj la muroj de la malliberejo malfermiĝos — kaj ĉiu Lin ekkonos, genufalos antaŭ Li kaj vokos, 'miraklo' —"

"Longe vi atendas," diris Marta deprimate. "Li neniam sciis zorgi pri si. Nenion por si Li faros, per nenio Li helpos al si, sole —" ŝi aldonis kun larĝigitaj okuloj,

”sole, se aliaj helpus al Li. Eble Li atendas, ke oni venos al Li helpi — vi ĉiuj, Lin aŭdintaj — ĉiuj, al kiuj Li helpis — ke ili zonos sin kaj alkuros —”

”Jen mia penso,” deklaris Lazaro. ”Nur ne timu, knabinoj, kun Li estas la tuta Judujo. Estus bela afero, se — tion mi volus vidi — Marta, preparu la aĵojn por vojaĝo. Ek al Jerusalemo.”

Maria leviĝis. ”Ankaŭ mi iras. Por vidi, kiel malfermiĝos la muroj de la malliberejo, kaj Li aperos en ĉiela brilo — Marta, ĝi estos fenomeno.”

Marta volis ion diri, sed glutis ĝin. ”Iru nur, infanoj,” ŝi diris. ”Iu devas ĉi tie gardi — manĝigi la kortbirdaron kaj kaprinojn — Mi tuj preparos al vi la vestojn kaj flanojn. Tiel mi ĝojas, ke vi estos tie.”

Kiam ŝi revenis ruĝeta pro la fornoardo, Lazaro estis palega kaj maltrankvila.

”Ne estas bone al mi, Marteta,” li murmuris. ”Kiel estas ekstere?”

”Bele varme,” diris Marta. ”La irado estos agrabla.”

”Varme, varme,” oponis Lazaro. ”Sed supre en Jerusalemo ĉiam blovas malvarma vento.”

”Mi preparis por vi varman mantelon,” diris Marta.

”Varman mantelon,” grumblis Lazaro malkontente. ”Oni ŝvitas en ĝi, poste ĉirkaŭblovas malvarmo, kaj jen! Tuŝu min, ĉu mi ne havas jam nun febron? Vi scias, mi ne ŝatus dumire ekmalsani — oni ne povas fidi je Maria

— Kiel mi povus helpi al Li, se mi ekzemple malsaniĝus?”

”Vi ne havas febron,” kvietigis lin Marta kaj pensis: Mia Dio, tiu Lazaro estas tiel stranga de tiu tempo — de tiu tempo, kiam li estis revivigita.

”Tiam min kaptis ankaŭ malbona vento, kiam — kiam mi tiel ekmalsanis,” diris Lazaro zorgeme; li ne ŝatis ja mencii sian iaman morton. ”Vi scias, Marieta, de tiu tempo mi iel ne estas en mia haŭto. Nenio por mi, tiu vojaĝo kaj la ekscitado. — Sed memkomprene, mi iros, tuj kiam nur pasos la febro.”

”Mi scias, ke vi iros,” diris Marta kun peza koro. ”iu devas kuri al Li por helpi; vi scias, vin Li — sanigis,” ŝi diris hezite, ĉar ankaŭ al ŝi ŝajnis iel netakte paroli pri revivigo el morto. ”Rigardu, Lazaro, post kiam vi liberigos Lin, vi povos Lin almenaŭ peti, ke Li helpu al vi, se eble vi ne fartus bone —”

”Vi pravas,” elspiris Lazaro. ”Sed kio, se mi tien ne alvenus? Kio, se ni jam venus malfrue? Vi devas konsideri ĉiujn eventualojn. Kaj kio, se en Jerusalemo oni iel interbatiĝos? Knabino, vi ne konas romiajn soldatojn. Aĥ Dio, se mi estus sana.”

”Vi ja estas sana, Lazaro,” eligis el si Marta. ”Vi devas esti sana, se Li vin sanigis.”

”Sana,” diris Lazaro amare. ”Tion ja mi mem scias, ĉu mi estas sana aŭ ne. Mi diras al vi nur, ke de tiu tem-

po eĉ ne por momento estis al mi bone — Ne, ke mi ne estus ege danka al Li pro tio, ke Li min ... restarigis; tion pri mi, Marta, ne pensu; sed kiu tion iam ekkonis, kiel mi, tiu — tiu —” Lazaro ekstremis kaj kovris sian vizaĝon. ”Mi petas vin, Marta, nun lasu min; mi rekonsciigoŝ — mi nur momenton — certe ĝi pasos —”

Marta silente eksidis sur la korto; ŝi rigardis antaŭ sin per sekaj, fiksjaj okuloj, manojn interplekte, sed ŝi ne preĝis. Nigraj kokinoj haltis, por ŝin rigardi per unu okulo; kiam kontraŭ atendo ŝi ne ĵetis al ili grajnoj, ili iris dormeti en la tagmeza ombro.

Tiam Lazaro kaŝiris el la koridoro, morte pala, kaj dentklakis. ”Mi — mi nun ne povas, Marta,” li balbutis, ”tiel ŝate mi irus — eble nur morgaŭ —”

La gorĝo de Marta kuntiriĝis. ”Iru, iru kuŝiĝi, Lazaro,” ŝi pene elvortis. ”Vi — vi ne povas iri!”

”Mi irus,” dentklakis Lazaro, ”sed se vi pensas, Marteta — Eble morgaŭ — Sed vi ne lasos min hejme sola, ĉu? Kion mi farus ĉi tie sen vi!”

Marta leviĝis. ”Nur iru dormi,” ŝi diris per sia kutima kruda voĉo. ”Mi restos ĉe vi.”

Tiumomente eniris la korton Maria, vojaĝpreta. ”Do, Lazaro, ĉu ni iros?”

”Lazaro ne povas iri,” respondis Marta seke. ”Ne estas bone al li.”

”Do mi iras sola,” elspiris Maria. ”Vidi la miraklon.” El

la okuloj de Lazaro malrapide fluis larmoj. ”Mi tiel ŝatus kuniri, Marteta, se mi nur tiom ne timus ... ankoraŭ unufoje morti!”

[1932]

Pri kvin panoj

Kion mi havas kontraŭ li? Mi tion diros al vi rekte, najbaro: ne ke mi havus ion kontraŭ lia instruo. Tute ne. Foje mi aŭskultis lian predikon, kaj mi diras al vi, preskaŭ mi ankaŭ iĝus lia disĉiplo. Tiam mi revenis hejmen kaj diris al mia kuzo selisto, vi, tion vi devus aŭdi; mi diras al vi, li estas siaspeca profeto. Ege bele li parolas, ververe; preskaŭ moliĝas en la homo la koro; mi havis tiam larmoplenajn okulojn, plej volonte mi fermus mian butikon kaj sekvus lin, por perdi lin neniam for de la okuloj. Ĉion disdonu, kion vi havas, li diris, kaj sekvu min. Amu vian proksimulon, helpu al la malriĉuloj kaj pardonu al tiuj, kiuj maljuste traktas vin, kaj tiajn aferojn. Mi estas ordinara bakisto, sed kiam mi aŭskultis lin, estis en mi tia stranga ĝojo kaj doloro, mi ne scias, kiel diri tion: ia pezo, ke mi genuus teren kaj plorus, kaj ĉe tio mi sentis min tiel bele kaj facile, kvazaŭ ĉio falus de sur mi, sciu, ĉia zorgo kaj kolero. Do mi tiam diris al mia kuzo, vi malsaĝulo, vi devus honti; vi parolas nur pri avidaĵoj, kion kiu ŝuldas al vi, ke vi devas pagi dekonuojn kaj alpagojn kaj interezojn; se vi prefere disdonus al la

malriĉaj ĉion, kion vi havas, forlasus la edzinon kaj infanojn kaj sekvas lin —

Kaj tion, ke li kuracas malsanulojn kaj demon-obseditojn, ankaŭ tion mi ne riproĉus al li. Vere, ĝi estas stranga kaj nenatura potenco; sed tion ja tamen ĉiu vidas, ke niaj kirurgoj estas fuŝuloj kaj la romiaj ne estas pli bonaj; monon ili scias preni, sed kiam vi vokas ilin al agonianto, do ili nur ŝultrolevas kaj diras, ke vi devis voki ilin pli frue. Pli frue! Mia mortinta edzino malsanis du jarojn pro hemoragio; mi kondukadis ŝin al doktoroj, vi eĉ ne havas ideon, kiom da mono ĝi kostis, kaj neniu helpis ŝin. Se li jam estus tiam trairanta urbojn, mi estus genufalinta antaŭ li kaj dirus: Sinjoro, resanigu la edzinon! Kaj ŝi tuŝus lian veston kaj resaniĝus. Tiom ŝi, la povrulino suferis, ke tio eĉ ne estas eldirebla. — Do mi laŭdus tion al li, ke li resanigas malsanulojn. Memkomprene, la fuŝkirurgoj protestas kontraŭ tio, kaj iuj diras, ke ĝi estas mistifiko kaj fuŝado, kaj volus tion malpermesi al li kaj tiel simile; ekzistas ja diversaj interesoj. Kiu volas helpi al la homoj kaj savi la mondon, ĉiam kolizias kun ies intereso; ne al ĉiu li povas plaĉi, io alia ne eblas. Mi diras, resanigadi li povas kaj eble ankaŭ mortintojn li revivigadu; sed tion kun la kvin panoj, tion li ne devis fari. Kiel bakisto mi diras al vi, ke ĝi estis granda maljustaĵo kontraŭ la bakistoj.

Vi ne aŭdis tiun aferon pri la kvin panoj? Mi miras;

ĉiuj bakistoj estas tute konsternitaj pro la okazo. Do, laŭdire venis al li granda amaso en lokon dezertan, kaj li resanigadis malsanulojn. Kaj kiam vesperiĝis, alpaŝis al li liaj disĉiploj, dirante: "Dezerta estas ĉi tiu loko, kaj la tempo malfrua. Forsendu la amasojn, por ke ili irante en urbetojn, aĉetu al si manĝaĵojn." Kaj li diris al ili: "Ne estas bezonate, ke ili foriru, vi donu manĝon al ili." Kaj ili diris al li: "Ni ne havas ĉi tie pli ol kvin panojn kaj du fiŝojn." Kaj li diris al ili: "Alportu ilin al mi ĉi tien." Kaj ordoninte al la hom-amaso sidiĝi sur la herbo kaj preninte la kvin panojn kaj du fiŝojn, li ekrigardis al la ĉielo, benis, kaj dividante, donis al la disĉiploj la panojn kaj la disĉiploj al la hom-amasoj. Kaj ĉiuj manĝis kaj estis satigitaj. Kaj oni plenigis per la restintaj paneroj dek du plenajn korbojn. Da tiuj, kiuj manĝis, estis proksimume kvin mil viroj krom virinoj kaj infanoj. Konsentu, najbaro, ke tion toleri povas neniu bakisto; kiel oni povus, nu? Se devus iĝi kutimo, ke kiu ajn per kvin panoj kaj du fiŝetoj satigus kvin mil homojn, poste la bakistoj devus iri sin paŝti, ĉu mi ne pravas? Kio koncernas la fiŝetojn, estu tiel, ili kreskas en la akvo per si mem kaj povas ilin kapti kiu ajn. Sed bakisto devas kare aĉeti farunon kaj lignon, devas havi helpanton kaj pagi al li salajron; li devas havi butikon, devas pagi impostojn kaj ĉion eblan, ĝis fine li ĝojas, se restis al li unu groŝo en la poŝo, por ke li ne bezonu almozi. Kaj li, li nur la ĉielon alrigardas

kaj havas sufiĉe da pano por kvin mil aŭ kiom da homoj; faruno kostas al li neniom, li ne bezonas alveturigi al si dioscias de kie lignon, neniam elspezoj, nenia laboro — memkomprene, tial la panojn li povas donadi al la homoj senpage, ĉu ne? Kaj li ne atentigas, ke per tio la ĉirkaŭajn bakistojn li senigas pri honeste meritita profito! Mi diras al vi, nelojala konkurenco ĝi estas, kaj oni devus finiĝi tion al li. Li pagu impostojn kiel ni, se li volas bakistadi! Jam nun riproĉas nin la homoj kaj diras, kiel eble, tian nekristanan monon vi volas por ĉi tiu mizera panbulo? Senpage vi devus ĝin donadi, kiel li, kaj kia pano, onidire, ĝi estis: blanka, krakanta kaj bonodora, ke oni emus per ĝi mortsatigi. — Ni jam devis malaltigi la prezon de bakaĵo; je mia honoro, ni donas ĝin sub la produkta prezo, nur por ne devi fermi la butikojn; sed kien tio kondukos, super tio turniĝas al ni bakistoj la kapo. Onidire en alia loko li satigis kvar mil virojn krom virinoj kaj infanoj per sep panoj kaj kelkaj fiŝetoj; sed tie ili kolektis nur kvar korbojn da paneroj; verŝimile tiu entrepreno ankaŭ al li jam ne tiel bone prosperas, sed nin bakistojn li nepre pereigos. Kaj ĉi tie mi diras al vi, ke li tion faras nur pro malamikeco al ni bakistoj. La fiŝkomercistoj ja ankaŭ krias, sed tiuj ja ne scias, kiom postuli por siaj fiŝoj; ĝi jam delonge ne estas tiel honesta metio kiel la bakista.

Rigardu, najbaro: mi jam estas maljuna homo kaj mi

estas sola en la mondo; mi havas nek edzinon, nek infanojn, kion do mi bezonas. Antaŭ nelonge mi jam diris al mia helpanto, ke li mem ligu al sia kolo mian bakejon. Ne temas pri mia profito; per mia animo, plej volonte mi vere disdonus mian etan havaĵon kaj sekvus lin kaj reeligadus amon al la proksimulo kaj ĉion, kion li predikas. Sed vidante, kiel li stariĝis kontraŭ ni bakistoj, mi diras al mi: Nepre ne! Mi kiel bakisto vidas, ke ĉi tio estas nenia mondsavo, sed kompleta katastrofo por nia metio. Mi bedaŭras, sed tion mi ne donacos al li. Ne eble.

Memkomprene, ni prezentis plendon kontraŭ li al Anas kaj ankaŭ al la provincestro, nome pro rompo de la metia regularo kaj pro ribeligado: sed vi scias, kiel ĉe la oficoj ĉio estas longe prokrastata. Vi konas min, najbaro: mi estas modera homo kaj serĉas malpacon kun neniuj; sed se li venos en Jerusalemon, mi stariĝos surstrate kaj vokos: Krucumu lin! Krucumu lin!

[1937]

Benĥanan

ANAS

Vi demandas, Benĥanan, ĉu li kulpas. Jen la afero: mi ne kondamnis lin al morto, mi nur sendis lin al Kajafas. Kajafas diru al vi, kian kulpon li trovis ĉe li, min persone la afero ne rilatas.

Mi estas maljuna praktikulo, Benĥanan, kaj diros tion al vi tute sincere. Mi pensas, ke lia instruo havis ie-tie bonan kernon. Tiu homo multe pravis, Benĥanan, kaj opiniis tion honeste; sed lia taktiko estis malĝusta. Tiel li povis neniam venki. Prefere li devis tion verki kaj libre eldoni. Oni legus la libron kaj dirus, ĝi estas malforta aŭ afekta libro, ĝi enhavas nenion novan kaj kiu scias kion, kiel jam oni tiel pri libroj parolas. Sed post iom da tempo komencus pri io aŭ tio skribi aliaj kaj post ili denove aliaj, nu, kaj almenaŭ io enradikiĝus. Ne ĉio, ne la tuta instruo, sed tion ja prudenta homo eĉ ne postulas. Sufiĉas, se li akceptigas almenaŭ unu aŭ du siajn ideojn. Tiel oni ĝin faras, kara Benĥanan, kaj alie ĝi ne estas ebla, se oni volas reformi la mondon. Kun tio oni devas agi pacience kaj delikate. Mi diras, ĝusta taktiko necesas; kia vero, se ni ne scias ĝin akceptigi?

Lia eraro estis ĝuste tio, ke li ne havis paciencon. Li volis savi la mondon tuj tuj, kaj kontraŭ ties volo. Kaj tio ne eblas, Benĥanan. Li devis agi ne tiel rekte kaj haste. La veron oni devas kontrabandi, oni devas ĝin ŝuteti poio me, ie peceton, tie peceton, por ke la homoj kutimiĝu al ĝi. Kaj ne subite: disdonu ĉion, kion vi havas kaj tiaj paroloj. Tio estas malbona metodo. Kaj li devus pli atenti, kion li faras. Ekzemple, kiel li iris kun rimeno kontraŭ la monŝanĝistoj en la templo — ili estas ja ankaŭ bonaj Judoj, homido, kaj volas per io vivteni sin. Mi scias, ke monŝanĝejoj ne apartenas en la templon, sed ili estis tie de ĉiam, do kiaj ceremonioj? Li devis prezenti kontraŭ ili plendon ĉe la sindrio, kaj finite. La sindrio eble ordonus al ili, ke ili metu siajn tablojn je distanceto pli malproksimen kaj ĉio estus en ordo. Ĉiam estas grave, kiel oni ion faras. Homo, kiu volas ion en la mondo atingi, neniam devas perdi la kapon kaj devas sin regi, devas ĉiam konservi sangmalvarman kaj sobran menson. Kaj liaj mitingoj — vi scias, Benĥanan, neniu instanco ŝatas tion vidi. Aŭ, ke li lasis sin tiel bonvenigi, kiam li venis en Jerusalemon; vi eĉ imagon ne havas, kiom da malbona sango ĝi kaŭzis. Li devus altroti piede kaj saluti ie, saluti tie — tiel oni devas tion praktiki, se oni volas havi influon. Mi eĉ aŭdis, ke li igis sin regali de romia doganisto, sed tion mi tute ne kredas, tian mallertaĵon li tamen ne farus; jen kiaj malicaj klaĉoj. Kaj li devis ne

fari siajn miraklojn; per tio li nature koliziis. Mi petas vin, al ĉiuj li ne povas helpi, kaj tiuj, al kiuj li faris nenium miraklon, poste koleregas. Aŭ kun la virino adultinta — tio laŭ inidiro vere okazis, Benĥanan, kaj ĝi estis terura eraro. Diri al la homoj juĝistaj, ke ankaŭ ili ne estas sen kulpo — ĉu povus poste ekzisti en la mondo ia justico? Mi diras al vi, nuraj eraroj. Li devis nur instrui kaj ne fari miraklojn, li devis ne opinii sian instruon tiel ege laŭvorte, li devis ne voli ĝin tujtuje realigadi. Li mistaktike agis, kara Benĥanan; inter ni dirite, en multaj sferoj li povis esti prava, sed lia taktiko estis erara; nu poste ĝi ne povis alie finiĝi.

Ne cerbumu super tio, Benĥanan; estas en ordo. Li estis justa viro, sed se li volis savi la mondon, li devus fari tion ne tiel radikale. Kio, ĉu li estis kondamnita rajte? Kia demando! Mi diras ja al vi, ke taktike li devis malvenki!”

KAJAFAS

Sidiĝu, kara Benĥanan, mi estas plene al via dispono. Do vi volus scii, ĉu laŭ mia opinio tiu viro estis rajte krucumita. Estas simpla afero, kara sinjoro. Unue, ĝi ne estas nia afero, ni ne kondamnis lin al morto, ni nur transdonis lin al lia moŝto romia provincestro, ĉu? Kial do ni alprenu ian respondecon, ĉu? Se li estis kondam-

nita rajte, estas bone; se okazis al li maljustaĵo, do ĝi estas kulpo de la Romianoj kaj ni povas tion iam imputi debete al ilia konto. Tiel estas, kara Benĥanan; tian aferon ni devas rigardi politike. Almenaŭ mi, kiel ĉefpastro, devas atenti tion, kiel ion politike taksi. Konsideru nur tion, amiko: La Romianoj senigis nin de persono, kiu — kiel mi tion diru? —, kiu pro iaj kaŭzoj ne estis al ni dezirinda; kaj ĉe tio la respondeco falas sur ilin —

Kion? Vi diras, kiuj estas la kaŭzoj? Benĥanan, Benĥanan, iel ŝajnas al mi, ke la nuntempa generacio ne estas sufiĉe patriote konscia. Ĉu vi ne komprenas, kiel malutilas al ni, se iu atakas niajn agnoskatajn aŭtoritatojn, kiel estas la farizeoj kaj leĝistoj? Kion pensos pri ni la Romianoj? Estas ja subfosado de la nacia memkonscio! Kontraŭe pro motivoj patriotaj ni devas subtenadi ilian prestiĝon, se ni volas malhelpi tion, ke nia nacio troviĝu sub fremdaj influoj! Kiu prenas de la Izraelidoj la kredon pri farizeoj, laboras por la utilo de la Romianoj. Kaj tion ni aranĝis tiel, ke lin likvidis la Romianoj mem: tion oni nomas politiko, Benĥanan. Kaj nun aperas diletantoj, kiuj zorgas, ĉu li estis ekzekutita rajte aŭ ne! Memoru, juna viro, la intereso de la patrio estas super ĉiu rajto. Mi scias plej bone, ke niaj farizeoj havas siajn erarojn; inter ni, unu kiel la alia estas nur babilulo kaj fripono — sed ni ne povas permesi al ni, ke iu subfosadu ilian aŭtoritaton! Mi scias, Benĥanan, ke vi

estis lia disĉiplo; plaĉis al vi lia instruo, ke ni amu niajn proksimulojn kaj malamikojn kaj similaj paroloj; sed diru mem, kiel tio helpas al ni Judoj?

Kaj ankoraŭ ion. Li devis ne diradi, ke li venis savi la mondon kaj ke li estas Mesio kaj filo de dio aŭ kio. Mi scias ja, ke li devenas el Nazareto — mi petas vin, kia do savonto! Ekzistas ankoraŭ homoj, kiuj memoras lin kiel bubon de ĉarpentisto — kaj tiu homo volus rebonigi la mondon? Ridinda ambicio! Mi estas bona Judo, Benĥanan, sed neniu kredigos al mi, ke iu samlandano povus savi la mondon. Ni ege trotaksus nin, homo. Mi dirus nenion, se tiu estus Romiano aŭ Egipto; sed tia Judeto el Galileo — estas ja ridinde! Li rakontu al iu alia, ke li venis savi la mondon, sed ne al ni, Benĥanan. Ne al ni. Ne al ni.”

[1934]

La krucumo

Kaj Pilato venigis Naĥumon, viron erudician pri historio kaj doktan, kaj diris al li:

”Naĥumo, ege min ĉagrenas, ke via nacio fiksas al si en la kapo krucumi tiun viron. Tondro sur vin, ĝi estas ja maljustaĵo.”

”Se ne estus maljustaĵoj, ne estus historio,” diris Naĥumo.

”Mi volas havi kun tiu afero nenion komunan,” diris Pilato. ”Diru al ili, ke ili ankoraŭ pripensu tion.”

”Estas jam malfrue,” diris Naĥumo. ”Mi sekvas la eventojn nur laŭ libroj kaj tial mi ne iris rigardi la ekzekutan lokon; sed ĵus antaŭ momento alkuris de tie mia tagservistino kaj rakontis, ke li jam estas krucumita kaj pendas inter viro je dekstro kaj viro je maldekstro.”

Kaj malsereniĝis Pilato kaj kovris sian vizaĝon per la manoj. Post momento li diris: ”Ni ne parolu do pri tio. Sed ni petas vin, kion krimis tiu viro je dekstro kaj la viro je maldekstro?”

”Mi eĉ ne scias,” respondis Naĥumo, ”unuĵ diras, ke ili estas krimuloj, kaj aliaj, ke ili estas iaj predikantoj. Kiom mi povas juĝi laŭ la historio, ili faris versimile ian

politikon; sed neniel mi povas kompreni, ke la nacio krucumis ilin ambaŭ samtempe.”

”Mi ne komprenas vin,” diris Pilato.

”Estas jene,” diris Naĥumo. ”Iam homoj krucumas tiun dekstre kaj alian fojon tiun maldekstre; ĉiam tiel estis en la historio. Ĉiu tempo havas aliajn martirojn. Estas tempoj, kiam estas malliberigata aŭ krucumata tiu, kiu batalas por sia nacio; kaj alian fojon estas vico de tiu, kiu diras, ke oni devas batali por malriĉuloj kaj sklavoj. Ambaŭ alternas kaj ĉiu havas sian tempon.”

”Ho,” diris Pilato. ”Do vi krucumas ĉiun, kiu klopodas realigi ion honestan.”

”Preskaŭ,” diris Naĥumo. ”Sed tamen estas hoketo ĉi tie. Iam vi dirus, ke la homoj pli klopodas pri malamo al la aliaj ol pri tio bona, kion ili predikas. La homoj estas ĉiam krucumataj pro io bela kaj granda. Tiu kiu ĵus nun estas sur la kruco, oferas sian vivon por granda afero; sed tiu, kiu ĝin trenas al la kruco kaj alnajlas, tiu, Pilato, estas malbona kaj sovaĝa kaj ege malbela je ekrigardo. Pilato, nacio estas granda kaj bela afero.”

”Almenaŭ la nia, la Romia,” diris Pilato.

”Kaj ankaŭ la nia,” diris Naĥumo. ”Sed ankaŭ justeco al malriĉuloj estas granda kaj bela afero. Nur bedaŭrinde la homoj preskaŭ sufokiĝas de malamo kaj koleremo pro grandaj kaj belaj aferoj; kaj la aliaj iras foje kun tiu kaj foje kun alia kaj ĉiam helpas krucumi tiun, kies

vico ĵus estas; aŭ ili nur rigardas tion kaj diras al si: Prave li meritas, li devis iri kun nia partio.”

”Kial do,” diris Pilato, ”ili krucumas tiun en la mezo?”

”Jen la afero,” diris post tio Naĥumo. ”Se venkus tiu je maldekstro, li krucumus tiun dekstre, sed tiun en la mezo ankoraŭ pli frue. Memkomprene estas ankaŭ eble, ke estiĝus ĥaoso kaj bataloj; tiam tiu dekstre kaj tiu maldekstre kune krucumus tiun, kiu estas en la mezo, ĉar li ne decidiĝis, kontraŭ kiu el la du li iros. Se vi ascendus tegmenton de via domo, vi vidus la kampon Hakeldaman: malamo maldekstre, malamo dekstre, kaj inter ili tiu, kiu volis tion rebonigi per amo kaj racio, kiel estas dirate pri li. Kaj krome vi vidus amason da homoj, kiuj nur rigardas, manĝante dume tagmanĝon, kiun ili kun si prenis. Iel mallumiĝas; nun ĉiuj kuros galope hejmen, por ke ilia vesto ne tramalsekiĝu.”

Kaj kiam estis la sesa horo, fariĝis mallumo sur la tuta lando ĝis la naŭa horo. Je la naŭa horo vokis tiu en la mezo per voĉo granda dirante: ”*Elói, Elói, lama sabaĥ-tani?*” Kaj jen, la kurteno de la sanktejo ŝiriĝis en du pecojn, de supre ĝis malsupre, kaj la tero tremis kaj la rokoj diskrevis.

[1927]

La vespero de Pilato

Tiun tagon Pilato vespermanĝis kun sia adjutanto; li estis juna leŭtenanto Suza, naskdevena el Kirenai-ko. Suza eĉ ne rimarkis, ke la provincestro estas iel silen-tema, kaj gaje babilis ĝojgita pro tio, ke la unuan fojon en la vivo li travivis tertremon.

”Kiel ĝi estis gajega,” li laŭtis ĉe la manĝo. ”Kiam post la tagmanĝo fariĝis la mallumo, mi kuris eksteren rigar-di, kio okazas. Sur la ŝtuparo ŝajnis al mi, ke miaj piedoj ial stumblis aŭ deglitis aŭ io simila — nu, ridinde estis; je mia animo, ekscelenco, neniam dum mia vivo mi pen-sus, ke ĉio ĉi estas la tuta tertremo. Kaj antaŭ ol mi pre-terpasis angulon, jam kontraŭ mi galope kuris iuj civilu-loj okulegantaj kaj kriantaj: ’Tomboj malfermiĝas kaj ro-koj diskrevas!’ Dio helpu, mi diris al mi, ĉu eble tertre-mo? Homido, mi diras al mi, vi havas bonŝancon! Tio estas ja sufiĉe rara fenomeno, ĉu?”

Pilato jesis. ”Foje mi jam vidis tertremon,” li diris. ”Estis en Cilicio, atendu, pasos jam dek sep jaroj de tiam — aŭ kiom. Tiam ĝi estis pli granda.”

”Finfine nenio okazis,” voĉis Suza senzorge. ”Apud la pordego al Hakeldam falis peco da roko — jes, kaj sur la

tombejo malfermiĝis kelke da tomboj. Mi miras, ke ĉi tie oni enterigas tiel malprofunden, apenaŭ unu ulnon. Dum somero ja fetoras el ili.”

”Kutimo,” murmuris Pilato. ”Ekzemple en Persio oni tute ne enterigas. Oni metas kadavron sub la sunon kaj prete.”

”Tio estus malpermesenda,” opiniis Suza. ”Pro higienaj kaŭzoj aŭ simile.”

”Malpermesi,” murmuris Pilato. ”Vi devus al ili senĉese ion ordonadi aŭ malpermesadi; tio estas malbona politiko, Suza. Nur ne miksiĝi en iliajn aferojn — almenaŭ estas trankvilo. Se vi volas vivi kiel brutoj, do vivu! Aĥ, Suza, mi jam vidis multajn landojn.”

”Sed tion mi ŝatus scii,” revenis Suza al sia plej granda intereso, ”kio kaŭzas la tertremon. Eble estas subtere iaj kavaĵoj, kiuj subite ŝutiĝas. Sed kial ĉe tio malheliĝis la firmamento? Tio estas por mi nekomprenebla. Ja matene estis tia ordinara, hela tago.”

”Mi petas pardonon,” aŭdiĝis la maljuna Papadokitis, Greko el Dodekanezo, kiu estis ilin priservanta. ”Ĝi estis atendebla jam de hieraŭ, sinjoro. Hieraŭ estis tia ruĝa sunsubiro, sinjoro, kaj mi diris al la kuiristino, ’Miriam, morgaŭ estos tempesto aŭ ciklono.’ ’Kaj min,’ diras Miriam, ’doloras la lumbo.’ Io estis atendebla, sinjoro. Mi petas pardonon.”

”Io estis atendebla,” diris Pilato enpense. ”Sciu, Suza,

hodiaŭ mi ankaŭ ion atendis. De la mateno, kiam mi al ili transdonis tiun viron el Nazareto — mi devis lin al ili transdoni, ĉar la politiko de Romio principe ne miksas sin en hejmajn aferojn, memoru, Suza, ju malpli la homoj devas kontakti kun ŝtata aŭtoritato, des pli facile ili ĝin toleras — ĉe Jovo, kie mi ĉesis?”

”Ĉe la viro el Nazareto,” helpis al li Suza.

”Ĉe la viro el Nazareto. Sciu, Suza, iomete mi interesiĝis pri li, li fakte naskiĝis en Betlehemo — mi pensas, ke la ĉi tieaj indiĝenoj kulpiĝis kontraŭ li pri justica murdo, sed tio estas ilia afero; se mi ne donus lin al ili, ili certe disŝirus lin, kaj la romia administrado nur spertus fiaskon. Sed atendu, ĉi tio ne apartenas al la afero. Al mi diris Anas, ke tiu homo laŭdire estis danĝera; onidire, kiam li naskiĝis, venis paŝtistoj al Betlehemo kaj riverencis al li kiel al iu reĝo. Kaj antaŭ nelonge oni bonvenigis lin ĉi tie kiel iun triumfantan. Tion mi ne povas kompreni, Suza. Tamen nur mi estus atendinta —”

”Kion vi atendus?” memorigis lin Suza post momento.

”Ke eble venos liaj Betlehemanoj. Ke ili ne lasos lin en la manaĉoj de la ĉi tieaj intriguloj. Ke ili venos al mi kaj diros: ‘Sinjoro, li estas nia homo kaj ion por ni signifas; do ni venas por diri al vi, ke ni staras ĉe li kaj ne lasos fari maljustaĵon al li.’ — Suza, mi preskaŭ antaŭĝojis je la homoj el la montoj; mi estas ĝisgorgê sata de ĉi tieaj

buŝklakuloj kaj procesemuloj — Kaj mi dirus al ili: 'Dank' al Dio, Betlehemanoj, mi atendis vin. Pro li — kaj pro vi kaj via lando. Al ĉifonoj sur bastono oni ne povas regi; regi oni povas nur al viroj kaj ne al buŝuloj. El homoj, kiaj vi, oni faras soldatojn, kiuj ne subiĝas; el homoj, kiaj vi estas, oni faras naciojn kaj ŝtatojn. Oni diras al mi, ke tiu via samlandano vivigas mortintojn. Mi petas vin, kion kun mortintoj? Sed vi estas ĉi tie, kaj mi vidas, ke tiu viro scias viviĝi ankaŭ vivantojn: ke li sugestis al vi ion kiel fidelecon kaj honoron kaj — ni Romianoj tion nomas Virtus, mi ne scias, kiel ĝi estas nomata en via lingvo, Betlehemanoj, sed ĝi estas en vi. Mi pensas, ke tiu homo ankoraŭ sukcesos. Estus domaĝe pri li!"

Pilato silentiĝis kaj distre forbalais de sur la tablo painerojn. "Nu, ili ne venis," li murmuris. "Aĥ, Suza, kia vanaĵo estas la regado!"

La kredo de Pilato

Respondis Jesuo: *Por tio mi naskiĝis kaj venis en la mondon, ke mi atestu pri la vero. Ĉiu, kiu estas el la vero, aŭskultus mian voĉon.*

Pilato diris al li: Kio estas la vero? Kaj dirinte tion, li eliris denove al la Judoj kaj diris al ili: Mi trovas en li nenian kulpon.

(Ev. de sankta Johano, 18., 37-38)

Ĉe vesperiĝo iu viro estimata en la urbo, kaj nomata Jozefo el Arimateo, kiu estis ankaŭ disĉiplo de Kristo, venis al Pilato kaj petis lin, ke tiu donu al li la korpon de Jesuo. Pilato konsentis kaj diris: "Li estis ekzekutita senkulpa."

"Vi mem permesis mortigi lin", rediris Jozefo.

"Jes, permesis," respondis Pilato, "kaj oni cetere pensas, ke mi faris tion pro timo antaŭ la kelkaj kriuloj kun ilia Barabaso. Se mi sendus kontraŭ ilin kvin soldatojn, ili estus silentaj. Sed pri tio ne temas, Jozefo el Arimateo."

"Pri tio ne temas," li diris post momento. "Sed kiam mi parolis kun li, mi vidis, ke post tempeto liaj disĉiploj

krucumados aliajn; en nomo de lia nomo, en nomo de lia vero ili krucumados kaj martirigados ĉiujn aliajn, mortigados aliajn verojn kaj levados sur ŝultrojn aliajn Barabasojn. Tiu homo parolis pri la vero. Kio estas la vero?

Vi estas stranga nacio multe parolanta. Vi havas nur-nurajn farizeojn, profetojn, savontojn kaj aliajn sekta-nojn. Ĉiu farinto de iu vero, malpermesas ĉiujn aliajn verojn. Same, se meblisto, kiu faris novan seĝon, mal-permesus sidi sur aliaj seĝoj, kiujn iu ajn faris antaŭ li. Kvazaŭ per tio, ke nova seĝo estas farita, estus nuligitaj ĉiuj malnovaj seĝoj. Finfine estas eble, ke la nova seĝo estas pli bona, bela kaj komforta ol la ceteraj; sed kial, ĉe ĉiuj diabloj, homo laca ne povus sidigi sin sur kiu ajn aĉa anobia aŭ ŝtona seĝo? Estante laca kaj deprimita, li bezonas respiron; kaj vi lin tute perforte tiras for de la sidilo, sur kiun li sinkis, por ke li transsidiĝu sur la vian. Mi ne komprenas vin, Jozefo.”

”La vero,” rediris Jozefo el Arimateo, ”ne estas kiel seĝo kaj ripozo; pli eble ĝi estas kvazaŭ ordono diranta: Iru tien kaj tien, faru tion kaj tion; venku malamikon, konkeru tiun urbon, punu perfidon kaj simile. Kiu ne obeas tiun ordonon, estas perfidulo kaj malamiko. Tiel statas kun la vero.”

”Aĥ, Jozefo,” diris Pilato, ”vi scias ja, ke mi estas soldato kaj travivis plejparton de mia vivo inter soldatoj.

Ĉiam mi estis obea al ordono, sed ne tial, ĉar ĝi estus vero. Vero estis, ke mi estis laca aŭ soifa; ke mi sopiris pri la patrino aŭ gloro; ke tiu soldato ĵus pensas pri sia edzino kaj alia pri sia kampo aŭ jungitaro. Vero estis, ke se ne ekzistus ordono, neniu el la soldatoj irus mortigadi aliajn homojn same lacajn kaj malfeliĉajn. Kio do estas la vero? Mi kredas, ke mi estas pli proksima al la vero, pensante pri la soldatoj, kaj ne pri la ordono.”

”La vero ne estas ordono de komandanto,” respondis Jozefo el Arimateo, ”sed ordono de racio. Vi vidas ja, ke tiu kolono estas blanka; se mi asertus al vi, ke ĝi estas nigra, tio estus kontraŭ via racio kaj vi ne permesus tion al mi.”

”Kial ne?” diris Pilato. ”Mi dirus al mi, ke vi estas eble terure malfeliĉa kaj nubmensa, vidante blankan kolonon nigra; mi provus gajigi vin; vere, mi interesiĝus pri vi multe pli ol antaŭe. Kaj se ĝi estus nurnura eraro, mi dirus al mi, ke en via eraro estas same multe el via animo kiel en via vero.”

”Ne ekzistas mia vero,” diris Jozefo el Arimateo. ”Ekzistas nur unu sola vero por ĉiuj.”

”Kaj kiu ĝi estas?”

”Tiu, kiun mi kredas.”

”Do vidu,” parolis Pilato malrapide. ”Ĝi estas tamen nur via vero. Vi estas kiel malgrandaj infanoj, kiuj kredas, ke la tuta mondo finiĝas kun ilia horizonto, kaj ke

trans ĝi ekzistas nenio. La mondo estas granda, kaj en ĝi estas loko por multaj objektoj. Mi pensas, ke ankaŭ en realeco estas loko por multaj veroj. Rigardu, mi estas fremda en ĉi tiu regiono kaj mia hejmo estas malproksime trans la horizonto; kaj tamen mi ne dirus, ke ĉi tiu regiono estas neĝusta. Egale fremda estas al mi la instruo de via Jesuo; ĉu mi do asertu, ke ĝi estas neĝusta? Mi pensas, Jozefo, ke ĉiuj regionoj estas ĝustaj; sed la mondo devas esti ege vasta, por ke ili ĉiuj trovu lokon apud si kaj post si. Se Arabio devus esti metita sur la saman lokon, kie estas Poncio, tio ne estus memkomprene ĝusta. Kaj same estas koncerne la verojn. Oni devus fari la mondon treege granda, ampleksa kaj libera, por ke ĝi entenu ĉiujn efektivajn verojn. Kaj mi pensas, Jozefo, ke ĝi estas tia. Ascendinte tre altan monton, vi vidas, ke la aĵoj kunfandiĝas kaj iel egaliĝas al unu ebena. De sur iu alto ankaŭ la veroj kunfandiĝas. La homo kompreneble ne vivas kaj ne povas vivi sur alta monto; al li sufiĉas, ke li vidas de proksime sian domon aŭ kampon, ambaŭ plenaj de veroj kaj aĵoj; tie estas lia ĝusta loko kaj agadejo. Sed de tempo al tempo li povas rigardi la montojn aŭ ĉielon kaj diri al si, ke de tie liaj veroj kaj aĵoj tamen ekzistas, kaj nenio estas de ili ŝtelita, sed ke ili kunfandiĝas kun io multe pli larĝa, kio jam ne estas lia posedaĵo. Korligiĝi al ĉi tiu vasta spektaklo kaj dume kulturi sian etan kampon, tio, Jozefo, estas

preskaŭ io kiel diservo. Kaj mi pensas, ke la Patro ĉiela de tiu koncerna homo vere ie ekzistas, sed ke li tute bone akordiĝas kun Apolono kaj aliaj dioj. Parte ili trape-
netras unu la alian kaj parte ili najbaras. Rigardu, sur la ĉielo estas ege multe da spaco. Mi ĝojas, ke tie ankaŭ estas la Patro ĉiela.”

”Vi estas nek varma nek malvarma,” diris Jozefo el Arimateo, leviĝante. ”Vi estas nur varmeta.”

”Tia mi ne estas,” respondis Pilato. ”Mi kredas, kredas, ardege kredas, ke la vero ekzistas kaj ke la homo ĝin ekkonas. Estus stulte pensi, ke la vero estas nur por tio, ke la homo ĝin ne ekkonu. Li konatiĝas kun ĝi, jes; sed kiu? Mi aŭ vi, aŭ eble ĉiu? Mi kredas, ke ĉiu havas sian parton en ĝi; ankaŭ tiu, kiu diras jes, kaj tiu diranta ne. Se ili du kuniĝus kaj komprenus unu la alian, estiĝus per tio la tuta vero. Jes kaj ne kompreneble ne estas ligeblaj, sed la homoj povas ĉiam unuiĝi; pli da vero estas en la homoj ol en la vortoj. Mi havas pli da kompreno por homoj ol por ties veroj; sed ankaŭ en tio estas kredo, Jozefo el Arimateo, ankaŭ por tio necesas konservi sin en entuziasmo kaj ekstazo. Mi kredas. Nepre sendube mi kredas. Sed kio estas la vero?”

[1920]

Imperiestro Diokleciano

Ĉi tiu historio estus certe pli efika, se ĝia heroino estus filino de Diokleciano aŭ iu juneca kaj virga estaĵo: sed bedaŭrinde pro kaŭzoj de historia vero estas ŝi fratino de Diokleciano, multaĝa kaj digna matrono, laŭ opinio de la imperiestro iom histeria kaj afekta, kiun la maljuna tirano certgrade timis. Tial, kiam ŝi anoncis sin al li, li interrompis la aŭdiencon kun la landestro de Cireno (al kiu li per fortaj vortoj estis montranta sian malplaĉon) kaj iris renkonte al ŝi ĝis la pordo.

”Nu, kio, Antonia?” li laŭtis familiare. ”Kion vi ŝatus? Ĉu vi havas denove iujn bruldamaĝitojn? Aŭ mi faru ion kontraŭ la turmentado de rabobestoj en la cirko? Aŭ vi volas enkonduki moralan edukadon en la legioj? Do malkaŝu tion, rapide, kaj sidiĝu.”

Sed Antonia restis staranta. ”Diokleciano,” ŝi komencis preskaŭ solene, ”ion mi devas diri al vi.”

”Ha,” diris la imperiestro rezigne kaj frotis la nukon. ”Sed ĉe Jovo, mi havas ĝuste hodiaŭ tiom por fari! Ĉu ĝi ne povus esti prokrastita ĝis alia fojo?”

”Diokleciano,” daŭrigis necedeme lia fratino, ”mi ve-

nas diri al vi, ke vi jam devas ĉesigi la persekutadon de la kristanoj.”

”Mi petas vin,” grumblis la maljuna imperiestro, ”kial tiel subite — post preskaŭ tricent jaroj —” Li rigardis atente la emociitan matronon; ŝi aspektis patose kun siaj severaj okuloj kaj spasme interplektitaj manoj, kiujn podagro kurbigis. ”Nu bone,” li rapidis diri, ”ni povas tion preparoli; sed unue estu tiel bona kaj sidiĝu.”

Antonia senvole obeis kaj sidiĝis sur rando de seĝo; sekve de tio ŝi iom perdis la bataleman pozon, etiĝis kaj konfuziĝis; ŝiaj buŝanguloj moliĝis pro ploro. ”Tiuuj homoj estas tiel sanktaj, Diokleciano,” ŝi elpuŝis el si, ”kaj tiel bele kredas — Mi scias, se vi ilin konus — Diokleciano, vi devas ilin ekkoni! Vi vidus, ke ... ke poste vi havos pri ili tute alian opinion —”

”Sed mi ne havas ja pri ili malbonan opinion,” kontraŭis Diokleciano milde. ”Mi scias ja, ke tio, kion oni diras pri ili, estas babilaĉo kaj kalumnioj. Tion elpensas pri ili niaj aŭguristoj — vi scias, konkurenca envio kaj tiel plu. Mi igis tion enketi kaj aŭdas, ke tiuj kristanoj cetero estas tute bravaj homoj. Tre bonkonduktaj kaj ofermaj.”

”Do kial vi tiom persekutas ilin?” demandis Antonia miregante.

Diokleciano levis iomete la brovojn. ”Kial? Mi petas vin, tia demando! De ĉiam oni tion faris, ĉu? Kaj dume

ne estas videble, ke ili malpliĝadus. La paroloj pri ilia persekutado estas terure troigitaj. Kompreneble, iam-tiam mi devas kelkajn por ekzemplo puni —”

”Kial?” ripetis la matrono.

”Pro politikaj kaŭzoj,” diris la maljuna imperiestro. ”Rigardu, mia kara, mi povus citi al vi aron da kaŭzoj. Ekzemple, ke la popolo tion deziras. *Pro primo* tio fortunas ĝian atenton for de aliaj aferoj. *Pro secundo*, tio donas al ĝi sekuran konscion, ke ĝi estas regata per forta mano. Kaj *pro tertio* tio estas ĉi tie kvazaŭ nacia kutimo. Mi diras al vi, neniuj prudenta kaj responsa ŝtatulo tuŝas superflue la aferojn de kutimo. Tio vekas nur senton de necerteco kaj — hm — de ia kaoso. Mia ora, dum mia regado mi jam faris pli da novaĵoj ol iu alia. Sed tio devis esti. Kio ne devas esti, tion mi ne faros.”

”Sed la justeco, Diokleciano,” diris mallaŭte Antonia, ”la justeco devas esti. Mi postulas de vi nur la justecon.”

Diokleciano skuetis la ŝultrojn. ”La persekutado de kristainoj estas justa, ĉar ĝi respondas al validaj leĝoj. Mi scias, kion vi havas sur la lango: ke mi povus la leĝojn nuligi. Mi povus, sed mi ne faros. Kara Antonjo, memoru, *minima non curat praetor*; mi ne povas zorgi pri tIAj bagateloj. Afable konsideru, ke sur mi pezas la tuta administrado de la regno; kaj knabino, mi ĝin refaris de la fundamento. Mi rekonstruis la konstitucion, mi reformis la senaton, centralizis la administradon, reorganizis la

tutan burokrataron, nove dividis la provincojn, reguligis ilian administran sistemon — ĉio ĉi estas aferoj, kiuj devas realiĝi en la intereso de la ŝtato. Vi estas virino kaj ne komprenas tion; sed la plej gravaj taskoj de ŝtatulo estas la administraj. Diru mem, kion signifas tiuj kristanoj kompare al — ni diru kompare al fondo de regna financa kontrolo? Tio estas bagateloj.”

”Sed vi, Diokleciano,” elspiris Antonia, ”vi povus tion tiel facile aranĝi —”

”Mi povus. Kaj ankaŭ ne povus,” diris la imperiestro decide. ”Mi restarigis la tutan regnon sur novaj administraj fundamentoj — kaj la homoj preskaŭ ne scias pri tio. Ĉar mi lasis al ili iliajn kutimojn. Se mi donas al ili tiujn kelkajn kristanojn, ili havas la impreson, ke ĉio restas sama kaj ili ne ĝenas. Mia ora, ŝtatulo devas scii, ĝis kie li povas kuraĝi kun sia reformado. Jen la afero.”

”Do nur tial,” diris la matrono amare, ”nur tial, por ke vin lasu en la paco ĉi tieaj gapuloj kaj kriuloj —”

Diokleciano grimacis. ”Se vi volas, do ankaŭ tial. Sed mi diros al vi, ke mi legis librojn de tiuj viaj kristanoj kaj iome ankaŭ pri ili meditis.”

”Kaj kion malbonan vi trovis ĉe ili?” envortigis Antonia impete.

”Kion malbonan?” diris la imperiestro enpense. ”Male, ian kernon ĝi havas. La amo kaj ĉio alia — ekzemple la malrespekto al la mondana vantaĵo. — Verdire tio es-

tas tute belaj idealoj, kaj se mi ne estus imperiestro — Sciu, Antonjo, kelkaj aferoj en ilia instruo treege plaĉis al mi; nur se mi havus pli da tempo — kaj povus pensi pri mia animo —” La maljuna imperiestro incitite frapis per manplato la tablon. ”Sed estas absurde. Politike absolute neeble. Nerealigeble. Ĉu estas eble fari Dian Regionon? Kiel oni ĝin administru? Per la amo? Per Dia vorto? Mi ja konas la homojn, ĉu? Politike ĝi estas instruotiel nematura kaj nerealigebla, ke — ke — ke ĝi estas preskaŭ puninda.”

”Sed ili ja nenium politikon faras,” defendis ilin Antonia fervore. ”Kaj iliaj sanktaj libroj tuŝas politikon eĉ ne per unu vorto!”

”Por praktika ŝtatulo,” diris Diokleciano, ”ĉio estas politiko. Ĉio havas politikan signifon. Ĉiu penso devas esti taksata politike, kiel oni ĝin realigu, kion fari el ĝi, al kio ĝi kondukus. Tagojn kaj noktojn mi cerbumis super tio, kiel estus politike realigebla la kristana instruo; kaj mi vidas, ke ĝi estas nebla. Mi diras al vi, ke kristana ŝtato povus ekzisti eĉ ne unu monaton. Mi petas vin, ĉu estas kristane fondebla armeo? Ĉu estas kristane kolektebla imposto? Ĉu povus ekzisti en kristana socio iuj sklavoĵoj? Mi havas miajn spertojn, Antonjo: eĉ ne unu jaron, eĉ ne unu monaton oni povus regi laŭ la kristanaj principoj. Tial la kristanismo neniam enradikiĝos. Ĝi povas esti kredo de metiistoj kaj sklavoĵoj, sed neniam, ne-

niam ĝi povas esti ŝtata religio. Tio estas nepensebla. Sciu, tiuj iliaj opinioj pri posedaĵo, pri proksimulo, pri malakceptebla de ĉia perforto kaj tiel plu, tio estas belaj, sed praktike neeblaj aferoj. Por reala vivo, Antonjo, ili ne taŭgas. Do diru, kion kun ili?”

”Eble ne realigebla,” flustris Antonia, ”sed pro tio ja ili ne estas krimaj.”

”Krima,” diris la imperiestro, ”estas, kio malutilas al la ŝtato. Kaj la kristanismo paralizus la suverenan potencon de la ŝtato. Tio ne estas ebla. Mia ora, la plej alta potenco devas esti en ĉi tiu kaj ne en la transa mondo. Se mi diras, ke kristana ŝtato ne estas principe ebla, tio signifas kun logika neceso, ke la ŝtato ne povas toleri la kristanismon. Responda politikisto devas sobre stariĝi kontraŭ nesanaj kaj nerealigeblaj revoj. Cetere ili estas nur ĥimeroj de frenezuloj kaj sklavoj —”

Antonia leviĝis, peze anhelante. ”Diokleciano, volu do scii tion: mi iĝis kristanino.”

”Ĉu vere?” ekmiris milde la imperiestro. ”Nu, kial ne? Mi diras ja, ke ĝi havas ian kernon; kaj dum ĝi restos via privata afero — Ne pensu, Antonjo, ke mi ne havas komprenon por tiaj aferoj. Ankaŭ mi volus esti ankoraŭ unufoje homa animo; mi ŝatus, Antonjo, surhokigi mian imperion kaj politikon kaj ĉion ... — nome nur kiam mi finfaros la reformon de la regna administrado kaj tiajn aferojn; kaj poste, poste mi irus ien en provincon — kaj

studus Platonon — Kriston — Markon Aŭrelion — kaj tiun ilian Paŭlon aŭ kiel li estas nomata — Sed nun, pardonu; mi havas iajn politikajn konferencojn.”

[1932]

Atilo

Matene kuriero alportis el la rando de la arbaro informon, ke sudoriente flagris dum la nokto fajra inundo. Tiun tagon denove malvarme, malseke nebulis, la malsekaj ŝtipoj eĉ ne volis bruli; tri homoj el la areto kaŝita en la ravino mortis pro sanga lakso. Ĉar estis jam nenio por manĝo, du viroj ekiris al paŝtistoj en la transbaro; ili revenis malfrue posttagmeze, tramalsekaj kaj morte lacaj; apenaŭ oni sciiĝis de ili, ke estas malbone: la ŝafoj pereas kaj la bovinoj pufiĝas; la paŝtistoj ilin atakis klabe kaj tranĉile, kiam unu el ili volis forkonduki sian propran gunon, kiun li konfidis al ili antaŭ la fuĝo en la arbarojn.

”Ni preĝu,” diris la paroĥestro, suferanta pro disenterio. ”La Eternulo kompatos nin.”

”Kriste eleison,” komencis muĝi la deprimita aro. Tiu-momente eksplodis akresona kverelo inter virinoj, io pro lana ĉifono.

”Kio denove okazas, damnaj virinaĉoj,” ekkriegis la vilaĝestro kaj iris vipobati la virinojn. Per tio mildiĝis la senkonsila streĉo, la viroj komencis denove senti sin kiel viroj.

”Ĉi tien la ĉevaluloj ne venos,” opiniis iu barbulo. ”Nepre ne en ĉi tiujn ravinojn, tra ĉi tiu arbustaĵo — Onidire ili havas ĉevalojn malgrandajn kaj malgrasegajn kiel kaprinojn.”

”Mi dirus,” oponis iu ekscitita vireto, ”ke ni devis resti en la urbo. Tiom ni pagis por la muregoj ... Por tiu mono ni povis ja havi ĉieltuŝajn muregojn, ĉu?”

”Memkomprene,” mokis ftiza bakalaŭro. ”Por tiu mono povis esti muregoj el kukoj. Iru formordi peceton — multaj homoj, homido, el tio satmanĝegis; eble tie restis ankaŭ io por vi.”

La vilaĝestro averte eksnufis; la interparolo evidente ne konvenis ĉi tie.

”Mi dirus,” persistis ĉe sia ideo la incitita civitano, ”ke kavalerio kontraŭ tiaj bastionoj ... Ne enlasi ilin en la urbon, kaj prete. Kaj ni povis esti ekster danĝero.”

”Do revenu en la urbon kaj rampu litten,” konsilis al li la barbulo.

”Kion mi farus tie sola,” oponis la incitita homo. ”Mi nur diras, ke ni devis resti en la urbo kaj defendi nin. Mi havas ja rajton diri, ke okazis eraro, ĉu? Tiom kostis al ni la muregoj, kaj poste oni diras al ni, ke ili taŭgas por nenio! Do, mi petas!”

”Estu tiel aŭ tiel,” diris la paroĥestro, ”ni devas fidi dian helpon. Homidoj, ja tiu Atilo estas nur pagano —”

”Dia vipo,” aŭdiĝis monaĥo tremanta pro febro. ”Dia puno.”

La viroj mishumore eksilentis. Tiu febra monaĥo nur senĉese predikus kaj li eĉ ne apartenas al la komunumo. Por kio ni havas nian paroĥestron? pensis la viroj. Tiu estas nia, li fidas al ni kaj ne insultas tiom pro niaj pekoj. Kvazaŭ ni estus tiom pekintaj, pensis la viroj ĉagrene.

La pluvo ĉesis, sed pezaj gutoj ankoraŭ plu susuris sub la arbovolbo. Dio, Dio, Dio, ĝemis la paroĥestro turmentata de sia malsano.

Vespere pikedo altrenis mizeriĝintan junulon; laŭdi-re li estas fuĝinto el oriento, el la okupita teritorio.

La vilaĝestro pufiĝis kaj komencis enketi la fuĝinton; li evidente opiniis, ke tia oficialaĵo devas okazi kiel eble plej severe. Jes, diris la junulo, la Hunnoj estas jam proksimume nur dek kvin mejlojn de ĉi tie kaj pluavancas malrapide; ili okupis lian urbon, ĉu li vidis ilin, ne, Atilon ne — sed li vidis alian generalon, tian dikan. Ĉu ili forbruligis la urbon? Ne, ne forbruligis; tiu generalo eldonis proklamon, ke al la civila loĝantaro nenio okazos, sed ke la urbo devas doni furaĝon, provianton kaj aliajn diversaĵojn. Kaj ke la loĝantaro devas sin deteni de ĉia malamika konduto kontraŭ la Hunnoj, alie oni uzos la plej severajn reprezaliojn.

”Sed tiuj paganoj ja murdas ankaŭ virinojn kaj infanojn,” asertis kun certeco la barbulo.

Laŭdire ne, diris la junulo. Ĉe ili onidire ne. Li mem estis kaŝita en pajlo, sed kiam la panjo diris al li, ke laŭdire la Hunnoj rekrutigos la junajn virojn kiel brutpelistojn, li nokte fuĝis. Jen ĉio, kion li scias.

La viroj estis malkontentaj. "Estas ja konate," deklaris iu, "ke ili forhakas la manojn de beboj kaj kion ili faras al la virinoj, tio tute ne estas direbla."

Mi ne scias pri io simila, diris la junulo, kvazaŭ senkulpege. Almenaŭ en lia loko tio ne estis laŭdire tiel malbona. Kaj kiom da tiuj Hunnoj estas? Laŭdire ducent, versimile ne pli.

"Vi mensogas," ekkriis la barbulo. "Tion ja ĉiu scias, ke ili estas pli ol kvincent mil. Kaj kien ili venas, tie ili ĉion formurdas kaj forbruligas."

"Ili fermas la homojn en garbejojn kaj tie ilin brulmortigas," diris alia.

"Kaj la infanojn ili alpikas sur lancojn," rimarkigis la tria indigne.

"Kaj rostas ilin super fajro," aldonis la kvara kun nazkataro. "Paganoj damnaj!"

"Dio, Dio," ĝemis la paroĥestro. "Dio kompatu nin!"

"Vi estas iel stranga," diris la barbulo suspekta al la junulo. "Kiel vi povas diri, ke vi vidis la Hunnojn, se vi estis kaŝita en pajlo?"

"La panjo vidis ilin," balbutis la junulo, "kaj ŝi portadis al mi manĝaĵon en la subtegmento —"

”Vi mensogas,” ektondris la barbulo. ”Ni scias ja, kien la Hunnoj venas, tie ili formanĝegas ĉion kiel lokustoj. Eĉ foliaro sur arboj ne restas post ili, ĉu vi komprenas?”

”Dio en la ĉielo, Dio en la ĉielo,” komencis histerie ĝemi ekscitita civitano. ”Kaj kial, kial ĝi okazas? Kiu kulpas pri tio? Kiu enlasis ilin al ni? Ni estas tiom pagintaj por la armeo ... Dio en la ĉielo!”

”Kiu enlasis ilin ĉi tien?” aŭdiĝis moke la bakalaŭro. ”Vi ne scias tion? Demandu la bizancan sinjoron imperiestron, kiu alvokis la flavajn simiojn ĉi tien! Homido, hodiaŭ jam ĉiu scias, kiu financas la popolmigradon! Tion oni nomas alta politiko, ĉu vi scias?”

La urbestro serioze eksnufis. ”Stultaĵoj. La afero estas tute alia. Ili versimile, tiuj Hunnoj, hejme mortaĉadis pro malsato ... kanajlaro pigra ... labori ĝi ne scias ... neniun civilizon ĝi havas ... kaj volas satmanĝegi. Tial ili iras kontraŭ nin ... por elumi de ni ... la fruktojn de nia laboro. Nur ŝteli, dividi la rabaĵon ... kaj plu marŝi, kanajloj!”

”Ili estas malkleraj paganoj,” diris la paroĥestro. ”Sovaĝa kaj necivilizita popolo. La Sinjoro tiel nur provas nin; ni preĝu kaj esprimu dankon kaj denove estos bone.”

”Dia plago,” komencis denove ekzalte prediki la febra monaĥo. ”Dio vin punas pro viaj pekoj, Dio gvidas la Hunnoj kaj ekstermos vin kiel Sodomanojn. Pro via amorado kaj blasfemado, pro la krudeco kaj senpieco de

viaj koroj, pro via avareco kaj malsobreco, pro via peka bonstato kaj mamono Dio damnis vin kaj donis vin en la manojn de malamikoj!”

La urbestro minace gruntis: ”Atentu la buŝon, *Dominé*: ĉi tie vi ne estas en preĝejo, ĉu vi scias? Ili venis satmanĝegi. Aviduloj ili estas, rabuloj kaj fiularo ...”

”Ĉio estas politiko,” obstinis la bakalaŭro. ”En ĝi Bizanco havas siajn fingrojn.”

Kaj tiam pasie aŭdiĝis nigreta viro, laŭ profesio staniŝto: ”Neniu Bizanco; tion faris la kaldronistoj kaj neniu alia! Antaŭ tri jaroj estis ĉi tie vaga kaldronisto kaj tiu havis same tian etan kaj malgrasegan ĉevalon, kiajn la Hunnoj havas.”

”Nu kaj?” demandis la urbestro.

”Ja tute memkomprene,” kriis la nigreta viro. ”La kaldronistoj iris antaŭe, por rigardi, kio kie estas ... spionoj ili estis ... Tion iniciatis nur la kaldronistoj! Ĉu scias iu, de kie ili venis? Kaj kion entute ili ĉi tie volis? Kial, kial ... por kio, se en la urbo estas loksida stanisto? Nur malprosperigi nian metion ... kaj spioni ... Neniam ili iris en preĝejon ... ili sorĉis ... la brutaron ensorĉadis ... publikinojn kun si trenis ... Ĉion la kaldronistoj!”

”Ian kernon tio havas,” meditis la barbulo. ”La kaldronistoj estas strangaj, eĉ krudan viandon ili manĝegas laŭdire.”

”Ŝtelista bando,” konfirmis la urbestro. ”Ili ŝtelas kokinojn kaj simile.”

La stanisto estis sufokiĝanta pro justa kolero. ”Jen vi vidas! Oni diras Atilo, kaj dume la kaldronistoj ... Pri ĉio, pri ĉio kulpas la malbenindaj kaldronistoj! Ili ensorcĝis nian brutaron ... sendis al ni disenterion ... Ĉion la kaldronistoj! Vi devis ilin pendumadi, kie ajn iu montriĝis! Ĉu vi ne scias ... ne scias pri la inferaj kaldronoj? Kaj ĉu vi ne aŭdis, ke la Hunnoj dum marŝo frapas kaldronojn? Ĉiu infano devas kompreni la koneksecon! Ili, la kaldronistoj, ŝargĝis nin per milito ... la kaldronistoj estas kulpaĵoj pri ĉio ... Kaj vi,” kriis li kun ŝaŭmo ĉe la buŝo, montante la fremdan junulon, ”vi estas ankaŭ kaldronisto, vi estas ligano kaj spiono de la kaldronistoj! Tial vi venis ... kaj volis nin paroltrompi, vi kaldronisto, vi volis nin perfidi al la kaldronistoj ...”

”Pendumu lin,” falsetis la ekscitita vireto.

”Atendu, najbaroj,” bruegis la urbestro kontraŭ la tumulto. ”Tion oni devas enketi ... Silenton!”

”Kiajn ceremoniojn,” akrevoĉis iu.

Komencis alkuri ankaŭ virinoj.

Tiunokte ekflamis inundo nordokcidente. Maldense pluvetis. Kvin homoj el la areto mortis pro disenterio kuintusado.

La junulon oni pendumis post iom longa torturado.

[1932]

Ikonoklasmo

Al Nikeforo, abato de la monaĥejo Sankta Simeono, venis iu Prokopio, konata kiel erudicia eksperto kaj entuziasma kolektanto de la arto bizanca. Videble li estis ekzaltita, kiam li atendis promenante tra la klostro de la monaĥejo. Belajn kolonojn ili ĉi tie havas, li diris al si, evidente el la kvina jarcento. Nur Nikeforo povas helpi al ni. Li havas influon ĉe la kortego kaj estis iam pentristo. Kaj li ne estis malbona pentristo, tiu maljunulo. Mi memoras, ke li faris por la imperiestrino proponojn por brodaĵoj kaj pentris por ŝi ikonojn. — Tial oni faris lin abato, kiam liaj manoj tiel kurbiĝis pro podagro, ke li ne plu povis teni la penikon en ili. Kaj laŭdire li havas daŭre potencan vorton ĉe la kortego. Jesuo Kristo, jen kia bela kapitelo! Jes, Nikeforo helpos. Feliĉe, ke ni rememoris Nikeforon!

”Estu bonvena, Prokopio,” aŭdiĝis post li mola voĉo. Prokopio rapide turniĝis. Post li staris seka kaj afabla maljunuleto kun la manoj kaŝitaj en la manikoj. ”Bela kolona kapitelo, ĉu?” li diris. ”Malnova laboraĵo el Nakso, sinjoro.”

Prokopio kisis la manikon de la abato. ”Mi venis al vi,

patro,” li komencis emocie, sed la monaĥejestro lin interrompis. ”Venu sidiĝi en la sunlumon, mia kara. Ĝi faras bone al mia podagro. Kia tago, dio, kia brilo! Do, kio vin venigas al mi?” li diris, kiam ili eksidis sur ŝtona benko meze de la monaĥeja ĝardeneto, zumanta de abeloj kaj odoranta de salvio, timiano kaj mento.

”Patro,” komencis Prokopio, ”mi turnas min al vi kiel al la sola, kiu povas forturni pezan kaj nerebonigeblan kulturan katastrofon. Mi scias, ke mi trovos ĉe vi komprenon. Vi estas artisto, patro. Kia pentristo vi estis, antaŭ ol estis al vi komisiite preni sur vin la noblan ŝarĝon de via klerika ofico! Dio pardonu min, sed iam mi bedaŭras ke vi ne restis klinita super la lignaj tabuloj, sur kiuj vi iam sorĉis la plej belajn bizancajn ikonojn.”

Patro Nikeforo anstataŭ respondo refaldis la longajn manikojn de sia sutano kaj etendis al la suno siajn povrajn, nodajn manetojn, kurbigitajn de podagro kiel papagaj ungegoj. ”Ne, ne,” li nur diris. ”Kion vi diras, mia kara!”

”Estas vere, Nikeforo,” diris Prokopio. (Sankta Dipatrino, kiaj teruraj manoj!) ”Viaj ikonoj estas hodiaŭ nepageblaj. Antaŭ nelonge iu hebreo postulis por via bildeto du mil drakmojn, kaj kiam li ilin ne ricevis, li diris, ke li atendas kaj post dek jaroj ricevos trioble tiom.

Patro Nikeforo modeste tusetis kaj ruĝiĝis pro grandega ĝojo. ”Sed lasu tion,” li babiletis. ”Mi petas vin, kiu

parolus pri mia arteto? Ne estas bezonate, mi petas; vi havas tamen tiel favoratajn majstrojn, kiel estas tiu Argiropulos, Malvasias, Papadianos, Megalokastros kaj aliaj, ekzemple tiu, kiel oni nomas lin, kiu faras la mozaikon —”

”Vi opinias Papanastasion?” demandis Prokopio.

”Jes, jes,” murmuris Nikeforo. ”Onidire li estas tre alte taksata. Nu, mi ne scias; sed mi vidus en mozaikoj pli vere masonistadon ol veran pentroarton. Onidire tiu via — nu, kiel oni nomas lin —”

”Papanastacias?”

”Jes, Papanastacias. Laŭdire li estas Kandiano. Siatempe oni taksis kandian skolon alie. Tio ne estas la vera, oni diradis. Tro penegaj linioj, kaj kiaj koloroj! Do vi diras, ke tiu Kandiano estas tiel ege ŝatata? Hm, strange.”

”Nenion tian mi diris,” defendis sin Prokopio. ”Sed ĉu vi vidis liajn lastajn mozaikojn?”

Patro Nikeforo energie kapneis. ”Ne, ne, mia kara. Kion mi vidus en ili! Linioj kiel dratoj, kaj la okulfrapa oro! Ĉu vi rimarkis, ke sur lia lasta mozaiko ĉefanĝelo Gabrielo staras oblikve, kvazaŭ li estus falanta? Ja, tiu via Kandiano eĉ ne scias desegni figuraĉon bone staranta!”

”Nome,” oponis hezite Prokopio, ”hazarde ĉi tion li faris intence, pro kompoziciaj motivoj —”

”Do mi respekte dankas al vi,” elvortis la abato kaj pufigis incitite la vangojn. ”Pro kompoziciaj motivoj!

Oni do povas pro kompoziciaj motivoj malbone desegni, ĉu? Kaj la imperiestro mem iras tion rigardi kaj diras, interesa, tre interesa!” Patro Nikeforo ekregis sian eksciton. ”Desegnaĵo, sinjoro, antaŭ ĉio desegnaĵo: en tio estas la tuta arto.”

”Jen majstro parolas,” flatis rapide Prokopio. ”Mi havas en mia kolekto vian Ĉieliron, sed mi diras al vi, patro, ke ni donus ĝin por neniu Nikaono.”

”Nikaono estis bona pentristo,” diris Nikeforo decide. ”Klasika skolo, sinjoro. Dio, kiaj belaj proporcioj! Sed mia Ĉieliro estas malforta bildo, Prokopio. Tiuj rigidaj figuroj kaj tiu Kristo kun flugiloj kiel cikonio — Home-to, Kristo devas ŝvebi eĉ sen flugiloj! Tion oni nomas arto!” Patro Nikeforo ekscite mungis en manikon. ”Kion fari, ti a m mi ankoraŭ ne sciis pentri. Estis en ĝi nek profundo nek movo —”

Prokopio miregante ekrigardis la kurbajn manojn de la abato. ”Patro, ĉu vi ankoraŭ pentras?”

Patro Nikeforo kapneis. ”Aĥ ne. Ne, ne. Nur iam — tiam mi ion provas por mia ĝojo.”

”Ĉu figurojn?” elvortis Prokopio.

”Figurojn. Filo, nenio estas pli bela ol figuroj. Starantaj figuroj aspektantaj kvazaŭ ili volus ekpaŝi. Kaj post ili fono, en kiun, vi dirus, ili povus retiriĝi. Ĝi estas malfacila, mia kara. Kion scias pri tio tia via — nu, kiel oni

nomas lin — tiu masonisto el Kandio kun siaj misdesegnitaj figuraĉoj!”

”Mi ŝatus vidi viajn novajn bildojn, Nikeforo,” diris Prokopio.

Patro Nikeforo mansvingis. ”Kial? Vi havas ja vian Papanastiason! Grandega artisto, vi diras. Do, jen, komponiciaj motivoj! Nu, se liaj mozaikaj figuraĉoj estas ia arto, mi plu ne scias, kio estas pentroarto. Vi estas ja eksperto Prokopio; vi versimile pravas, ke Papanastias estas genio.”

”Tion mi ne diris,” protestis Prokopio. ”Nikeforo, mi ne venis disputi kun vi pri la arto, sed savi ĝin, dum ne estas malfrue.”

”Kontraŭ Papanastias?” demandis Nikeforo vigle.

”Ne, sed kontraŭ la imperiestro. Vi scias ja pri tio. Lia Majesto imperiestro Konstanteno Kopronimo volas, laŭ insisto de iuj ekleziaj rondoj, malpermesi la pentradon de ikonoj. Laŭdire ĝi estas idolkulto aŭ io. Tia idioteco, Nikeforo!”

La abato kovris la okulojn per velkaj palpebroj. ”Mi aŭdis pri tio, Prokopio,” li murmuris. ”Sed tio ne estas ankoraŭ certa. Ne, ankoraŭ ĝi ne estas preta.”

”Ĝuste tial mi venas al vi, patro,” parolis fervore Prokopio. ”Tion ja ĉiu scias, ke por la imperiestro ĝi estas demando nur politika. Por li neniel gravas idolkulto, sed li volas havi trankvilon. Sed kiam tra la stratoj kuras ka-

najlaro gvidata de malpuraj fanatikuloj kaj kriaças 'for la idolojn', do nia majesta monarko pensas, ke plej oportune estos kontentigi tiun hirtan societaĉon. Ĉu vi scias, ke ili malpurigis la freskojn en la kapelo de La plej Sankta Amo?"

"Mi aŭdis pri tio," ĝemetis la abato kun okuloj fermitaj. "Kia peko, Dipatrino! Tiajn altvalorajn freskojn, el la propra mano de Stefanides! Ĉu vi rememoras la figuron de sankta Sofia, maldekstre de la benanta Kristo? Prokopio, ĝi estis la plej bela staranta figuro, kiun mi iam vidis. Stefanides, homido, estis majstro, superfluas paroli!"

Prokopio emfaze klinis sin al la abato: "Nikeforo, estas skribite en la leĝo de Moseo: Vi faros nek gravuraĵon nek iun similaĵon de la aĵoj, kiuj estas supre en la ĉielo, nek de tiuj, kiuj estas sur la tero malsupre, nek de tiuj, kiuj estas en la akvoj sub la tero. Nikeforo, ĉu pravas tiuj, kiuj asertas, ke estas malpermesite de Dio pentri bildojn kaj skulpti statuojn?"

Patro Nikeforo kapneis, ne malferminte la okulojn. "Prokopio," li elspiris post momento, "la arto estas tiel sankta kiel diservo, ĉar ... ĝi gloras la dian verkon ... kaj instruas ĝin ami." Kaj li skribis per povra mano krucon en aero: "Ĉu ankaŭ la Kreinto ne estis artisto? Ĉu li ne modelis staturon de homo el argilo de la tero? Ĉu li ne pridonacis ĉiun objekton per konturo kaj koloro? Kaj kia

artista, Prokopio! Neniam, neniam ni scios sufiĉe lerni de li. — Cetere tiu leĝo validis nur por la barbaraj tempoj, kiam la homoj ankoraŭ ne sciis bone pentri.”

Prokopio profunde elspiris. ”Mi sciis, patro, ke vi tiel parolos,” li diris respekte. ”Kiel pastro — kaj kiel artista. Nikeforo, vi ne allasos, ke la arto estu detruita!”

La abato malfermis la okulojn. ”Mi? Kion mi povas fari, Prokopio? La tempo estas malbona; la civilizita mondo barbariĝas, venas homoj el Kandio kaj dioscias de kie — Estas terure, mia kara; sed per kio ni povas tion deturni?”

”Nikeforo, se vi parolus kun la imperiestro —”

”Ne, ne,” diris patro Nikeforo. ”Kun la imperiestro mi ne povas paroli pri tio. La imperiestro havas ja neniun rilaton al la arto, Prokopio. Mi aŭdis, ke antaŭ nelonge li laŭdis la mozaikojn de tiu via — nu, kiel vi nomas lin?”

”Papanastacias, patro.”

”Jes. Tiu, kiu faras misedesignitajn figuraĉojn. La imperiestro havas eĉ ne ideon, kio estas la arto. Kaj Malvasias estas laŭ mia opinio same malbona pentristo. Memkomprene, skolo Ravenna. Kaj vidu, tamen ili taskis al li fari la mozaikojn en la kortega kapelo! Ba, ĉe la kortego estas nenio farebla, Prokopio. Mi ne povas ja tien iri kaj peti, ke oni permesu al iu Argiropulos aŭ al tiu, kiel vi nomas tiun Kandianon, Papanastasiason, ĉu? difektadi plu la murojn!”

”Ne pri tio temas,” diris Prokopio pacience. ”Sed konsideru ke — se venkos la ikonoklastoj — estos detruita ĉia arto. Ankaŭ viaj ikonoj estos forbruligitaj. Nikeforo!”

La abato mansvingis. ”Ili estis misaj, Prokopio,” li murmuris. ”Antaŭe mi ne sciis pentri. Desegni figurojn, sinjoro, tion oni ne tiel facile ellernas.”

Prokopio montris per tremanta fingro la antikvan statuon de juna Bakĥo, duone kaŝitan en floranta sovaĝa rozarbusto. ”Ankaŭ tiu statueto estos frakasita,” li diris.

”Kia peko, kia peko,” flustris Nikeforo fermetante dolore la okulojn. ”Ni nomis la statuon sankta Johano Baptisto, sed ĝi estas vera, perfekta Bakĥo. Horojn, horojn mi ĉi tie rigardas ĝin. Ĝi estas kvazaŭ preĝo, Prokopio.”

”Do vidu, Nikeforo. Kaj ĉu tiu dia perfektaĵo estu por eterne detruita? Ĉu disbatu ĝin iu pedika kriaĉanta fanatikulo per martelo je gruzo?”

La abato silentis kun interplektitaj manoj.

”Vi povas savi ĉian arton, Nikeforo,” persvadis Prokopio insiste. ”Via sankta vivo kaj via saĝo havigis al vi grandegan respekton en la eklezio; la kortego vin alte estimas; vi estos membro de la Granda Sinodo, kiu decidos, ĉu ĉiuj statuoj kaj bildoj estas nur instrumentoj por idolkulto. Patro, la sorto de ĉia arto estas en viaj manoj!”

”Vi trotaksas mian influon, Prokopio,” elspiris la abato. ”Tiuj fanatikuloj estas fortaj kaj havas la apogon de

la popolaĉo —” Nikeforo eksilentis. ”Vi diras, ke ili detruus ĉiujn bildojn kaj statuojn?”

”Jes.”

”Kaj mozaikojn ili ankaŭ detruus?”

”Jes. Ili forfrapus ilin de sur plafonoj kaj la ŝtonetojn ili disĵetus sur rubejon.”

”Jen, jen,” diris interesite Nikeforo. ”Do ili ankaŭ disfrapus tiun misdesegnititan ĉefanĝelon Gabrielon de tiu — nu —”

”Versimile jes.”

”Tre bone,” ekridaĉis la abato. ”Ĝi estas ege malbona bildo, homo. Ĝis nun mi ne vidis tiel neeblajn figuraĉojn; kaj pri tio oni diras kompoziciaj motivoj! Mi diras al vi, Prokopio, ke malbona desegnaĵo estas peko kaj blasfemo; tio estas kontraŭ Sinjoro Dio. Kaj tion la homoj adoru? Ne, ne! La vero estas, ke adori malbonajn bildojn estas efektive idolkulto. Mi ne miras, ke kontraŭ tio la homoj ribelas. Ili tute pravas. Kandia skolo estas herezo; kaj tiu Papanastacias estas pli malbona herezulo ol iu Arlano. Do vi diras,” babilis la abato ĝoje, ”ke ili la pentraĉojn disfrapus? Bonajn raportojn vi portas al mi, kara filo. Mi ĝojas, ke vi venis.” Nikeforo pene leviĝis por signi, ke la aŭdienco finiĝis. ”Belan veteron ni havas, ĉu?”

Prokopio leviĝis evidente konsternita. ”Nikeforo,” li

elvortis, sed ankaŭ aliaj bildoj estos detruitaj! Aŭdu, ĉiu arto estos forbruligita kaj frakasita!”

”Nu, nu,” diris la abato kvietige. ”Tio estas granda domaĝo, granda domaĝo. Sed se la mondo estu senigita de malbona desegnaĵo, ni devas ne rigardi tro severe iun misagon. Nur se la homoj ne adoros la misdesegnitajn figuraĵojn, kiajn faras tiu via — nu —”

”Papanastacias.”

”Jes, tiu. Mizerega kandia skolo, Prokopio. Mi ĝojas, ke vi min atentigis je la sinodo. Mi estos tie, Prokopio, mi estos tie, eĉ se oni min devus tien surmane alporti. Ĝis la morto mi riproĉus al mi, se mi ne ĉeestus. Nur se ili disrapos tiun ĉefanĝelon Gabrielon,” ekridis Nikeforo per ŝrumpaj vangetoj. ”Dio kun vi, filo,” li diris, levante la kurbiĝintan manon por beni.

”Dio kun vi, Nikeforo,” ekĝemis senespere Prokopio.

Abato Nikeforo foriris skuetante enpense la kapon. ”Malbona kandia skolo,” li murmuris. ”Plej urĝa tempo por ĉesigi tion al ili ... Aĥ Dio, kia herezo ... tiu Papanastacias... kaj Papadianos... Tio ne estas figuroj, sed idoloj, malbenaj idoloj,” krietis Nikeforo, svingante siajn turmentitajn manojn. ”Idoloj ... idoloj ... idoloj ...”

[1936]

Frato Francisko

Sur ŝoseo al Forli (tie, kie la vojo deflankiĝas al Lugo) haltis ĉe iu forĝisto almozmonaĥo; li estis negranda, iom kurbstatura, kaj estis montranta en larĝa rideto kelkajn flavajn dentojn. "Frato forĝisto," li diris gaje, "Dio donu sanon, hodiaŭ mi ankoraŭ ne manĝis."

La forĝisto rektiĝis, forviŝis la ŝviton kaj pensis ion pri vagemaj homoj. "Envenu," li grumblis. "Peco da fromaĝo estos tie."

La edzino de la forĝisto estis graveda kaj pia; ŝi volis kisi la manon de la monaĥo, sed tiu rapide kaŝis ambaŭ manojn kaj vigle muelparolis: "Ne, patrinjo, sed se mi kiskus vian manon? Min oni nomas frato Francisko, almozulo. Dio vin benu!"

"Amen," elspiris la juna forĝist-edzino kaj iris por pano, fromaĝo kaj vino.

La forĝisto ne estis tre parolema; li rigardis teren kaj ne sciis kion plu. "Kaj de kie, *Domine?*" li demandis fine.

"Nu el Asizo," diris la monaĥo. "Bela peco da vojo, fraĉjo. Ja vi ne kredus, kiom da riveretoj, vitĝardenoj kaj padoj estas en la mondo. Oni ne kapablas ilin trairi kaj

oni devus, homo, oni devus. Ĉie estas dia kreaĵo kaj irante, kvazaŭ vi preĝus.”

”Mi estis foje eĉ en Bolonjo,” diris la forĝisto enpense, ”sed tio jam estas tre longe. Vi scias ja, *Domine*, forĝisto ne povas kunporti sian tutan laborejon.”

La monaĥo kapjesis. ”Forĝi la feron,” li diris, ”estas, forĝisto, kvazaŭ vi servus al Dio. La fajro estas bela kaj sankta. Frato fajro, homido, vivanta dia kreaĵo. Kiam la fero moliĝas kaj eblas ĝin fleksi — kia beleco, forĝisto — aj aj! Kaj rigardi en la fajron — tio estas kvazaŭ vizio.” La monaĥo ĉirkaŭpremis per manoj la genuojn kiel knabo kaj komencis rakonti pri la fajro. Fajro de paŝtistoj, fumantaj fajretoj en vitĝardenoj, flamanta keno, kandelo kaj brulanta arbeto. Dum la forĝist-edzino sternis sur la tablo blankan tolon kaj preparis panon, fromaĝon kaj vinon, la forĝisto distre palpebris, kvazaŭ li rigardus en fajron.

”Patro,” diris mallaŭte la forĝist-edzino, ”ĉu vi ne volus iom manĝi?”

Frato Francisko rompis perfingre la panon kaj rigardis demande la forĝiston kaj lian edzinon. Kaj kion vi havas, vi du, li miris, pro kio vi estas tiel malparolemaj kaj mishumoraj? Tiaj bonaj homoj, knabego kiel urso kaj edzino en benita stato, kio estas kun vi, kio vin deprimas? Al Francisko kreskis la manĝopecoj en la buŝo pro

embaraso kaj malĝojo. Per kio mi vin, homoj diaj, gajigos? Ĉu mi rakontu al vi ŝercaĵojn el vojaĝoj? Ĉu mi kantu kaj saltetu por ĝojigi virinon naskontan?

La pordo iomete apertiĝis. Kaj la forĝist-edzino levis la manon kaj paliĝis. En la pordo montriĝis humila hundkapo kaj timemaj okuloj.

La forĝisto eksaltis, la vejnoj surfrunte sanĝsvelaj, kaj impetis al la pordo. "For, ci malbenita bestaĉo!" li ekmuĝis kaj piedfrapis la pordon. La hundo ekjelpis kaj forkuris.

Frato Francisko tristiĝis kaj en embarasoj knedis el la pano globetojn. "Forĝisto, forĝisto," li elpuŝis, "kion faris al vi tiu dia kreitaĵo?"

La forĝisto sin turnis zorgeme al sia edzino. "Giuliana," li murmuris, "nu, nu! Nu nu!"

La edzino provis rideti, ŝiaj lipoj tremis; ŝi ekstaris pala kaj svenema kaj senvorte foriris. La forĝisto rigardis post ŝi malserene.

"Frato," flustris Francisko aflikte "kial vi pelas vian fraton hundeton for de la tablo? Mi iras."

La forĝisto kolere fortusis. "Do por ke vi sciu, Domine," li diris krude, "tiu hundo —. Je pasko ni atendis viziton. Estis venonta al ni la fratino de la edzino el Forli, ankoraŭ knabineto —. Ŝi ne venis. Post dek kvar tagoj alveturis por ŝi ŝiaj gepatroj ... Ni serĉis la knabineton, nenie spuro post

ŝi. Semajnon antaŭ la pentekosta dimanĉo alkuris nia hundeto de ie el la kampoj kaj trenas ion en la buŝo ĝis la sojlo. Ni rigardis, kio — internaĵoj. Nur poste ni trovis, kio restis de la knabineto —.” La forĝisto mordis siajn lipojn por superi tion. ”Ni ne scias, kiu tion faris al ŝi. Dio punos la murdinton. Sed la hundeto, *Domine* —.” La forĝisto mansvingis. ”Mi ne povas ĝin mortigi, tio estas la plej malbona. Kaj ĝi lasas sin neniel forpeli. Ĝi ĉirkaŭiras la domon kaj petas —. Ĉu vi scias prezenti al vi, *Domine*, kia teruro —.” La forĝisto forte frotis la vizaĝon. ”Ni eĉ ne povas rigardi ĝin. Dum la nokto ĝi hurlas apud la por-do —”

Frato Francisko ekstremis.

”Do vi vidas,” murmuris la forĝisto. ”Pardonu, Domine, mi iros rigardi Giulianan.”

La monaĥo soliĝis en la ĉambro, estis al li preskaŭ naŭze pro la silento. Li iris piedpinte al la domperono. Proksime staras flava tremanta hundaĉo kun vosto inter la kruroj kaj malcerte fiksrigardas lin. Frato Francisko turnis sin al ĝi. La hundeto prove movis la voston kaj jelpis.

”Aĥ, ci povrulo,” murmuris Francisko kaj volis rigardi alien, sed la hundo vostumas kaj ne ĉesas lin fikse alrigardi. ”Nu, kion ci volas?” grumblas frato Francisko embarase. ”Estas al ci malgaje, frateto, ĉu? Malfacila

afero.” La hundaĉo piedumas kaj tremas pro ekscito. ”Nu, nu,” kvietigas ĝin Francisko. ”Neniu volas kun ci paroli, ĉu?” La hundeto jelpas kaj rampas al la piedoj de la monaĥo. Frato Francisko ĝin iel abomenas. ”Iru, iru for,” li persvasas ĝin. ”Ci devis ne fari tion, kamarado. Ĝi estis sankta korpeto de la knabinjo —.” La hundo kuŝas ĉe la piedoj de la sanktulo kaj plorĝemas. ”Ĉesu, mi petas cin,” murmuris Francisko kaj kliniĝas super la hundeto. La hundo rigidiĝis pro la plej streĉa atendado.

En tiu momento la forĝisto kaj lia edzino eliris sur la sojlon, ĉar ili serĉis sian gaston. Kaj jen, antaŭ la domo genuas la monaĥo, gratante post la orelo jelpantan hundaĉon kaj mallaŭte diras: ”Do vidu, frateto, do vidu, mia kara; kial ci lekas miajn manojn?”

La forĝisto snufe ekspiregis. Francisko turnis sin al li kaj timide babilis: ”Komprenu, forĝisto, ĝi tiel petis! Kiel vi nomas ĝin?”

”Bracco,” murmuris la forĝisto.

”Bracco,” diris sankta Francisko kaj la hundeto rapide lekis lian vangon. Frato Francisko leviĝis. ”Jam sufiĉe, frateto, mi dankas vin. Mi iru jam, forĝisto.” Li ne sciis rapide, kiel adiaŭi; li staris antaŭ la forĝist-edzino kaj pensis kun fermitaj okuloj pri iu beno.

Kiam li apertis ilin, genuas antaŭ li la juna edzino kaj havas la manon metita sur la kapo de la flava hundo.

”Dio estu laŭdata,” elspiris Francisko kaj montris la flavajn dentojn. ”Dio repagu tion al vi!”

Kaj la hundeto kvivitante pro sovaĝega ĝojo komencis kuregi en rondo ĉirkaŭ la sanktulo kaj la genuanta virino.

[1932]

Ofiro

La homoj sur la placo de Sankta Marko apenaŭ turnis la kapon, kiam arestistoj kondukis tiun maljunulon al la doĝo. Li estis tre kaduka kaj malpura, oni dirus, ke li estas iu etŝtelisto el haveno.

”Ĉi tiu viro,” anoncis *podestà vicegerente* antaŭ la doĝa trono, ”diras, ke li estas nomata Giovanni Fialho, komercisto el Lisbono; li asertas, ke li estis posedanto de ŝipo kaj ke lin kun la tuta ŝipanaro kaj kargo kaptis alĝeriaj piratoj; li depozicias, ke li sukcesis fuĝi el galero kaj ke li povus fari al la Venecia respubliko eminentajn servojn — kiajn, tion li laŭdire povas konfidi nur al via doĝa ekscelenco mem.”

La maljuna doĝo atente rigardis la hirtan maljunulon per siaj birdokuloj. ”Do vi,” li diris fine, ”vi diras, ke vi laboris sur galero?”

La venigita viro antaŭ respondo nudigis siajn malpurajn maleolojn; ili estis ŝvelintaj de katenoj. ”Kaj dorso,” li aldonis, ”nuraj cikatroj, via doĝa ekscelenco. Ĉu vi bonvolas deziri, ke mi ĝin montru al vi —”

”Ne, ne,” rapidis diri la doĝo. ”Ne estas bezonate. Kion vi volis diri al ni?”

La kaduka vireto levis la kapon. "Disponigu al mi ŝipojn, via doĝa ekscelenco," li diris klare. "Mi kondukos ilin al Ofiro, lando de oro."

"Al Ofiro," murmuris la doĝo. "Ĉu vi trovis Ofiron?"

"Mi ĝin trovis," diris la maljunuleto, "kaj estis tie naŭ monatojn, ĉar mi devis ripari la ŝipon."

La doĝo interŝanĝis rapidan rigardon kun sia dokta konsilanto, la episkopo el Pordenone. "Kie estas Ofiro?" li demandis la maljunan komerciston.

"Trimonatan vojaĝon de ĉi tie," diris la navigisto. "Oni devas ĉirkaŭŝipi la tutan Afrikon kaj poste oni denove navigas norden."

La episkopo de Pordenone atente kliniĝis. "Kaj ĉu Ofiro situas sur la bordo de maro?"

"Ne. Ĝi kuŝas naŭ vojaĝtagojn de la marbordo kaj situas ĉirkaŭe de granda lago, blua kiel safiro."

La episkopo de Pordenone ete kapjesis. "Kaj kiel vi atingis la internon de la lando?" demandis la doĝo. "Oni diras, ke Ofiro estas apartigita de la maro per netransireblaj montoj kaj dezertoj."

"Jes," diris navigisto Fialho, "en Ofiron ne kondukas vojo. La dezerto svarmas de leonoj, kaj la montoj estas vitrecaj kaj glataj kiel vitro el Murano."

"Kaj vi estis trans ili?" elvortis la doĝo.

"Mi estis. Kiam mi estis riparanta la ŝipon ege difektitan de la tempestoj, venis al la bordo homoj, vestitaj

per blanka vesto, purpure borderita, kaj ili mansvingis al ni.”

”Negroj?” demandis la episkopo.

”Ne, monsinjoro. Blankaj kiel Angloj, kaj harojn ili havis longajn, surŝutitajn per ora polvo. Ili estis tre belaj.”

”Nu, kaj ĉu ili estis armitaj?” plu demandis la doĝo.

”Ili havis orajn lancojn. Ili ordonis al ni preni ĉion, kion ni havas el fero, kaj interŝanĝi tion en Ofiro por oro. En Ofiro ja ne estas la fero. Ili mem inspektis, por ke ni prenu ĉiun feron: la ankrojn, ĉenojn, armilojn, ankaŭ eĉ najlojn, per kiuj estis kunigita nia ŝipo.”

”Kaj kio plue?” demandis la doĝo.

”Sur la bordo atendis grego da flugilhavaj ŝarĝbestoj, proksimume sesdek. Ili havis flugilojn kiel cignoj. Oni nomas ilin Pegazoj.”

”Pegazo,” diris enpense la dokta episkopo, ”pri ĝi konserviĝis al ni raportoj jam de antikvaj Grekoj. Ŝajnas do, ke la Grekoj efektive konis Ofiron.”

”En Ofiro nome oni parolas greke,” deklaris la maljuna komercisto. ”Mi scias iom greke, ĉar en ĉiu haveno estas iu ŝtelisto el Kandio aŭ Smirno.”

”Tio estas interesaj informoj,” murmuris la episkopo. ”Kaj ĉu la Ofiranoj estas kristanoj?”

”Dio ne punu min,” diris Fialho, ”ili estas ĝisoste pa-

ganoj, monsinjoro. Ili adoras iun Apolonon aŭ kiel ili lin nomas.”

La Pordenona episkopo skuetis la kapon. ”Tio do konformas. Probable ili estas posteuloj de la Grekoj, alpeli-taj de martempesto post la konkero de Trojo. Kaj kio plue?”

”Plue?” diris Giovanni Fialho. ”Nu ni metis la feron sur la flugilhavajn azenojn. Tri el ni, nome mi, iu Chico el Kadizo kaj Manolo Pereira el Coimbay ricevis flugilhavajn ĉevalojn kaj gvidate de tiuj viroj el Ofiro, ni flugis rekte orienten. La vojaĝo daŭris naŭ tagojn. Ĉiun nokton ni descendis, por ke la Pegazoj povu manĝi kaj trinki. Ili manĝas nur asfodelojn kaj narcisojn.”

”Videble ili estas de greka deveno,” murmuris la episkopo.

”La naŭan tagon ni ekvidis lagon bluan kiel safiro,” daŭrigis la maljuna komercisto. ”Ni descendis sur ĝia bordo. En ĝi estas arĝentaj fiŝoj kun rubenokuloj. Kaj la sablo de tiu lago, via doĝa ekscelenco, estas nuraj perloj, grandaj kiel siliketoj. Manolo falis teren kaj komencis manrasti la perlojn plenmane; kaj tiam diris al ni iu el niaj akompanantoj, ke ĝi estas bonega sablo, el kiu en Ofiro oni preparas kalkon.”

La doĝo ekokulegis. ”Kalko el perloj! Mireginda!”

”Poste oni kondukis nin en la reĝan palacon. Ĝi estis tute el alabastro, nur la tegmento estis el oro kaj brilis

kiel suno. Tie nin akceptis la Ofira reĝino, sidanta sur kristala trono.”

”Ĉu en Ofiro regas virino?” ekmiris la episkopo.

”Tiel estas, monsinjoro. Virino de impona beleco, simlanta al iu diino.”

”Versimile iu el Amazonoj,” opiniis la episkopo mediteme.

”Kaj kion la aliaj virinoj,” vortigis la doĝo, ”sciu, mi opinias la virinojn ĝenerale, ĉu estas tie belaj virinoj?”

La navigisto kunplektis la manojn. ”Aĥ, via doĝa ekscelento, tiaj eĉ ne estis en Lisbono dum mia junaĝo.”

La doĝo managitis. ”Ne diru! En Lisbono, onidire, la virinoj estas nigraj kiel katoj. Sed en Venecio, homido, en Venecio antaŭ proksimume tridek jaroj, tiam estis virinoj! Kvazaŭ de Tizian! Kaj kion la virinoj en Ofiro, rakontu!”

”Mi estas maljuna, via ekscelenco,” diris Fialho, ”sed Manolo povus rakonti, se ne mortigus lin la Muzulmanoj, kiuj nin kaptis apud la Balearoj.”

”Ĉu li povus multon rakonti?” deniandis la doĝo interese.

”Madono,” ekkriis la maljuna navigisto, ”tion vi, ekscelenco, kredus eĉ ne al li. Mi diras, kiam ni tie pasigis dek kvar tagojn, vi estus povinta la tutan Manolon elskui el pantalono.”

”Kaj kion la reĝino?”

”La reĝino havis feran zonon kaj ferajn braceletojn. Laŭdire vi havas feron, ŝi diris; al ni iam liveras la feron arabaj komercistoj.”

”Arabaj komercistoj!” ekkriis la doĝo kaj pugnofrapis la apogilon. ”Jen vi vidas, ĉie nin kanajloj elpuŝas el la merkatoj! Tion ni ne toleros, ĉi tie temas pri la plej altaj interesoj de la Venecia respubliko! En Ofiron devas liveri ni, kaj punkto! Mi donos al vi tri ŝipojn, Giovanni, tri ŝipojn plenajn de fero ”

La episkopo levis la manon. ”Kaj kio plue, Giovanni?”

”La reĝino ofertis al mi por ĉiu mia fero egalan pezon da oro.”

”Kaj vi tion, memkomprene, akceptis, vi ŝtelisto!”

”Mi ne akceptis, monsinjoro. Mi diris, ke mi vendas la feron ne laŭ pezo, sed laŭ volumeno.”

”Ĝuste,” diris la episkopo. ”Oro pli pezas.”

”Speciale oro el Ofiro, monsinjoro. Ĝi estas trioble pli peza ol la ordinara oro kaj estas ruĝa kiel fajro. La reĝino do ordonis, ke oni forĝu el la oro egalan ankron, egalajn najlojn, egalajn ĉenojn kaj egalajn glavojn, kiaj estis la niaj feraj. Tial ni devis kelkajn semajnojn atendi.”

”Kaj kial ili bezonas feron?” miris la doĝo.

”Ĉar ĝi estas por ili maloftaĵo, via ekscelenco,” diris la maljuna komercisto. ”Ili pretigas el ĝi juvelojn kaj monon. Ili kaŝas ferajn najlojn en kestoj kiel trezoron. Ili diras, ke fero estas pli bela ol oro.”

La doĝo mallevis la palpebrojn, similajn al palpebroj de meleagro. "Mirinda," li murmuris. "Tio estas, Giovanni, eksterordinare mirinda. Kaj kio poste okazis?"

"Poste ili ŝarĝis per tiu oro la flugilhavajn mulojn kaj transportis nin egalmaniere al la marbordo. Tie ni kunigis la ŝipon per oraj najloj kaj pendigis oran ankron per ora ĉeno. La ŝiritajn ŝnuregaron kaj velojn ni anstataŭis per silkaj kaj ekŝipis per favora vento hejmen."

"Kaj la perloj," diris la doĝo, "ĉu neniujn perlojn vi kunprenis?"

"Ni ne kunprenis," diris Fialho. "Mi petas pardonon, da ili tie estis ja kiel da sablo. Nur kelkaj perleroj implikiĝis en niajn ŝuojn kaj ankaŭ tiujn forprenis de ni la alĝeriaj paganoj, surpriz-atakintaj nin apud Balearoj."

"Ŝajnas," murmuris la doĝo, "ke ĉi tiu priskribo estas sufiĉe versimila."

La episkopo iomete jesis. "Kaj kio pri la bestoj," li rememoris. "Ĉu ekzistas en Ofiro iuj centaŭroj?"

"Mi ne aŭdis pri ili, monsinjoro," diris respekte la navigisto. "Sed estas tie fenikopteroj."

La episkopo eksnufis tra la nazo. "Vi versimile eraras. Fenikopteroj estas ja en Egiptio — estas konate, ke ili havas nur unu piedon."

"Kaj ili havas tie sovaĝajn azenojn," aldonis la navigisto, "striitajn nigre kaj blanke, egalmaniere kiel tigroj." La episkopo levis suspekto la okulojn. "Vi, ĉu vi ne volas nin

paroltrompi? Kiu iam vidis striitajn azenojn? Unu afero mirigas min, Giovanni. Vi asertas, ke trans la Ofiran montaron vi flugis sur flugilhavaj muloj.”

”Tiel estas, monsinjoro.”

”Hm, ni rigardu. Laŭ arabaj raportoj vivas en la Ofiraj montoj la birdo Grifo, kiu, kiel konate, havas metalan bekon, metalajn ungegojn kaj bronzajn plumtubojn. Ĉu vi aŭdis nenion pri ĝi?”

”Mi ne aŭdis, monsinjoro,” balbutis la navigisto.

La episkopo de Pordenone skuis konsidereme la kapon.

”Trans la montojn, homido, ne eblas flugi, tion vi ne kredigos al ni; ja tie, kiel pruvite, vivas la birdo Grifo. Estas teknike neeble, la birdo Grifo forbekus la Pegazojn kiel hirundo muŝojn. Homo, nin vi ne superruzos. Kaj kio, vi fripono, kiaj arboj tie kreskas?”

”Nu, kiaj arboj,” eligis el si la malfeliĉulo, ”estas konate, kiaj arboj. Palmoj, monsinjoro.”

”Do vidu, kiel vi mensogas,” diris la episkopo venke.

”Laŭ Bubono el Biskro, kiu estas aŭtoritato en ĉi-aferoj, kreskas en Ofiro granatarboj, kiuj havas karbunkolojn anstataŭ kernoj. Vi elpensis, kamarado, malsaĝan historion!”

Giovanni Fialho falis genuen. ”Kiel estas Dio super mi, monsinjoro, kiel mi, malklera komercisto, povus elpensi Ofiron?”

”Al mi vi ion rakontos,” mentoris lin la dokta episkopo, ”mi scias pli bone ol vi, ke en la mondo ekzistas Ofiro, lando de oro; sed, kio koncernas vin, vi estas mensogulo kaj fripono. Tio, kion vi diras, kontraŭas al fidindaj fontoj kaj estas do mensoga. Via doĝa ekscelenco, tiu ulo estas trompisto.”

”Denove unu,” ekĝemis la maljuna doĝo, zorgoplene palpebrante. ”Terure, kiom da aventuruloj ekzistas hodiaŭ. Forkonduku lin!”

Podestà vicegerente demande ekrigardis.

”Kiel ordinare, kiel ordinare,” oscedis la doĝo. ”Lasu lin sidi, ĝis li bluiĝos, kaj poste vendu lin por galero. Domaĝe,” li murmuris, ”ke li estas trompulo: kelko el la dirita havis ian kernon ... Versimile li aŭdis tion de la Araboj.”

[1932]

Goneril, filino de Lear

Ne, nenio estas al mi, vartistino, — kaj ne diru al mi Nora knabinjo. Mi scias, ke vi tiel diris al mi, kiam mi estis malgranda; kaj reĝo Lear diris al mi vi bubo et-ula, ĉu vi scias? Li prefere estus havinta filon, — kion vi pensas, ĉu filoj estas pli bonaj ol knabinoj? Regan estis de ĉiam fraŭlineto, kaj Kordelia — vi scias ja: la muŝoj manĝu min. Vigla kiel lignoŝtipo. Kaj Regan — oni eĉ ne supozus tion ĉe ŝi: la nazon supren, kiel reĝino, sed egoistino, ĉu vi memoras? En ŝi tio estis de ĉiam. Diru, avino, ĉu mi estis malbona, estante malgranda. Do vidu.

Kiel okazas, ke la homo iĝas malbona? Mi scias, vartistino, ke mi estas malbona. Ne diru, ankaŭ vi tion pensas. Al mi estas indiferece, kion vi ĉiuj pensas pri mi. Eble ankaŭ malbona: sed en tio, kio estis kun la patro, mi pravis, vartistino. Kial li nur obstinis en tio, ke li devas treni kun si tiujn cent siajn viraĉojn, kaj se ili estus nur cent: sed krome ankoraŭ ĉiaspeca servistaro, — tio simple ne estas ebla. Lin mi tre ŝatus vidi, je mia animo, vartistino, mi amis lin, treege amis, multe pli ol iun alian en la mondo; sed tiu lia bando, Kristo Sinjoro. — Ili faris ja el mia domo bordelon! Nur rememoru, vartistino,

kiel ĉi tie aspektis: nuraj mallaboremuloj, nura rumoro kaj kvereloj kaj kriado, kaj da malpuraĵo, nu vi scias —. Pli malbona ol sterkejo. Diru, vartistino, kiu domestrino ti o n tolerus? Kaj ordoni al ili oni ne povis, ba ne! al i l i povis ion ordoni nur reĝo Lear. Al mi ili nur rikanis. Nokte ili faris vizitojn al la servistinoj — senĉese estis ie aŭdeble paŝ', paŝ', kaj susuro kaj pepado — la duko dormis kiel ligno; mi vekas lin, ĉu vi aŭdas? Kaj li murmuris, lasu ilin kaj dormu. — Imagu, vartistino, kiel estis al mi ĉe tio! Ankaŭ vi estis juna, vi scias tion imagi, ĉu? Kiam mi plendis al reĝo Lear, li eĉ priridis min: sciu knabino, kion alian vi povas atendi de la viroj? Ŝtopu viajn orelojn, kaj prete.

Kaj mi do diris al li, ke tio ne estas ebla, ke li devas almenaŭ duonon de tiuj nenifaruloj forigi. Kaj sciu, li ofendiĝis. Ke estas maldanko kaj simile. Li terure furioziz, vi eĉ ne povas imagi. Sed mi scias ja, kio povas esti kaj kio ne; i l i devas zorgi nur pri tiu sia honoro, sed ni virinoj, ni devas pensi pri la domo kaj ordo. Al ili estas indiferente, eĉ se ĉi tie estus kvazaŭ en ĉevalejo. Diru, vartistino, ĉu mi pravis aŭ ne? Do, vidu. Kaj paĉjo morte ofendiĝis. Kion mi devis fari? M i s c i a s, avino, kio estas mia devo al li, sed kiel virino mi ankaŭ havas devon al mia domo, kion vi pensas? Kaj pro tio paĉjo min malbenis. Kaj la duko — li nur palpebris kaj sendecide staris. Ĉu vi pensas, ke li defendis min? Ne. Li toleris trak-

ti min kiel malbonan, bagateleman, kvereleman virinon. Vartistino, ĉu vi aŭdas, vartistino, en tiu momento io en mi iel krevis: mi — mi — mi komencis malami mian edzon. Mi malamas lin, bone sciuiton! Mi malamas! Kaj mi malamas paĉjon, ĉar li estas kulpa pri tio, ĉu vi komprenas? Jes ja tiel estas, jes ja tiel estas; mi estas malbona, mi scias, sed mi estas malbona nur tial, ĉar mi pravis —

Ne, ne parolu; mi vere estas malbona. Vi scias ja, avino, ke mi havas amanton, ĉu? Se vi scius, kiel indiferente estas al mi, ke vi tion scias! Ĉu vi pensas, ke mi amas Edmondon? Mi ne amas; sed mi volas iel venĝi por tio, ke la duko ne kondukis virece. Simple mi malamas lin. Vartistino, eĉ ne ideon vi havas, kio estas malami! Tio signifas esti malbona, malbona, plenplene malbona. Kiam oni komencas malami — kvazaŭ oni tute ŝanĝiĝus. Mi estis tute bona knabino, kaj povis esti el mi bona edzino; mi estis filino, estis fratino, kaj nun mi estas nur malbona. Mi ankaŭ jam vin ne amas, avino, nek min, nek min. Mi pravis; se ili estus tion agnoskintaj, mi estus alia, kreu al mi —

Ne, mi ne ploras. Ne pensu, ke tio min iel suferigas. Male, oni estas pli libera, malamante. Oni povas pensi kion ajn — antaŭ nenio oni devas halti. Vidu, antaŭe mi ne kuraĝis vidi ĉe mia edzo, ke li estas antipatia, ke li estas dikventra, ke li estas pantoflulo, ke liaj manoj ŝvi-

tas; kaj nun mi vidas tion. Nun mi vidas, ke paĉjo Lear estas ridinda tirano, ke li estas sendenta kaj freneza maljunulaĉo — ĉion mi vidas. Ke Regan estas vipuro kaj mi, vartistino, ke mi havas en mi tiajn strangajn kaj terurajn aferojn — antaŭe mi tion eĉ ne scietis. Subite ĉio ĉi venis. Diru, ĉu tio estas mi a kulpo? Mi pravis; ili ne devis peli min tiel ekstreman. Tion vi ne povas kompreni, vartistino. Iam mi pensas, ke mi povus murdi la dukon, ronkanta apud mi. Simple per ĉastranĉilo lin buĉi. Aŭ veneni Regan. Jen, fratinjo, trinku vinon. Ĉu vi scias, ke Regan volas forlogi de mi Edmondon? Ne ĉar ŝi amus lin; Regan estas malvarma kiel ŝtono. Sed ŝi faras tion kontraŭ mi. Kaj ŝi kalkulas kun tio, ke Edmundo iel forigos tiun malsaĝulon dukon kaj mem uzurpos la tronon post Lear. Nepre tiel estas, vartistino. Regan estas nun vidvino — tiu lacerto havis de ĉiam feliĉon. Sed ne pensu, ke ŝi sukcesos: mi atentis kaj malamas. Mi eĉ ne dormas, nur por povi pensi kaj malami. Se vi sciis, kiel oni en mallumo bele kaj senfine malamas. Kaj se mi rememoras, ke ĉio ĉi venis nur pro obstino de la paĉjo kaj iu malordo en la domo — Diru, tion neniu mastrino povus toleri.

Vartistino, vartistino, vartistino, kial ili tiam ne vidis, ke mi pravis!

[1933]

Hamleto, princo dana

[Sceno deka]

(Rosenkrantz kaj Guildenstern estas forirontaj)

HAMLETO

Momenton sole, kara Guildenstern,
nur vorton, Rosenkrantz!

GULDENSTERN

Bonvolu, princo?

ROSENKRANTZ

Vi deziras, princo?

HAMLETO

Nur demando.
Kiel la prezentado porkortega,
la tragedi' pri reĝo veneninto,
efikis je la reĝo?

ROSENKRANTZ

Terure, princo.

HAMLETO

Terure, ĉu?

GULDENSTERN

La reĝo perpleksiĝis.

HAMLETO

Kaj la reĝino?

ROSENKRANTZ

La reĝin' svenemis.

HAMLETO

Kaj la ceteraj?

GUILDENSTERN

Kiuj, princa moŝto?

HAMLETO

Nu, vi kaj korteganoj, sinjorinoj
kaj ĉiu ĉeestanta en la ĉambro,
dum oni ludis tion. Kion ili?

ROSENKRANTZ

Nenion, princo.

GUILDENSTERN

Ilin ĉio ravis,
ke eĉ ne vorton ili povis diri.

HAMLETO

Kaj Polonio?

GUILDENSTERN

Polonio ploris.

HAMLETO

La korteganoj?

ROSENKRANTZ

Ili plorsingultis.

Mi mem ne povis, princo, teni larmojn

kaj vidis, ke amiko Guildenstern
l' okul-roson kaŝis per maniko.

HAMLETO

Kaj la soldatoj?

GUILDENSTERN

Turnis for vizaĝon,
por kaŝi sian fortan emociion.

HAMLETO

Vi pensas do, ke tiu ludo estis —

ROSENKRANTZ

Sukces' grandega.

GUILDENSTERN

Jes, sed meritita.

ROSENKRANTZ

La brila ludkonstru'!

GUILDENSTERN

La scen-vigleco!

HAMLETO

La teatraĵo tamen havis mankojn —

ROSENKRANTZ

Pardonu, princo, kiajn?

HAMLETO

Hm, ekzemple ...

La ludo povis esti ja pli bona.

Mi scias, l' aktoroj faris, kio eblis,
tamen ilia reĝ' ne estis reĝo,

nek la murdint' murdinto. Ho, sinjoroj,
se la murdinton estus mi ludinta
tiam — mi ĵuras al vi per Hekata,
eĉ mem murdint' ekkonus veran murdon!
Prijuĝu mem! (*Li ludas.*)

ROSENKRANTZ

O, princo, grandioze!

GULDENSTERN

Ludite brile!

ROSENKRANTZ

Oni dirus vere,
ke fakte vidis vi murdinton iam
kaŝiri al laboro terurega.

HAMLETO

Ne, Rosenkrantz, ĝi ja en mi troviĝas,
— de kie kaj por kio? Kiu scias? Ĉit, aŭdu!

GULDENSTERN

Kion, princ'?

HAMLETO

— Sekreton mian.

ROSENKRANTZ

Aj, princ', ĉu vere?

HAMLETO

Eĉ sekreton grandan.
Nenion por oreloj korteganaj,
nur por amikoj la plej bonaj. Venu!

GUILDENSTERN

Princo!

HAMLETO

Nenia princ'!

GUILDENSTERN

Ne, via moŝto.

HAMLETO

Nur Hamleto.

GUILDENSTERN

Laŭ via volo, princo.

HAMLETO

Do, aŭskultu,

kaj ĉe vi tenu kaŝe mian planon
maturiĝintan plene.

ROSENKRANTZ

Kian, kara princo?

HAMLETO

Aktoro estos mi.

ROSENKRANTZ

Ĉu vere, princo?

HAMLETO

Jam decidite Rosenkrantz. Mi morgaŭ
intencas iri for kun la aktoroj.

De urb' al urbo ludi tiun ludon
pri l' granda reĝo, kiun oni murdis;
pri la murdinto, kiu post li venis

sur lian tronon kaj en lian varman
edzegan liton; kaj pri la reĝino,
vidvina eĉ ne dum monato unu,
kaj petolanta jam en ŝvita lito
kun friponaĉ', murdisto kaj ŝtelisto
ŝtelinta regnon ... Ju pli mi pripensas,
des pli allogas min figuro lia.
Ej, ludi lian tutan abomenon,
la fian kaj perversan serpentaĉon,
kiu infektas, kion ajn li tuŝas,
— ej, kia rolo! Estus nur necese
alie ludi ol l' aktoro migra,
— li penas, penas, tamen li malfortas
por tiom da fiaĵoj. Tiun reĝon
li povas ludi. Sed ne l' kanajlon.
Por lia rol' li ne sufiĉe grandas.
Domaĝe pri la rolo! Mi ĝin ludus,
penetras al li en gluecan menson,
kaj mi elpremus ĝis l' lasta gutu
ĉioman hom-malvirton! Kia rolo!

GUILDENSTERN

Kaj kia teatraĵ'!

HAMLETO

Ne tute misa —

ROSENKRANTZ

Bonega eĉ!

HAMLETO

Mi devis ĝin pli fajli,
kaj — Eble mi revenos al la temo,
ĝi indas tion; min la reĝ' perfida,
la fia, abomena karaktero
treege logas. Kara Rosenkrantz,
mi volas skribi dramojn.

ROSENKRANTZ

Brave, princo!

HAMLETO

Mi verkos, verkos. Temoj ja abundas.
Tiu kanajlo — la unua. Dua:
pri korteganoj fiaj kaj flataĉaj —

ROSENKRANTZ

Brilege, princo!

HAMLETO

Tria: komedio
pri idioto, aĝa ĉambelano —

GUILDENSTERN

Bonega temo!

HAMLETO

Kvara ludo temos
knabinon unu.

ROSENKRANTZ

Kia ludo?

HAMLETO

Ludo.

GULDENSTERN

Tre multpromesa temo.

ROSENKRANTZ

Poezia.

HAMLETO

Kaj Hamleto skribos. Sur la tron' fripono
la homojn senhaŭtigos sen tranĉilo,
la korteganoj dorsojn kurbigados,
kaj Hamleto verkos. La militoj daŭros,
pli aĉe fartos la malfortaj homoj,
la fortaj male. Kaj Hamleto skribos,
kaj li ne movos manon, ne leviĝos
por ion fari —

GULDENSTERN

Kion, princo?

HAMLETO

Kion?

Mi ja ne scias, kion oni faras
kontraŭ malbona rega politiko.

ROSENKRANTZ

Nenion, princo.

HAMLETO

Nenion?

GUILDENSTERN

Nu, aperas
de temp' al temp' en historio viroj,
kiuj stariĝas frunte de l' popolo
kaj per ekzemplo aŭ per elokvento
ĝin decidigas rompi per ribelo
malbonan regantaron.

ROSENKRANTZ

Tio, princo, okazas tamen nur en historio.

HAMLETO

Jen, jen. Nur en la histori'. Vi diras,
ilia elokvent' ekmovas homojn?
Malĝojo mutas. Devas iu veni
precize nomi la aferojn: vidu,
jen subpremado, jen maljusta ago,
jen oni fie krimas kontraŭ ĉiu,
kaj kiu via reĝ' sin nomi volas,
estas ŝtelist', murdisto, malĉastulo,
— jen la afero. Kiuj estas viroj,
ĉu vi toleros la senhonorigon?
ĉu via man' ne prenos glavon, klabon?
ĉu tiu senhonoru vin jam kastris?
Vi estas sklavoj, kiuj jam toleras
la vivon sen honor' —?

GUILDENSTERN

Vi elokventas.

HAMLETO

Aj, elokventas? Mi stariĝu do
kaj — kiel en la histori' — mi kreu
la voĉon de l' popola per elokvento?

ROSENKRANTZ

Jes ja, popolo via certe estas
sindona al vi, princ'.

HAMLETO

Kaj poste frunte
de la popol' ekstari kaj renversi
la putran tronon?

GULDENSTERN

Sed ĝi, mia princo,
jam estas politik'.

HAMLETO

Ho, stranga sento,
antaŭ si vidi tiel grandan taskon!
Sinjoroj, dankon.

ROSENKRANTZ

Ni ne ĝenos, princo.
(*Rosenkrantz kaj Guildenstern foriras.*)

HAMLETO

Ĉu esti aŭ ne esti, jen demando.
Kaj se jam esti, kiu do? Ĉielo,
reĝido esti, jes! Ĉe la trono stari,
rideti nur ĝentile kaj lojale,

— ĉu ne sur tron’? Ne, tie jam alia!
Atendi lian morton, ĝis la sango
nigrega en li haltos! Tiel? Ne,
prefere tiun bruston perfidulan
trapiki per ponard’ kaj tiel venĝi
la morton de la patro. Honton lavi
de la lit’ patrina! Kial mi hezitas?
Ĉu estas mi timulo? — Ho, ne tiel.
Mi sorbas per okul’ la fian vangon,
malĉastajn lipojn, lian vagan vidon
kaj sentas: nun mi havas lin kaj povus
fidele bildi lin. Mi provas kaŝe
la fivizaĝon preni. Kia rolo!
Aktoro esti, jes, mi malvualus
la tuton de l’ senhonta malboneco,
kiun subkaŝas la buŝaĉ’ ridanta —
Ĝi logas, logas tre. — Sed tiun vangon
rekonus nur la homoj de l’ nuntempo,
— neniu plu? — Prefere por eterne lin
pruvi kulpa kaj la homajn monstrojn
kaj ĉion putran, kion li arigis
en ŝtato dana! Kia loga tasko!
— Mi estas ja poeto! Mi do povas
akuzon skribi daŭran por jarcentoj,
kaj per fingro, kiu ne putriĝos,
al ĉiuj montri la ulceron pusan —

Jen, kia elokvent'! ĉu ne domaĝe,
se mi ĝin sole por mi mem malŝparas?
Ĉu sur foiro kunvenigi homojn
paroli kaj paroli — Ja ne estas
ili el koto. Elokventa homo
povus elfrapi el iliaj kapoj
purigan fulmon kontraŭ la tiranoj!
Ĝi logas, logas — Tamen mi ne povus
prezenti lin. Domaĝe! Kia aktoro
mi estus! Sed se estus mi aktoro,
ne povus mi inciti fulmotondron
fraponta tronojn? — Sed mi ĉi-okaze
ne povus skribi verkojn jam! Domaĝe!
— Do, kion diable? Ĉu lin senmaskigi
per ludo sur scenej', aŭ por eterne
alnajli sur la pord' kiel vesperton,
aŭ detronigi per popol' kolera?
Nu, kion do? — Kaj kion se, supoze,
mi nur kredigas min, ke mi venĝemas?
Aktoro esti por deŝiri maskon
de l' vizaĝaĉ'? Se ludi, do pro tio,
ke estas ĝi en mi kaj mi devas
la homfigurojn el mi mem kreadi,
ĉu bonajn aŭ malbonajn! Lin prezenti
mi vere pleje ŝatus, — kia rolo! —
Aktoro simple esti! Aŭ nur verki,

ne pro venĝem', sed pro la nura ĝojo,
ke ĉiu vort' sub mia man' viviĝas —
Kaj kial verki nur? Kaj ne paroli?
Do esti orator', popolon gvidi,
paroli kaj paroli kiel birdo
belege, rave kantas, ke mi fine
min mem konvinkus kaj ekkredus, kion
mi diras! — Jes ja. Esti plene iu,
jen estas tiu liberiga vorto!
Aktori? Verki? Iri kun popolo?
Do kion? Ho, infero! Kian rolon
Hamlet' elektu? Kion mi kapablos
estante fine iu! — Jes, sed kiu?
Jen la demando!

[1934]

La konfeso de Donjuano

La morto de la malfeliĉa Dona Elvira estis venĝita; Donjuano Tenorio kuŝis kun trapikita brusto en *Posada de las Reinas* kaj videble estis mortanta. "Emfizemo de pulmo," murmuris la loka doktoro. "Iu ankoraŭ resaniĝus el tio, sed *caballero* tiel kaduka kiel Donjuano —. Estas ja malfacilaj aferoj, Leporello; por diri al vi, al mi ne plaĉas lia koro. Nu, memkompreneble: post tiaj ekscesoj *in venere* — klare astenia kazo, sinjoroj. Pro certeco, Leporello, mi venigus paroĥestron, eble li ankoraŭ rekonsciiĝos, kvankam laŭ la nuna stato de la scienco — mi ne scias. Mi havas la honoron adiaŭi vin, *caballeros*."

Tiel okazis, ke Padre Jacinto eksidis ĉe la piedoj de Donjuano kaj atendis, ĝis la paciento rekonsciiĝos el la sveno; dume li preĝis por lia notore peka animo. Se mi sukcesus savi tiun inferan pekulon, pensis la bona pastro; li ŝajnas esti ege likvidita — eble ĝi humiligos lian arogantecon kaj alkondukos lian menson en staton de pentanta bedaŭro. Ne al ĉiu okazas ricevi en la manojn tiel faman kaj senkonscienan diboĉulon; homido, tian raran kaŭzon eble ne havis eĉ la episkopo de Burgoso.

Nu, la homoj flustros: Jen Padre Jacinto, jen, kiu savis la animon de Donjuano —.

Padre ekstremis kaj krucsignis sin; unue li rekonsciigis el tiu diabla tentado de fierego, parte li konsciigis al si, ke lin fikse alrigardas la brulaj kaj kvazaŭ mokaj okuloj de la mortanta Donjuano.

”Kara filo,” diris la honorinda Padre tiel afable, kiel li nur sciis, ”vi mortas; post nelonge vi staros antaŭ la juĝa katedro de Dio ŝarĝita de ĉiuj pekoj, kiujn vi faris en via porkula vivo. Mi petas vin pro amo de nia Sinjoro, demetu ilin, dum vi havas tempon; ne decas, ke vi migru en la transan mondon vestita per malpura robo de viaj malvirtoj kaj makulita de malpuraĵo post viaj surteraj agoj.”

”Jes,” aŭdiĝis Donjuano. ”Ankoraŭ foje alivesti sin. Padre, ĉiam mi atentis esti vestita konforme al la cirkonstancoj.”

”Mi timas,” diris Padre Jacinto, ”ke ne sufiĉe vi komprenis. Mi demandas vin, ĉu vi volas pente konfesi viajn malvirtojn.”

”Konfesi,” ripetis senenergie Donjuano. ”Multe nigrigi min. Aĥ, patro vi ne kredus, kiel ĝi efikas je virinoj.”

”Juano,” morniĝis la bona pastro, ”lasu jam la surterajn aferojn; memoru, ke vi estos parolonta kun via Kreinto.”

”Mi scias,” diris Donjuano ĝentile. ”Ankaŭ mi scias, ke

decas morti kiel kristano. Ĉiam mi atentis, kio decas — laŭeble, patro. Per mia honoro, mi diros ĉion sencere monie; unue por longaj paroloj mi estas tro malforta kaj due ĉiam estis mia principo iri al la celo rekte kaj sen flankiroj.”

”Mi laŭdas vian rezignacion,” diris pastro Jacinto. ”Sed une, kara filo, bone preparu vin, esploru vian konsciencon kaj veku en vi humilan penton pro viaj malvirotoj. Dume mi atendas.”

Post tio Donjuano fermis la okulojn kaj esploris sian konsciencon, dume Padre mallaŭte preĝis pri Diaj helpo kaj revelacio.

”Mi pretas, patro,” aŭdiĝis Donjuano post nelonge kaj komencis konfesi. Padre Jacinte kontente kapskuis: la konfeso ŝajnis esti sincera kaj kompleta; mankis en ĝi nek mensogo kaj blafemo, murdo, falsĵuro, fierego, nek trompo nek perfido — Donjuano estis vere peza pekulolo. Kaj subite li eksilentis kvazaŭ laca kaj fermis la okulojn.

”Ripozu, kara filo,” stimulis lin la paroĥestro pacience, ”kaj poste daŭrigu.”

”Mi finis, honorinda patro,” diris Donjuano. ”Se mi ion forgesis, tio estas certe nur bagateloj, kiujn Dio bonvolos pardoni al mi.”

”Kiel?” ekkriis pastro Jacinto, ”tion vi nomas bagateloj? Kaj la malĉastado, tra kiu vi vadis dum via tuta vivo,

la virinoj, kiujn vi delogadis, viaj malpuraj pasioj, kiujn vi senbride troĝuadis? Nur knabeto, bele konfesu; antaŭ Dio, ci senmoralulo, estas sekretigita neniu el viaj malĉastaj agoj; prefere pentu viajn fiagojn kaj senpezigu vian pekan animon!”

Sur la vizaĝo de Donjuano aperis mieno dolora kaj senpacienca. ”Mi jam diris al vi, patro,” li diris obstinege, ”ke mi finis. Per mia honoro, nenio plu direndas al vi.”

Tiumomente la gastejestro de Posada de las Reinas ekaŭdis bruegan kriadon el la ĉambro de la vundito. ”Dio kun ni,” li ekvokis kaj krucsignis sin, ”ŝajnas, ke Padre Jacinto ekzorcas la diablon el la povra sinjoro. Miadio, tiajn aferojn mi vere ne ŝatas en mia gastejo.”

La menciita kriado daŭris tre longe, tiel longe, ĝis oni kuirpretigus fabojn; de temp’ al tempo ĝi obtuziĝis en energia admonado, de temp’ al tempo ĝi ektondris en sovaĝa muĝo; subite elpafiĝis el la ĉambro de la vundita sinjoro Padre Jacinto, punca kiel meleagro, kaj vokante Madonon, fuĝis en preĝejon. Poste estis silente en la gastejo; nur la afliktita Leporello englitis en la ĉambron de sia sinjoro, kiu kuŝis kun fermitaj okuloj kaj ĝemis.

Posttagmeze alveturis en tiun lokon Padre Ildefonso de *Societas Jesu*, veturante sur mulo el Madrido al Burgo; kaj ĉar tiutage estis tro varme, li descendis apud la paroĥejo kaj vizitis patron Jacinton. Li estis malgrasega

pastro, sensuka kiel malnova kolbaso kaj kun brovo tiel hirta kiel akselo de maljuna kavaleriano.

Post kiam ili kune eltrinkis kazeiĝintan lakton, la jezuito fiksitis rigardon al patro Jacinto, vane penanta kaŝi, ke io lin afliktas. Estis tia silento, ke la zumado de muŝoj ŝajnis preskaŭ sonego.

”Nome, tiel estas,” fine subite ekparolis la afliktita Padre Jacinto. ”Ni havas ĉi tie pezan pekulon, kuŝantan agonie. Vi devas scii, Don Ildefonso, li estas la misfama Donjuano Tenorio. Li havis ĉi tie amaferon, duelon aŭ kion — koncize mi iris konfesiĝi lin. Komence ĉio iris kun li tre ĝojige, tre bele li konfesis, ververe; sed kiam venis la sesa el la dekalogo — nenion mi sukcesis eligi de li, eĉ ne unu vorton. Kaj ke li havas nenion direndan al mi. Madono, tiu kanajlo! Se mi konsideras, ke li estas la plej granda diboĉulo de ambaŭ Kastilioj — nek en Valencio nek en Kadizo onidire iu povas lin egali. Oni diras, ke dum la lastaj jaroj li delogis sescent naŭdek sep knabinojn — el ili cent dek tri foriris en monaĥinejon, ĉirkaŭ kvindek mortigis iliaj patroj aŭ edzoj en justa kolerero kaj al la proksimume sama nombro krevis la koro pro aflikto. Kaj nun imagu, Don Ildefonso, ke tia voluptulo asertas al mi sur la mortlito en la vizaĝon, ke li *in puncto* de amorado havas nenion por konfesi! Kion vi diros pri tio.”

”Nenion,” diris la patro jezuito. ”Kaj vi rifuzis al li la absolvon?”

”Memkomprene,” respondis Padre Jacinto deprimate. ”Ĉiuj paroloj estis vanaj. Mi admonis lin, ke en ŝtono mi devus vekigi pentofaradon, sed ĉi tiun protokanajlon ne pre nenio efikas. Jes, pri fierego mi pekis, patro, li diris al mi, mi falsĵuris ĉion kion vi volas — sed en tio, pri kio vi demandas, mi havas nenion direndan. Kaj ĉu vi scias, sur kio ĝi baziĝas, Don Ildefonso?” elpuŝis subite Padre kaj haste kruccsignis sin. ”Mi opinias, ke li havis kontakton kun satano. Tial li ne povis tion konfesi. Tio estis obskuraj sorĉoj. Li delogadis virinojn pere de infera potenco.” Padre Jacinto ekstremis. ”Vi devus lin rigardi, *Domine*. Mi dirus, ke tio vidiĝas el liaj okuloj.”

Don Ildefonso, S. J., silente meditis. ”Se vi opinias,” li diris fine, ”mi iros rigardi tiun viron.”

Donjuano dormetis, kiam Don Ildefonso silente enpaŝis la ĉambron kaj mansigne forsendis Leporellon; poste li eksidis sur seĝo ĉe la kapo de la mortanto kaj observis la magran vizaĝon de la agonianta homo.

Post ege longa tempo la vundito ekĝemis kaj malfermis la okulojn.

”Donjuano,” diris la jezuito milde, ”ŝajnas, ke estus por vi laciĝe paroli.”

Donjuan senenergie jesis.

”Ne gravas,” diris la jezuito. ”Via konfeso, sinjoro

Donjuano, ne estis en unu punkto klara. Mi prezentos al vi demandojn, sed eble vi povus montri konsenton aŭ malkonsenton al tio, kion mi diros al vi — pri vi.”

La okuloj de la vundito preskaŭ angore fiksiĝis al la senmova vizaĝo de la pastro.

”Donjuano,” komencis Don Ildefonso preskaŭ leĝere, ”mi aŭdis pri vi jam delonge; mi pripensis, kial fakte vi ĵetas vin de virino al virino, de amo al amo; kial vi neniam povas resti, neniam halti en tiu plenumiĝo kaj trankvilo, kiun ni homoj nomas feliĉo —”

Donjuano montris dentojn en dolora grimaco.

”De amo al amo,” daŭrigis Don Ildefonso trankvile. ”Kvazaŭ vi volus senĉese kaj denove iun konvinki — ver-simile vin mem, ke *vi indas la amon, ke vi estas viro, kian virinoj amas* — kompatinda Donjuano!”

La lipoj de la vundito moviĝis; estis, kvazaŭ li ripetus la lastajn vortojn.

”Kaj dume,” parolis la pastro amike, ”neniam vi estis viro Donjuano; nur via spirito estis spirito de viro, kaj tiu hontis, sinjoro, kaj malespere penis kaŝi, ke la naturo ne donis al vi, per kio estas pridonacita ĉiu vivanta estaĵo —”

El la lito aŭdiĝis knaba plorego.

”Tial, Donjuano vi ŝajnis viron ekde junaĝo; vi estis aŭdace kuraĝa, aventurema, fierega kaj afekta, por venki en vi mem la humiligan senton, ke la aliaj estas pli bonaj kaj pli virecaj ol vi; sed tio estis menso-

go kaj tial vi disipe akumuladis pruvon post pruvo, ne niu povis vin sekvi, ĉar ĝi estis nur afektata kaj senkerna — vi delogis eĉ ne unu virinon, Donjuano. Vi neniam ekkonis la amon, vi nur febre strebis, kiun ajn dezirindan kaj noblan virinon vi renkontis, ravi ŝin per via spirito, via kavalireco, via pasieco, en kiun vi mem prezentis vin al vi — ĉion ĉi vi sciis perfekte, ĉar vi ludistion. Kaj kiam venis la momento, kiam sub virino sinkas la genuoj — tio certe estis por vi infero, Donjuano, ĝi nepre estis infero, ĉar en tiu momento vi estis travivanta vian damnan fieregon kaj samtempe vian plej teruran humiligon. Kaj vi devis vin elŝiri el la brakumo, kiun vi vivriske konkeris, kaj fuĝi, povra Donjuano, fuĝi el la brakoj de la venkita virino kaj krome kun iu bela mensogo sur ĉi tiuj nerezisteblaj lipoj. Ĝi nepre estis infero, sinjoro Juano.”

La vundito turnis la kapon al la muro kaj ploris.

Don Ildefonso ekstaris. ”Povrulo,” li diris, ”vi hontistion konfesi eĉ en la sankta konfeso. Do vidu, nun ĝi jam pasis, sed mi ne rajtas senigi Padre Jacinton de lia pentanto.”

Kaj li venigis la paroĥestron; kaj kiam venis patro Jacinto, diris al li Don Ildefonso: ”Rigardu, patro, li konfesis ĉion kaj ploras. Lia pento estas ekster ĉiu dubo humila; eble ni povus lin absolvi.”

[1932]

Romeo kaj Julieta

Juna angla aristokrato, Oliver Mendeville restadanta en Italio por studvojaĝi, ricevis en Florenco raporton, ke lia patro Sir William forlasis ĉi tiun mondon. Sir Oliver do adiaŭis kun peza koro kaj abundaj larmoj al signorina Maddalena, ĵurante, ke li revenos kiel eble plej baldaŭ, kaj ekvojaĝis kun sia servisto en la direkto al Ĝenovo.

La trian tagon de ilia vojaĝo surprizis ilin ega pluvo, ĝuste kiam ili estis enveturantaj iun nestaĉon. Sir Oliver haltis kun ĉevalo sub maljuna ulmo. "Paolo," li diris al la servisto, "rigardu, ĉu estas ĉi tie iu *albergo*, kie ni tratendus la pluvegon."

"Kio koncernas la serviston kaj la ĉevalojn," aŭdiĝis voĉo super lia kapo, "*albergo* estas tie post la angulo; sed vi, *cavaliere*, farus honoron al mia paroĥejo, se vi rifuĝus sub ĝian modestan tegmenton."

Sir Oliver demetis larĝgrandan ĉapelon kaj turnis sin al fenestro, de kie gaje grimacis je li dika maljuna pastro. "*Vossignoria reverendissima*," li diris respekte, "vi faras troan afablecon al fremdulo, kiu forlasas vian belan

landon, ŝarĝita de dankemo pro ĉio bona, per kio li estis tiel disipe supersûtata.”

”*Bene*, kara filo,” diris la paroĥestro, ”sed se vi ankoraŭ tempeton parolos, vi tramalsekiĝos tute. Descendu afable de la ĉevalino kaj iome ĵetmoviĝu, ĉar ege pluvas.”

Sir Oliver ekmiris, kiam la *molto reverendo parocco* iris al li en koridoro renkonte: tiel etan pastron li ankoraŭ ne vidis; riverencante al li, li devis tiom kliniĝi, ke sango alfluis en lian kapon.

”Ej, lasu tion,” diris la paroĥestro. ”Mi estas nur franciskano, *cavaliere*. Oni nomas min Padre Ippolito. Hej, Marietta, alportu salamon kaj vinon. Tra ĉi tie, sinjoro, estas ĉi tie malbena mallumo. Vi estas *inglese*, ĉu? Do vidu, de tiu tempo, kiam vi, Angloj, apartiĝis de la sankta roma eklezio, vi abundegas en Italio. Mi komprenas, *signore*. Certe vi nostalgias. Rigardu, Marietta, tiu sinjoro estas *inglese*. Povrulo, tiel juna kaj jam li estas anglo! Tranĉu al vi pecon da tiu salamo, *cavaliere*, ĝi estas aŭtentika el Verono. Mi diras, al vino taŭgas nenio pli ol salamo el Verono, Bolonjanoj igu sin remburi per sia mortadelo. Fidu ĉiam la salamon el Verono kaj la salajn migdalojn, kara filo. Vi ne estis en Verono? Domaĝe. De tie devenis la dieca Veronese, *signore*. Nome mi devenas el Verono. Glora urbo, sinjoro. Oni nomas ĝin urbo de Skaligeroj. Ĉu bongustas la vino?”

”*Grazie, Padre,*” murmuris Sir Oliver. ”Ĉe ni en Anglio oni nomas Veronon la urbo de Julieta.”

”Aj, aj,” ekmiris Padre Ippolito, ”kaj kial? Mi eĉ ne scias, ke tie estus iu princino Julieta. Vere, tie mi ne estis jam pli ol kvardek jarojn — kiu Julieta ŝi estus?”

”Julieta Kapulet,” klarigis Sir Oliver. ”Sciu, ni havas pri ŝi tian teatraĵon ... de iu Shakespeare. Bela ludo. Ĉu vi konas ĝin, Padre?”

”Ne, sed atendu, Julieta Kapulet, Julieta Kapulet,” muelparolis Padre Ippolito, ”tiun mi devus koni. Mi estadis ĉe la Kapuletoj kun Padre Lorenzo —”

”Ĉu vi konis la monaĥon Lorenzon?” elspiris Sir Oliver.

”Kial mi ne konus lin? Mi, sinjoro, akolitadis al li. Aŭdu, ĉu ŝi ne estas tiu Julieta, kiu edziniĝis al grafo Pariso? Tiun mi konis. Ege pia kaj eminenta sinjorino, grafino Julieta. Ŝi estis laŭdevena Kapulet, el tiuj Kapuletoj, kiuj komercis kun veluro.”

”Ŝi ne povas esti tiu,” deklaris Sir Oliver. ”La vera Julieta mortis en junaĝo laŭ plej kortuŝa maniero, kiun vi povas imagi al vi.”

”Ha,” diris la *molto reverendo*, ”do ŝi ne estas tiu. La Julieta, kiun mi konis, edziniĝis al grafo Pariso kaj havis kun li ok infanojn. Modela kaj virta edzino, juna sinjoro Dio donu al vi egalan. Vere, oni rakontis, ke antaŭ tio ŝi perdis la kapon pro iu juna *crapulon* — Ba, signore, pri

kiu oni ne rakontus ion? La juneco estas, ni scias ja, senprudenta kaj ventkapa. Ĝoju, *cavaliere*, ke vi estas juna. Ĉu la *ingles'*oj estas ankaŭ junaj?"

"Jes, estas," ekĝemis Sir Oliver. "Aĥ, patro, ankaŭ nin konsumas la ardo de la juna Romeo."

"Romeo?" diris Padre Ippolito kaj ektrinkis. "Tiun mi devus koni. He, ĉu estis li tiu juna siocco, tiu dando, tiu kanajlo el la Montekoj, kiu hakvundis grafon Parison? Onidire pro Julieta. Jes, tiel. Julieta estis edziniĝonta al grafo Pariso — bona edziĝ-ŝanco, *signore*, tiu Pariso estis ege riĉa kaj bona juna sinjoro — sed Romeo ekobstinis, ke Julietan ricevos li — Tia stulteco, sinjoro," murmuris Padre. "Kvazaŭ la riĉaj Kapuletoj povus doni filinon al iu el la bankrotintaj Montekoj. Kaj plie la Montekoj estis partianoj de Mantovo, dume Kapuletoj estis je la flanko de la Milana duko. Ne, ne. Mi opinias, ke tiu *assalto assassinato* kontraŭ Pariso estis ordinara politika atenco. Hodiaŭ estas en ĉio nur politiko, kara filo. Memkomprene, post tiu banditaĵo Romeo devis fuĝi al Mantovo kaj plu ne revenis."

"Tio estas eraro," elpuŝis Sir Oliver. "Mi petas pardonon, Padre, sed tiel ne okazis. Julieta amis Romeon, sed la gepatroj volis devigi ŝin edziniĝi al grafo Pariso —"

"Ili sciis ja kial," konsentis la maljuna paroĥestro. "Romeo estis *ribaldo* kaj estis partiano de Mantovo."

"Sed antaŭ la edziniĝo al Pariso pastro Lorenzo havi-

gis al ŝi pulvoron, por ke ŝi falu en ŝajnan morton,” kontinuis Sir Oliver.

”Tio estas mensogo,” diris impete Padre Ippolito. ”Tion patro Lorenzo neniam estus farinta. Sed vero estas, ke Romeo ekatakis Parison surstrate kaj hakvundis lin. Eble li estis ebria.”

”Pardonu, patro, sed tio estis tute alie,” protestis Sir Oliver. ”La vero estas, ke oni Julietan enterigis. Romeo super ŝia tombo trapikis Parison per glavo —”

”Atendu,” diris la panoĥestro. ”Unue tio ne okazis super la tombo, sed surstrate proksime de la monumento al la Skaligeroj. Kaj due Romeo ne trapikis lin, sed nur dishakis lian ŝultron. Hometo, mortigi iun per glavo ne ĉiam sukcesas. Nur provu tion, juna sinjoro!”

”*Scusi*,” oponis Sir Oliver, ”mi vidis tion tuj ĉe la premiero sur scenejo. Grafo Pariso estis en duelo vere trapikita kaj mortis surloke. Romeo opiniante, ke Julia estas vere morta, venenis sin en ŝia kripto. Tiel estis, Padre.”

”Ba ne,” murmuris patro Ippolito. ”Li ne venenis sin. Li fuĝis en Mantovon, amiko.”

”Pardonu, Padre,” insistis pri sia pravo Oliver, ”mi vidis tion per ĉi tiuj okuloj — mi sidis ja en la unua vico! En tiu momento Julieta vekiĝis kaj vidinte, ke ŝia amato Romeo estas morta, ŝi ankaŭ prenis la venenon kaj mortis.”

”Kion vi opinias,” koleris Padre Ippolito. ”Mi miras, kiu faris ĉi klaĉojn. La vero estas, ke Romeo fuĝis en Mantovon kaj la povrulino Julieta pro aflikto super tio iomete duonvenenis sin. Sed tio estis nenio, *cavaliere*, nur tiel infaneca; mi petas vin, ŝi havis apenaŭ dek kvin jarojn. — Mi scias tion de tiu Lorenzo, juna sinjoro; memkomprene, mi estis tiam tia *ragazzo*,” montris la bona pastro proksimume unu ulnon super la tero. ”Julietan oni poste forveturigis al ŝia onklino en Besenana, por ke ŝi resaniĝu. Tien alveturis al ŝi grafo Pariso, la manon li havis ankoraŭ en bandaĝo kaj vi scias, kiel estas en tia kazo: rezultis el tio kolosa amo. Post tri monatoj ili geedziĝis. *Ecco, signore*, tia estas la vivo. Mi mem partoprenis la edziĝfeston kiel akolito en blanka surpliseto.”

Sir Oliver sidis iel konsternite. ”Ne koleru, patro,” li diris fine, ”sed en la angla teatraĵo ĝi estas multoble pli bela.”

Pastro Ippolito eksnufis. ”Pli bela! Mi ne scias, kion belan vi vidas en tio, se du junaj homoj sin mortigas. Estus domaĝe pri ili, juna sinjoro. Mi diras al vi, pli bele estas, ke Julieta edziniĝis kaj havis ok infanojn, kaj kiajn infanojn, uleto: kiel bildetoj.”

Oliver neis la kapon. ”Tio ne estas plu la samo, kara Padre; vi ne scias, kio estas granda amo.”

La eta pastro mediteme palpebrumis. ”Granda amo?

Mi pensas, ke ĝi estas, se du homoj scias toleri sin dum la tuta vivo ... sindone kaj fidele ... Julieta estis rara sinjorino, kara sinjoro. Ŝi edukis ok infanojn kaj servis al sia edzo ĝis la morto. Do ĉe vi oni nomas Veronon urbo de Julieta? Tio estas de vi angloj ege bela, *cavaliere*. Sinjorino Julieta estis vere eminenta edzino, Dio donu al ŝi eternan gloron.”

Juna Oliver rekonsciĝis el la distreco. ”Kaj kio okazis kun Romeo?”

”Tiu? Mi eĉ ne scias bone. Ion mi aŭdetis pri li. — Ha, jen mi scias. Li enamiĝis en Mantovo al filino de iu markizo — kiel li nur estis nomata? Monfalkone. Montefalko aŭ iel simile. Ah, *cavaliere*, jen estis io, kion vi nomas romantika amo! Li eĉ forkondukis ŝin aŭ kio — tio estis ege romantika historio, sed detalojn mi forgesis; mi petas vin, tio okazis en Mantovo. Sed onidire ĝi estis ia *passione senza esempio*, ia supermezura pasio, sinjoro. Almenaŭ oni rakontis tiel. *Ecco, signore*, ne plu pluvas.”

Sir Oliver leviĝis en sia tuta embarasa alto. ”Vi estis treege afabla, Padre. *Thank you so much*. Ĉu mi povus lasi ion ĉi tie ... por viaj malriĉaj paroĥanoj,” li murmuris, ruĝiĝante kaj ŝovante sub la randon de telero manplendon da zekenoj.

”Aj, aj,” kosterniĝis Padre Ippolito kaj managitis, ”kia ideo, tiom da mono por peceto da salamo el Verono!”

”Io estas ankaŭ por via historieto,” rapidis diri la juna

Oliver. "Ĝi estis — eh, ĝi estis tre, tre — mi ne scias, kiel tion diri. *Very much, indeed.*"

En la fenestrojn de la paroĥejo inundis sunradioj.

[1932]

Sinjoro Hynek Ráb el Kufštejn

Sinjoro Janek Chval el Jankov ankoraŭ ne rekonsciiĝis el la surprizo. Mi petas vin: venis, aperis, subite enfalis ĉi tien vizite sinjoro bofilo, kaj kia bofilo, bonvolu nur rigardi: li havas germanajn pantalonubojn kaj maĝarajn lipharojn, nu nekontestebla grandsinjoro; kaj jen la maljuna sinjoro Janek kun refalditaj manikoj dume helpis ĉe bovin-akuŝo. Kia pridonaco, pensas la maljuna sinjoro embarasite, kial diabloj lin portas al mi?

”Nur trinku, sinjoro Hynek,” li trudis fervore. ”Estas nur ĉi tiea vino, kvin jaroj pasis, de kiam ĝin alverturigis judo el Litomyšice. En Prago vi trinkas la cipran, ĉu?”

”Tian kaj alian,” diris sinjoro Hynek. ”Sed mi diras al vi, sinjoro bopatro, nenio superas honestan ĉeĥan vinon. Kaj bonan ĉeĥan bieron, sinjoro. Ĉe ni la homoj ne scias, kion bonan ni havas, kaj aĉetas ĉian ajn fremdan fivaron. Ĉu vi opinias, ke el fremdlando oni alveturigas al ni ion solidan?”

La maljuna sinjoro kapskuis. ”Kaj ankoraŭ ili volas por tio tian nekristanan monon.”

”Memkomprene,” tradentis sinjoro Ráb. ”Mi petas vin, konsideru nur la doganojn. Lia reĝa majesto grasi-

gas siajn poŝojn kaj ni devas tion pagi.” Sinjoro Hynek indigne tuskraĉis. ”Nur se li havas plenajn kestojn da mono!”

”Poděbrad?”

”Tiu nano,” jesis sinjoro Ráb. ”Li aspektas kiel iu butikisto. Ni havas ja reĝeton, ĉu? Sed ĝi bankrotos, sinjoro bopatro. Jam pro ekonomiaj kaŭzoj kaj simile. Nu kaj ĉe vi en Jankov estas ankaŭ tiel malbone?”

Sinjoro Janek malsereniĝis: ”Malbone, knabo. Ege malbone. Venis pesto al la bovinoj, vanas la prifumado. Kaj diablo scias, al la kamparanoj karbunkliĝis la greno. Pasintjare hajlis. — Malbone estas al la kampuloj. Imagu, sinjoro Hynek, ili eĉ ne havas grenon por semado, mi devis disdoni al ili semaĵon el mia grenejo —”

”Disdoni?” ekmiris sinjoro Ráb. ”Tion, sinjoro bopatro, mi ne farus. Kial karesi la ronkulojn? Kiu ne scias sin vivteni, tiu mortaĉu. Tiu mortaĉu,” ripetis sinjoro Hynek energie. ”En la nuna tempo, sinjoro bopatro, necesas fera mano. Nur neniujn almozojn kaj subtenojn. Sibaritigi ilin, tio mankus! Venos ankoraŭ pli malbonaj tempoj. Prefere kutimigi la nenihavulojn je iom da mizero. Ili manĝaĉu kruston kaj simile. Mi donus al ili nenion, nur rekte mi dirus al ili: Vi senhavuloj mizeregaj, vi sklavoj kaj simile. Ĉu vi pensas, ke ni ne havas pli seriozajn zorgojn ol viajn intestojn? Hodiaŭ, mi dirus al ili, vi ĉiuj devas esti preparitaj je pezaj oferoj. Ni devas pensi pri

defendo de nia reĝolando kaj pri nenio malpli granda. Tiel mi parolus al ili, sinjoro. La tempo estas malfacila, kaj kiu ne estas preta morti por la patrio, mortaĉu pro malsato. Kaj fino.”

Sinjoro Hynek energie ektrinkis. — ”Dum ili povas teni sin sur piedoj, armil-ekzerci ilin kaj neniujn parolojn.”

La maljuna sinjoro el Jankov malfermegis je sinjoro bofilo la palajn okulojn. ”Kio, kio nur,” li elbalbutis konfuzite. ”Ĉu, ĉar — Dio gardu — estos milito?”

Sinjoro Hynek ekridaĉis. ”Kial ne estu! Devas esti: ĉu ni havas la pacon por nenio? Ej, sinjoro, kiam estas paco, memkomprene, io estas preparata. Mi petas vin,” li diris malestime, ”ja tion scias ankaŭ tiu — kiel nur oni nomas lin? ha, la princo de la paco. La princo de la paco,” kraĉsprucis sinjoro Ráb. ”Memkomprene, sinjoro, li timas pri sia trono. Oni eĉ ne vidus lin, se li ne estus sidanta sur trono, kun tri kusenoj sub la postaĵo.”

”Ĉu li, Poděbrad?” demandis sinjoro Janek necerte.

”Kiu alia? Eh, ni havas reganton, mi bele dankas! Nur paco, sinjoro bopatro. Nur mesaĝoj kaj similaj aferoj. Por tio estas mono, ĉu? Antaŭ nelonge — ĝis Hlohovec li pelaĉis sin al la pola reĝo, laŭdire pro pakto kontraŭ Turkoj. Tutan mejlon li iris renkonte al la Polo, imagu! Kion vi diras pri tio?”

”Nu,” diris sinjoro Janek singarde, ”ĉu oni malmulte parolas pri Turko?”

”Malsaĝaĵoj,” diris sinjoro Hynek Ráb energie. ”Sed ĉu decas, ke la ĉeĥa reĝo faru honoraĵojn al Polo? Estas hontinde,” ekkriis sinjoro Hynek. ”Li devis atendi, ĝis la Polo venos al li! Jen, kiel ni, sinjoro Janek, finas! Kion dirus pri tio la mortinta imperiestro Karolo aŭ Zikmundo? Tiam ni, kara sinjoro havis ankoraŭ ian internacian prestiĝon —” Sinjoro Ráb kraĉis. ”Fi! Mi miras, ke ni Ĉeĥoj toleras tian hontaĵon.”

Kiaj aferoj, ĉagreniĝis sinjoro Janek Chval. Kaj kial li tion rakontas al mi? Kvazaŭ mi ne havus sufiĉe da miaj zorgoj —

”Aŭ la jena,” predikis sinjoro Ráb, ”— li sendis ambasadon en Romon, por ke la papo lin rekonu kaj tiel plu. Kun bela peto, vi scias? Onidire, por ke estu paco inter la kristanaro kaj simile. Devas finiĝi!”

Sinjoro Ráb frapis per manplato la tablon, mirinde, ke li ne renversis la pokalojn. ”Paĉjo Žižka turniĝus en la tombo! Miadio, mi petas vin, trakti kun la papo! Ĉu tial ni kalikanoj sangis, he! Por ke li vendu nin al Romo sub papan pantoflon?”

Kaj kial vi tiel incitiĝas, miris la maljuna sinjoro, distre palpebrante. Kie vi, homo, sangis? Via mortinta patro venis ĉi tien nur kun Zikmundo. — Vere, poste li edziĝis en Prago. Li subskribadis sin Joaĥim Hanes Raab.

Li estis bona homo, hometo, mi lin konis; tute prudenta Germano.

”Kaj li pensas,” indigniĝis sinjoro Hynek Ráb, ”ke li faras dioscias kian altan politikon. Antaŭ nelonge li sendis iajn siajn pajacojn ĝis Francio, al la franca reĝo. Ke oni fondu ligon de kristanaj princoj, por ke ili kunvenu en iu tuteŭropa parlamento aŭ kio. Pace likvidi konfliktojn kaj simile. Kaj kontraŭ la Turko laŭdire kaj eterna paco kaj tiaj aferoj. Diru vi mem: ĉu vi aŭdis iam similajn sensencaĵojn? Ĉu estas eble fari politikon — tiel? Mi petas vin, kiu likvidus la konfliktojn pace, se eblas fini ilin per milito? Kaj ĉu iu ŝtato toleros enmiksiĝon, se ĝi volas militi kun la alia? Nu, malsaĝaĵoj — la tuta mondo nur ridas pri tio. Sed kiel nin, sinjoro bopatro, tia malfortula paŝo kompromitas antaŭ la tuta mondo! Ja, miadio, ni aspektas, kvazaŭ ni timus, ke ne venu iu milito je ni —”

”Kaj — ĉu ĝi venos?” demandis sinjoro Hynek zorge. Sinjoro Hynek Ráb el Kufŝtejn kapskuis. ”Venenon vi povas preni. Rigardu, sinjoro bopatro, kontraŭ ni estas la Hungaro, la Germano, la papo kaj Aŭstrio. Se ili estas kontraŭ ni, nu bone: ni devas ataki ilin, antaŭ ol ili alianciĝos. Tuj la militon kaj prete. Tiel oni faras,” deklaris sinjoro Ráb kaj trakombis decideme siajn harojn.

”Nu, mi ĝustatempe zorgu pri provizoj,” murmuris

sinjoro Janek Chval enpense. "Estas bone havi provizojn."

Sinjoro Hynek Ráb konfidence klinis sin trans la tablon. "Mi havus, sinjoro, ankoraŭ pli bonan planon. Alianciĝi kun la Turko kaj Tataro. Tio estus politiko, ĉu? Al la Tataro lasi Pollandon kaj Germanion, ili tie ĉion ekstermu kaj forbruligu. Des pli bone por ni, ĉu vi komprenas? Kaj al la Turko lasi Hungarion, Aŭstrion kaj la papon."

"Oni diras," murmuris la maljuna sinjoro, "ke la Turko estas kruelulo."

"Ĝuste tial," diris sinjoro Hynek aprobe. "Tiu ilin, sinjoro, misfartigus! Nur neniujn ceremoniojn aŭ tiajn kristanajn sentojn! Simple, problemo de potenco. Kaj nia nacio, sinjoro — Mi diras, por la nacio neniu ofero estas sufiĉe granda; sed devas ĝin porti la aliaj, ĉu vi komprenas? Neniun indulgu, kiel diradis nia Žižka. Kontraŭ ĉiuj kaj simile. Nur se estus pli da veraj kaj efektivaj naciajnoj! Nur denove eksvingi per tiu nia malnova ĉeĥa batarmilo —"

Sinjoro Janek Chval el Jankov kapjesis. Mi devas zorgi pri provizoj, li opiniis. Kiu scias, kio okazos. La maljuna sinjoro Raab estis saĝa homo, kvankam ĝiskerna Germano. Tirolano. Eble sinjoro Hynek havas iom da prudento post li, ekpensis la maljuna sinjoro, kaj en Prago

oni diversion scias — Ĉefe fojnon provize sekigi. Dum milito necesas fojno.

Sinjoro Hynek Ráb el Kufštejn frapis gajigite la tablon. "Sinjoro bopatro, ni ankoraŭ ĝisvivos tion! Je la sano! Hej, knabo, ĉi tien la kruĉon! Verŝu la vinon, ĉu vi ne vidas, ke pokal' malplenas? Kaj vivu nia afero!"

"*Wohl bekomm's,*" diris la maljuna sinjoro Janek ĝentile.

[1933]

Napoleono

Mlle Claire (de *Comédie Française*) eĉ ne pepetis; ŝi sciis, ke la imperiestro de tempo al tempo tiel enpensiĝas kaj ne ŝatas esti ĝenata. Cetere, inter ni, pri kio paroli kun li? Kion vi volas, tamen nur li estas imperiestro; oni ne sentas sin ĉi tie hejmece, ĉu ne vere? (Malgraŭ ĉio li estas nur fremdulo, meditas Mlle Claire, *pas très Parisien*.) Sed tie ĉe la kameno li tamen havas sufiĉe belan vizaĝon. (Se li ne estus nur tiel korpulenta.) (*Là, là*, li eĉ ne havas kolon, *c'est drôle*.) (Sed sciu, li povus esti iom pli ĝentila!)

Sur kameno tiktakas peza marmora horloĝo. Morgaŭ, pensas la imperiestro, mi devos akcepti reprezentantojn de la urboj — tio estas malsaĝa, sed kion fari; certe ili plendos pri impostoj. Poste aŭstria ambasadoro — ĉiam la sama historio. Poste venos prezenti sin la novaj tribunaj prezidantoj — mi devas anticipe tralegi, kie kiu el ili laboris; ĝojigas la homojn, ke mi scias ion pri ili. La imperiestro kalkulas surfingre. Ankoraŭ io? Jes, Conte Ventura, denove li denunciados la papon — Napoleono subpremis oscedon. Dio, kia tedaĉo! Mi devus venigi

tiun — kiel li estas nomata? tiun lertan hometon, kiu ĵus revenis el Anglio. Kiel nur estas nomata tiu ulo — *porco*, li estas ja mia plej bona spiono!

”*Sacrebleu*,” murmuris la imperiestro, ”kiel tiu ulo estas nomata!”

Mlle Claire alsidiĝis kaj partopreneme silentis.

Egale, pensas la imperiestro, li nomiĝu kiel ajn; sed liaj raportoj estas kutime bonegaj. Utila homo, tiu — tiu — *maledetto*. Malsaĝe, kiel iam nomo forgesiĝas! Mi havas ja bonan memoron por nomoj, miras la imperiestro. Kiom da mil nomoj mi portas en la kapo — nur kiom da soldatoj mi konas laŭnome! Mi vetus, ke mi rememorus ankaŭ hodiaŭ la nomojn de ĉiuj miaj samklasanoj el la kadetlernejo — kaj ankaŭ amikojn el la junaĝo. Ni atendu, estis Tonio, nomata Biglia, Francio *alias* Riccintello, Tonio Zufolo, Mario Barbabietola, Luca nomata Peto (la imperiestro ekridetis), Andrea nomata Puzzo aŭ Tirone —. Ilin ĉiujn mi memoras laŭnome, diras al si la imperiestro, kaj nun ne kaj ne rememori tiun — *tonnerre*!

”Madame,” diras la imperiestro absorbite, ”ĉu ankaŭ vi havas tian kuriozan memoron? Oni memoras nomojn de infanaj komplicoj, sed ne povas kapti nomon de homo, kun kiu oni parolis antaŭ unu monato.”

”Nepre, siro,” diris Mlle Claire. ”Estas tiel strange,

ĉu?” Mlle Claire provis rememori iun nomon el sia jun-aĝo; sed neniu elmergiĝis, ŝi rememoris nur sian unuan amanton. Li estis iu Henry. Jes, Henry li estis.

”Strange,” murmuris la imperiestro, fikse rigardante la flagradon en la kameno. ”Ĉiujn mi scias imagi. Gamba, Zufolo, Briccone, Barbabietola, eta Puzzo, Biglia, Mattaccio, Mazzasette, Beccajo, Ciondolone, Panciuto —. Ni estis proksimunme dek du kanajloj, *Madame*. Min oni nomis Polio, *il Capitano*.”

”Ĉarme,” ekvokis Mlle Claire. ”Kaj vi, siro, estis ilia kapitano?”

”Memkomprene,” rakontis la imperiestro enpense. ”Aŭ mi estis kapitano de rabistoj aŭ de ĝendarmoj, laŭ cirkonstancoj. Mi gvidis ilin, ĉu vi scias? Iam mi ordonis eĉ pendigi Mattaccian pro malobeo. Nur lastmomente lin maljuna gardisto Zoppo ĝustatempe detranĉis. Tiam, *Madame*, oni alie regis. Tia *Capitano* estis suverena estro de siaj homoj. — Tie estis malamika knaba hordo, tiun gvidis iu Zani. Poste li vere iĝis banditestro en Korsiko. Antaŭ tri jaroj mi igis lin pafmortigi.”

”Videble,” elspiris Mlle Claire, ”ke Via Majesto naskiĝis jam kiel gvidanto.”

La imperiestro kapskuis. ”Ĉu vi opinias? Tiam, kiel *Capitano*, mi sentis mian propran povon multe pli forte. Regi, *Madame*, ne estas kiel ordoni. Ordoni sen em-

barasoj kaj konsideroj — ne zorgi pri eblaj sekvoj — *Madame*, tio estis la suverena en la afero, ke ĝi estis nur ludo, ke mi sciis, ke ĝi estas nur ludo —”

Mlle Claire sprite divenis, ke en ĉi tion ŝi ne miksu sin; ni imputu tion kredite en ŝia konto.

”Kaj ankaŭ nun, ankaŭ nun,” daŭrigis la imperiestro pli malpli por si mem. ”Ofte mi ekpensas ial: Polio, ja ĝi estas nur ludo! Oni nomas vin Siro, oni nomas vin Via Majesto, ĉar ni tion ludas, ni ĉiuj. La soldatoj rigide starantaj — la ministroj kaj ambasadoroj riverencantaj ĝistere — nura ludo. Kaj neniu dume puŝetas alian kubute, neniu eksplodas ride. — Kiel infanoj ni ankaŭ tiel serioze ludis. Tio jam apartenas al la ludo, *Madame*: mieni kvazaŭ ĉio ĉi estus reala —.”

Sur la kameno tiktakis peza marmora horloĝo. La imperiestro estas stranga, pensis Mlle Claire necerte.

”Eble post la pordo ili palpebrumas unu la alian,” parolas la imperiestro enpense. ”Kaj eble ili flustras al si: Ŝerculo, tiu Polio, kiel li scias ludi imperiestron; eĉ ne brovon li movas — se tio ne estus ludo, oni povus diri, ke li opinias tion serioza!” La imperiestro eksnufis, kvazaŭ li interne ridus. ”Komike, ĉu *Madame*? Kaj mi tiom ilin atentis — tuj kiam ili puŝetos sin, por ke mi komencu ridi kiel unu a. Sed ili nenion. Iam mi sentas, ke ili interkonsentiĝis, por ke mi iĝu superruzita. Komprenu,

ke mi ekkredu, ke ĝi ne estas ludo — kaj por poste primokegi min: Polio, Polio, kiel ni vin superruzis!” La imperiestro mallaŭte ekridis. ”Ne, ne! Min ili ne superruzos! Mi scias, kion mi scias —”

Polio, pripensis Mlle Claire. Kiam li estos tenera, mi nomos lin tiel. Polio. *Mon petit* Polio.

”Mi petas?” demandis la imperiestro bruske.

”Nenio, siro,” defendis sin Mlle Claire.

”Tial. Mi pensis, ke vi diris ion.” La imperiestro sin klinis al la fajro. ”Strange, ĉe virinoj mi tion ne tiel rimarkis; sed ĉe la viroj estas pli ofte. En profundo de sia animo neniam ili ĉesas esti bubetoj. Tial ili faras en la vivo tiom da aferoj, ĉar ili fakte ludas. Tial ili faras la aferojn tiel pasie kaj koncentrite, ĉar estas nur ludo, ĉu vi ne opinias? Ĉu povas ja esti iu serioze imperiestro, hm? Mi scias, ke estas nur petolaĵo.”

Estis silente. ”Ne, ne, ne,” murmuris la imperiestro. ”Ne kredu tion. Sed iam oni ne estas certa, ĉu? Iam oni subite ektimas — mi estas ja eta Polio kaj ĉio ĉi estas nur tiel, ĉu? Mon Dieu, sed kiam ĝi krakos! Jen, ĝuste tio, ke oni ne povas esti certa —” La imperiestro levigis la okulojn kaj fikse ekrigardis al Mlle Claire. ”Nur rilate virinojn, Madame, nur en la amo oni estas certa, ke — ke — ke oni ne plu estas infano; tiam almenaŭ oni scias, ke oni estas viro, diable!” La imperiestro eksaltis. ”*Allons, Madame!*”

Li estis subite tre pasia kaj violenta.

"Aĥ, siro," elspiris Mlle Claire, "*comme vous êtes grand!*"

[1933]

Pri la aŭtoro

Karel Čapek (1890-1938) naskiĝis kiel filo de kuracisto en Malé Svatoňovice [nord-orienta Ĉeĥio]. Gimnazion li studis en Hradec Králové kaj Brno, akademian gimnazion en Prago. Filozofion li studis en Prago, Berlino kaj Parizo kaj farigis doktoro de la lasta surbaze de disertacio pri pragmatismo. Redaktoro kaj dramaturgo. Nesuperebla rakontisto atinganta sian supron en felietonoj kaj vojaĝpriskriboj. Jen ili: *Italaj Folioj*, *Anglaj Folioj*, *Ekskurso en Hispanion*, *Skizoj el Nederlando* (esperantigita) kaj *Vojaĝo Norden*. En *R.U.R.*, *Rossumaj Universal-Robotoj* (esperantigita) li kritikis la maŝinan civilizon kaj emfazas la neceson de humanismo kaj amo, garantianta eternecon de la vivo. El *Vivo de Insektoj*, komedia dramo, verko, kie li verdiktas super homa avidado, pri trompaj seksĝuoj kaj militista braveco. *Blanka Malsano*, decidege kontraŭdiktatora kaj porpaca, en *Milito kontraŭ Salamandroj* la komenca humuro kaj satiro transiras al la senpovo de la homo kontraŭ la ribeliĝintaj amfibiaj robotoj. *Rakontoj el la unua poŝo* kaj *Rakontoj el la dua poŝo* (esperantigitaj), detektivaj okazaĵoj spritaj, brilaj, aventuraj kaj realismaj. *Aerolito* ravas en ekstremo

per sia epikeco, ĉarmaj kaj koraj estas liaj *Naŭ Fabeloj*, destinitaj por la infanoj. *Afero Makropulos* okupiĝas pri problemo de korpa senmorteco kaj ĝia vaneco. Pluaj verkoj estas *Krakatit*, *Fabriko je Absoluto*, komedio *Rabisto*, k. a.

K. Ĉapek scias paroli pri la plej ordinaraj aferoj de la vivo, ŝatas ilin kaj transformas al miraklo, scias poeziigi la plej simplajn objektojn, scias rigardi iun aferon tute nekutime kaj same diri la plej validan veron; li vojaĝis tra la mondo kaj rigardis ĝin per okuloj de impresiĝema infano, miris pri ĝi, kaj skribis ĉion, kio tuŝis lian koron. Kaj estis nenio, kio ne impresus lin. Ĉapek estas utopie-ma, sed restas sur bazo de humila humanismo. Etan servon al la vivo kaj homo li metas super utopiojn, simplan amon kaj ordinaran heroecon super kapturnajn konceptojn de frida racio. La stila majstreco de Ĉapek proksimiĝas pli kaj pli al la rakonta leĝereco kaj kerna simpleco. Ankaŭ ĵurnalismen li metis en la servojn de romano kaj rakonto.

Ĉio ĉi estas grandaj kvalitoj artismaj kaj samtempe homaj kaj tial ili subigas plene la legantojn.

Klarigoj

<i>Blansko</i>	urbeto proksimume 20 km norde de Brno; proksime abismo Macocha (prononcu Macoĥa) kun famegaj stalagmita] grotoj.
<i>Rájec</i>	komunumo apud Blansko
<i>Tersito</i>	la plej kalumniema Greko en la ekspedlcio kontraŭ Trojo. Pro tio ankaŭ mortigita de Aĥilo.
<i>ikonoklasmo</i>	bild-detruismo
<i>ikonoklasto</i>	bild-detruisto
<i>Jiří (Georgo)</i>	el Poděbrady [1420-1471], eminenta diplomato, saĝa politikisto kaj ŝtatulo, la plej bona ĉeĥa reĝo. Lia regado apartenas al la plej feliĉa tempo en la Ĉeĥa historio. Li ekhavis la ideon krei union de kristanaj regantoj por sekurigi la pacon kaj fronti la turkan danĝeron. Per tio li fariĝis pioniro de la iama Ligo de Nacioj. En la jaro 1464 li delegis grandan ambasadon al Francio por prezenti al la franca reĝo Ludoviko la XI-a proponon, laŭ kiu la franca reĝo starus frunte de la Paca Ligo kaj kunvokus ĉiujn kristanajn princojn al komuna interkonsilo por malebitgi militojn inter la membroj de la Ligo. La plano, bonege ellaborita, fiaskis pro neakcepto flanke de Ludoviko la XI-a kaj la papo.
<i>albergo</i>	[itale] hotelo
<i>allons, Madame</i>	[france] ek, sinjorino

<i>andres Boiótikoi</i>	[greke] civitanoj de Boiotio
<i>assalto assassinatorio</i>	[itale] murd-atako
<i>ausgerechnet</i>	[germane] guste
<i>bene</i>	[latine] bone
<i>bule</i>	[greke] urba konsilantaro
<i>caballero</i>	[hispane] kavaliro
<i>Kapuletoj</i>	[itala nobelaro]
<i>capitano</i>	[itale] kapitano
<i>cavaliere</i>	[itale] kavaliro
<i>c'est drŝle</i>	[france] kiel komike!
<i>comme vous 'tes grand</i>	[france] kiel granda vi estas
<i>crapulon</i>	[itale] diboĉulo
<i>Domine</i>	[latine] sinjoro
<i>ecco</i>	[itale] jen
<i>Elói, Elói, lama zabahtani?</i>	[hebree] Mia Dio, mia Dio, kial Vi for- lasis min?
<i>fatraso</i>	[neol.] forĵetindaĵoj
<i>fola</i>	[neol.] frenezeta
<i>grazie, padre</i>	[itale] dankon, patro
<i>guno</i>	[neol.] juna bovino
<i>inglese</i>	[itale] anglo
<i>in puncto</i>	[latine] en punkto
<i>in venere</i>	[latine] rilate al sekso
<i>knaki</i>	[neol.] kraketi sub dentoj
<i>Kriste eleison</i>	[greke] Kristo, hompatu
<i>là, là</i>	[france] la, la [interj.]
<i>madame</i>	[france] sinjorino
<i>mademoiselle — Mlle</i>	[france] fraŭlino
<i>maledetto</i>	[itale] damna
<i>molto reverendo parrocco</i>	[itale] tre respektinda pastra moŝto
<i>mon petit</i>	[france] mia eta, mia etulo
<i>mon Dieu</i>	[france] Mia Dio
<i>Montekoj</i>	[itala nobelaro]
<i>minima non curat praetor</i>	[latine] pretoro ne zorgas pri baga- teloj

<i>mungii</i>	[<i>neol.</i>] nazpurigi
<i>pas très Parisien</i>	[<i>france</i>] ne tro Pariza
<i>padre</i>	[<i>itale</i>] patro
<i>passione senza esempio</i>	[<i>itale</i>] senekzempla pasio
<i>porco</i>	[<i>itale</i>] porko
<i>podestà vicegerente</i>	[<i>itale</i>] vic-urbestro
<i>premiero</i>	[<i>neol.</i>] unua teatra prezentado
<i>pro primo</i>	[<i>latine</i>] unue
<i>pro secundo</i>	[<i>latine</i>] due
<i>pro tertio</i>	[<i>latine</i>] trie
<i>ragazzo</i>	[<i>itale</i>] bubo
<i>ribaldo</i>	[<i>itale</i>] kanajlo
<i>Rabboni</i>	[<i>hebree</i>] Majstro
<i>rumoro</i>	[<i>neol.</i>] konfuza voĉbruo de pluraj homoj
<i>sacrebleu</i>	[<i>france</i>] tondro al tio!
<i>sciocca</i>	[<i>itale</i>] malsaĝa
<i>Skaligieroj</i>	[<i>itala nobelaro</i>]
<i>scusi</i>	[<i>itale</i>] pardonu, eskuzu
<i>signore</i>	[<i>itale</i>] sinjoroj, aŭ sinjorinoj
<i>Societas Jesu - S. J.</i>	[<i>latine</i>] ordeno de jezuitoj
<i>thank you so much</i>	[<i>angle</i>] ege mi dankas al vi
<i>tonnerre</i>	[<i>france</i>] tondro al tio!
<i>very much indeed</i>	[<i>angle</i>] vere tre multe
<i>virtus</i>	[<i>latine</i>] virto
<i>vossignoria reverendissimo</i>	[<i>itale</i>] via respektinda moŝto
<i>wohl bekomm's!</i>	[<i>germane</i>] je via sano!

Enhavo

La puno de Prometeo	3
Pri dekadenco de l'tempo	9
Kiel dum malnovaj tempoj	16
Tersito	20
Agatono aŭ pri la saĝo	27
Aleksandro la Granda	32
La morto de Arĥimedo	39
La romiaj legioj	43
Pri dek virtuloj	48
Pseŭdo-Lot aŭ pri patriotismo	55
La sankta nokto	62
Marta kaj Maria	66
Lazaro	74
Pri kvin panoj	79
Benĥanan	84
La krucumo	89
La vespero de Pilato	92
Imperiestro Diokleciano	101
Atilo	108
Ikonoklasmo	115
Frato Francisko	125
Ofiro	131
Goneril, filino de Lear	140
Hamleto, princo dana	144
La konfeso de Donjuano	157
Romeo kaj Julieta	165
Sinjoro Hynek Ráb el Kufŝtejn	173
Napoleono	180
Pri la aŭtoro	186
Klarigoj	188

www.omnibus.se/inko

ISBN 91-7303-164-X